

La Bela Mondo

I^a volumo

(julio ĝis decembro 1908)

Redakcio:

D^{ro} Albert Schramm, Dresdeno

Dresdeno

F. Emil Boden

1908.




V-22225



Kun permiso de „Verein zur Förderung Dresdens und des Fremdenverkehrs“.

Venu Dresdenon! Koran bonvenon!



Mondo de l' Belo.

En la animo de ĉiu homo vivas io,
kio sopiras je beleco kaj ĉarmo. La
laboro kaj la celadoj de la ĉiutaga vivo
lin ne kontentigas, li sentas ian internan
puŝadon al arto kaj ludo. Li serĉas ian
agadon por tiu ĉi eneco, li serĉas ian
„Belan Mondon!“

Tiu ĉi Bela Mondo aŭ Mondo de
l' Belo por mi estas Esperanto, Espe-
ranto kun sia ideo de la pacamo!

Marie Hankel - Dresden.

Esperantujo *).

Mi ion deziras, mi havas demandon,
Mi serĉas ian tre belan landon!
Landon kun por mi florantaj floroj,
Kie varmege batas la koroj.

Ho, lando belega, ĉu vi ja ekzistas?
Sur nia tero, kie vi troviĝas?
Lando, varmege deziregata,
Kie vi estas, ho mia amata?

Al via demando mi scias respondon:
Amikaj koroj plenigas la mondon,
Lando floranta jam estis trovata,
Esperantujo ĝi estas nomata.

M. Hankel.

*) Muzikigita de F. de Mênil, eldonita de Hans
Th. Hoffmann, Berlin (prezo 1 M. 75 Pf.).



Neesperita feliĉo.

La maljuna fabrikanto Keller volonte rakontis la sekvantan okazintaĵon:

Mi nur de mallonge ree estis hejme el fremdujo kaj komencis mian propran malgrandan negocadon. Tiam venis la paska foiro de Leipzig. Mi veturis tien kaj prenis kun mi kreditbileton de 1000 taleroj. Tio estis, se mi ĉion kunkalkulis, mia tuta havaĵo. Sed mi estis juna kaj sana, kaj kion oni imagas junulo povi fari per 1000 taleroj! Mi do veturis al Leipzig kaj donis mian kreditbileton al la firmo: Frege kaj kompanio. La maljuna Frege lasis enskribi mian nomon en sian libron kaj deziris al mi profitan negocon. Sed mi baldaŭ rimarkis, ke oni ne povis multon fari per 1000 taleroj. Kion faras tio? Se la profito ne estas granda, ĝi tamen sufiĉas, pli bone labori por malmulta profito, ol esti sen laboro kaj profito. Mi tial elektis por mi iom da lano kaj iris, venigi mian monon. Tiam diris al mi la maljuna Frege: „Estas bone, ke vi venas, mi ne sciis, kie vi loĝas.“ Mi tion ĉi ne diris al li, ĉar mi loĝis en la sama gastejo kiel iam, kiam mi ankoraŭ estis migradanta metiisto. „Nu,“ diris S^{ro} Frege, „manĝu morgaŭ tagmeze ĉe mi, vi trovos grandan societeton.“ Mi ne sciis, kion respondi, kaj foriris!

Mi nun provis sciigi pri tio, kion oni devas fari je tia invito, kaj kion oni povas profiti. Oni diris al mi, ke estas kutimo, ke ĉiu granda komerca firmo invitas la rekomenditajn komercistojn por tagmanĝo, kaj ke la profito estas jena, ke oni devas pagi tiun ĉi amindaĵon per almenaŭ 1¹/₂ taleroj da trinkmonoj por la servistoj. Tio ĉi tute ne konvenis al mi. Mi kalkulis, ke al mi restus de 1000 taleroj nur 998¹/₂, kaj por tagmanĝo mi ne povis tiom elspezi. La proksiman tagmezon mi decidiĝis energie. Mi aĉetis al mi kolbaseton por dudek pfenigoj, kaj iom da pano, enpoŝigis tion kaj eliris el la urbpordego al la tielnomita „rozovalo“. Mia tagmanĝo estis baldaŭ preta. Mi sidiĝis sur benko kaj elprenis miajn manĝaĵojn. Mi distranĉis la kolbaseton en ses partoj kaj metis ilin antaŭ min: Jen, mi diris, mia supo, jen mia rostajo, jen mia legomo, jen miaj fiŝoj, kaj jen miaj fruktoj kaj salato. Mi ne kredis, ke mi havus pli multe en la urbo ĉe Frege, kaj ke ĝi gustumus pli delikate. Mi ĵus ek-

prenis la fruktojn (ili estis bonege preparitaj), kiam mi ekvidis sinjoron rajdantan sur belega ĉevalo. Li faras al si ankoraŭ iom da moviĝo antaŭ la manĝo, por ke ĝi gustumu al li pli bone, mi pensis. Mi deziris al li mian sanegan stomakon, mi ne bezonis lacigi ĉevalon, por povi manĝi kun apetito. Pli rapide, ol mi povas diri kaj pensi tion ĉi nun, la rajdanto atingis min, kaj — estis S^{ro} Frege mem. Pro timo la lasta peco defalis el mia mano, kaj la promenadanta hundo tuj ek-kaptis ĝin, mi rapide kunvolvis mian paperon kaj ne sciis, kiel helpi al mi.

„Ho, S^{ro} Keller,“ diris S^{ro} Frege, „kion vi faras? Ĉu vi opinias, ke vi ne ricevos sufiĉe multe por satiĝi ĉe mi?“

Kion respondi? Mi pensis: Diru la veron. Mi tial diris al li, ke mia situacio ne permesas al mi, doni du talerojn da trinkmono por unu tagmanĝo, kaj ke mi intencis, peti lian pardonon hodiaŭ vespere aŭ morgaŭ, ĉar mi ne venis.

Tiam li laŭtege ekridadis kaj respondis: „Ho, tion ĉi vi devos fari, aŭ mi ĉagreniĝos pri vi, mi atendas vin je la kvina, sed venu efektive. Bonan apetiton!“ kaj li forrajdis sur lia bruna ĉevalo. Mi tute ne sciis, kion fari, sed kiam alvenis la kvina, mi tamen iris al li.

Oni montris al mi lian skribejon, kaj li mem venis renkonten al mi, premis al mi la manon, gvidis min en apudan ĉambreton kaj diris al mi: „Kara S^{ro} Keller, vi havas krediton de 10000 taleroj ĉe mi, sed se vi bezonus la duoblan sumon, aŭ eble ankoraŭ pli multe, senĝene diru ĝin al mi.“

Mi respondis: „Vi eraras, mi nur posedas 1000 talerojn.“ Tiam li diris al mi: „Estas kaj restas tiel, kiel mi jam diris al vi, vi estas homo, kiu komprenas ŝpari, kaj hodiaŭ vespere mi petas vin manĝi tute sole kun mi kaj kun mia familio.“

Kaj tiel fariĝis la afero, kaj precipe plaĉis al mi, ke li ne rakontis la okazintaĵon al lia edzino kaj al liaj infanoj, ĝis kiam mi estis forvojaĝinta de Leipzig. Li certe pensis, ke ne estas agrable por mi, se oni ridus pri tiu eĉ bonkore.

Tiamaniere ebligis al mi per la kolbaseto, konstruigi la grandan drapfabrikon, kaj tiel longe kiel la maljuna Frege ankoraŭ vivis, mi manĝis vespere ĉe li, kiam mi estis en Leipzig kaj je la fino ni ĉiufoje manĝis kolbaseton.




Frederiko Preller.

Laŭ sciigoj de sinjorino Toni Preller.


Kiu vizitas en Dresdenu la reĝan operdomon aŭ la „Albertinum“ aŭ la mondfaman pentrajgalerion — kaj tion faros certe ĉiuj partoprenontaj de la kvara kongreso —, vidos en ĉiuj tri konstruaĵoj pentraĵojn de Frederiko Preller. Tial oni permesu kelkajn vortojn pri li.

Frederiko Preller estas la filo de la famekonata Odyssee-Preller kaj naskiĝis la unuan de septembro de la jaro 1838 en Weimar. Li estis la plej juna el tri filoj. La patro tiam estis malriĉa, tamen al la filoj mankis nenio. La patro faris ĉion por la infanoj; krom tio la pentristino Louise Seidler kaj la komandanto de la „Wartburg“, Bernharde de Arnswalde bone helpis la infanojn, precipe la plej junan. Sinjorino Seidler montris al Frederiko ofte la multajn arttrezorojn, kiujn ŝi estis alportinta



Intermontaĵo. Laŭ pentraĵo de Frederiko Preller.

el Italujo kaj vekis la intereson de la knabo por la pentrarto; Bernhardo de Arnswald ofte invitis lin en la faman „Wartburg“, kie Frederiko plezure restadis por viziti la belan ĉirkaŭaĵon, kiu tre ĝojigis lian koron. Oni instruis lin kun de Seebach kaj de Fritsch, kiuj poste estis universitataj profesoroj. La knabo bone lernis kaj amis la sciencojn. Granda estis la miro de la patro, kiam subite Frederiko sciigis lin, ke li volas elekti la profesion de pentristo. Ĉie kaj ĉiam li nun pentris; ofte oni trovis lin en la laborejo de la patro. „Li fariĝis artisto sen grandaj bataloj.“



Venteĝo sur la „Ostsee“. Laŭ pentraĵo de Frederiko Preller.

Pri la vivo kaj la verkoj de Frederiko Preller skribis bonan libron D^{ro} Max Jordan.*) Krom tio oni trovas bonajn sciigojn pri li en la verko: Hundert Jahre Deutsch-Römischer Landschaftsmalerei (Oesterheld & Co., Berlin W.).

Kiam Frederiko estis dekokjara, li komencis vojaĝi, unue en la Rhön, tiam kun siaj ĝepatroj kaj kelkaj amikoj Italujon, kie li restis de la jaro 1859 ĝis la jaro 1866. En tiuj ĉi jaroj

*) La libro aperis ĉe „Vereinigte Kunstanstalten, München-Kaufbeuren“.

li multe laboris kaj studadis. Ĉiutage li pentris. Nur kelkajn semajnojn li revenis Germanujon, por viziti sian patrineton, kiu mortis en la monato decembro de la jaro 1862. Frederiko nun fianĉiĝis, tiam li revojaĝis Italujon por daŭrigi la pentrajn studadojn.

Reveninte Germanujon li iris Dresdenon, kie li fondis sian hejmon, sed ĉiujare ankaŭ de Dresdeno li faris studekskursojn Italujon kaj al la „Rhön“. Baldaŭ li estis en urboj italaj, baldaŭ en belaj regionoj de Svisujo. Treeĝe li ŝatis la „Oetz“-valon kaj la „Gotthard“.

En la Ostsee kuŝas malgranda insulo nomata „Vilm“. Nur unu domo ekzistas sur la tuta insulo. En ĝi loĝas kaj regas la




La „Preller-angulo“ sur la insulo Vilm.

Laŭ pentraĵo de Frederiko Preller.


farmanto de la princo Putbus sinjoro Witte, kiu havas la rajton gastigi kaj regali fremdulojn, kaj tion li faras ĉiam tiamaniere, ke ĉiu, kiu vizitis la insuleton, ree vizitas ĝin. Multaj pentristoj ĉiujare venis kaj venas.

Tien ĉi venis ankaŭ Frederiko Preller en la jaro 1887. Multajn studaĵojn li tie pentris, de kiuj la legantoj vidas kelkajn en tiu ĉi numero. La arbaron kaj la maron, la boatojn kaj la fiŝistojn oni vidas rigardante la verkojn de tiu ĉi periodo. La naturo de la malgranda insulo Vilm ĝojigis lin tiamaniere ke li ĉiutage laboris entuziasme. Angulon de la insuleto oni nomas ankoraŭ hodiaŭ la „Prellerangulon“.



Sur la insulo Vilm. Laŭ pentraĵo de F. Preller.

En la jaro 1880 Preller fariĝis profesoro ĉe la reĝa artakademio kaj posteulo de Ludoviko Richter. Ho kia ĝojo por li! Nun li povis instrui. Sed li ne nur havis lernantojn, kiuj vizitis la oficialajn lecionojn, tute ne! Multaj venis libervole kaj volis lerni de la majstro en neoficialaj lecionoj, tiel multaj, ke Preller baldaŭ devis ŝanĝi la salonon por la instruado. Kaj dum la somero kia ĝojo por la lernantoj! Kune kun ili Preller forlasis la urbon kaj laboris kun ili en la „Dresdener Heide“, tio estas Dresdena arbaro, aŭ en la vilaĝetoj ĉirkaŭ la urbo. Dum la libertempo, precipe ĉe la tagmanĝo la majstro sidis inter la dis-



Boatoj.

Laŭ studaĵo de F. Preller.

ciploj kaj rakontis el sia vivo kaj pri siaj vojaĝoj. Ĉiam li estis afabla kaj gaja, sed li fariĝis serioza, se lernantoj pentris nenature.

Ne estas eble, nomi ĉiujn pentraĵojn kaj studaĵojn, kiujn verkis Frederiko Preller dum 41 jaroj. Oni trovas liston de ili en la libro de D^{ro} Jordan.

Murbildoj de Preller ornamas multajn ĉambrojn kaj ŝtuparejojn en domoj de saksaj eminentuloj kaj privatuloj, sed ankaŭ en publikaj konstruaĵoj, ekzemple la salonojn de la reĝa kastelo, de la „Albertinum“ kaj de la reĝa operdomo en Dresdeno. Belegaj vidaĵoj de Grimma, Eger, Tharandt kaj Emden ravigas la vizitantojn de la reĝa kastelo „Albrechtsburg“ en Meissen.


La plej grandan verkon de Preller oni vidas en la universitata domo de Leipzig. Ĝi havas longecon da 16 metroj kaj altecon da 9 metroj kaj montras Prometheus'on veniganten la fajron el ĉielo. Pri la multnombraj bildoj en la skulptura muzeo „Albertinum“ ni parolos je la fino de tiu ĉi artikolo.

De la stablaj bildoj de Preller la vizitontoj de la kongreso vidos unu de la plej belaj en la Dresdena pentrajgalerio. Krom tio posedas stablajn pentraĵojn de Preller la muzeoj en Leipzig, Weimar, Magdeburg kaj Breslaŭ, kaj multaj privataj personoj.

Sed ni ne devas forgesi, ke Frederiko Preller ankaŭ desegnis bildojn por belegaj libroj. Ni nur citas la belegan eldonon de la „Ilias“ kun dekdu bildoj de Preller. Kaj nun kelkajn vortojn pri lia vojaĝo Grekujon.


Dro Schramm.

(Daŭrigota.)



La reĝa saksa porcelan-manufakturo en Meissen.

Al ĉiuj fremduloj, pasantaj la Schloss-straton en Dreseno, kontraŭ la reĝa kastelo precipe unu granda komercejo rimarkiga, el kies fenestroj kontraŭlumas al ni malnovaj kaj novaj produktajoj de la reĝa saksa porcelan-manufakturo. Kiam ni eniros la vendejon mem — kaj ni povas fari ĝin sen aĉeta devigo, tiam afable ĉia informo estos donata al ni demandantaj,



Reĝa kastelo en Meissen.

kaj niaj okuloj plue povos satiĝi je la ĉarmaj, gustplene aranĝitaj, tre diversaj komercaĵoj, kiuj baldaŭ gajnos la korojn de la gevizitantoj.

La fabrikejo mem, la tutmonde konata „Königl. sächs. Porzellan-Manufaktur“, kiu liveras ĉi tiujn belajn aĵojn, troviĝas en Meissen, $\frac{1}{4}$ da horo malproksime de la tiea ĉefstacidomo, en la beleta Triebisch-valo. Ĝi enhavas teritorion da 6 hektaroj kaj nun okupas ĉirkaŭ 700 laboristojn. La Meissena porcelan-manufakturo estas la plej maljuna eŭropa porcelanfabriko kaj estis fondita en la jaro 1710 de la saksa princoelektisto Frederiko Aŭgusto la 1a, reĝo de Polujo. Ĉi tiu destinis la Albrechtsburg, t. e. la reĝa kastelo

en Meissen, kiel lokon de fabrikado. La direkta kaŭzo de la fondo estis la eltrovo de la porcelano per la alĥemiisto J. F. Boettger, ĉar la porcelanfabrikado jam de longa tempo estis konata ĉe la Ĥinoj kaj Japanoj, sed ne ankoraŭ ĉe la okcidentanoj. Boettger, kiu de la jaro 1701 troviĝis en Dresden en la servoj de la tiama reĝo, estis viro de ekscelenta genio kaj intelekto; li plibonigis la reĝajn fabrikojn kaj organizis novajn

industribranĉojn, ankaŭ promesis artefari oron. Kompreneble li ne povis plenumi tiun ĉi promeson, sed dum liaj multaj ĥemiaj eksperimentoj prosperis al li, eltrovi unue ruĝan kaj poste la belan malmolan porcelanon brilan kaj blankan.

La fabrikado fariĝis unue en Dresdono, kaj, de la 6^a de junio de la jaro 1710, pliĝrandmaniere komenciĝis en Meissen. Post kiam la unuaj malfacilaĵoj estis venkitaj, evoluciis, post la morto de Boettger en la jaro 1719, produktado teknike kaj arte progresanta kaj alta flortempo, precipe sub la direktado de la pentristo kaj ĥemi-




Antikva-Meissen. Triumfo de Galateo.

isto Hoerold kaj de la genia skulptartisto kaj modelisto Kaendler. Dum la estrado de Hoerold oni diferencigas du stilperiodojn: la unuan ekzakte imitantan la ĥinajn kaj japanajn modelojn (t. e. el japana dekoraĵo naskiĝis la „Zwiebelmuster“, nom. „bulba dekoro“) kaj la duan ŝanĝiĝantan al la barokstilo.

La silesaj militoj malhelpis la kreskadon de la manufakturo kaj haltigis la vendadon de ĝiaj komercaĵoj, krom tio dum la maltrankvilaj tempoj la instituto perdis multajn taŭĝajn laboristojn. En la jaro 1765 oni oficiĝis la modeliston M. V. Acier de Paris. Liaj

kreajoj ofte estas komparataj kun tiuj de Kaendler. La lasta artisto ĉiam estos la kreinto de la ĉarmaj Meissenaj rokoko-figuraĵoj, sed Acier estas la franca modelisto de la tempo de Ludoviko la XV^a; liaj multaj ŝafistaj kaj vilaĝaj scenoj, liaj figuraĵoj de dio Amoro argumentas ĝin. Ankoraŭ hodiaŭ liaj verkoj estas multdezirataj kaŭze de ilia delikateco kaj afabla humoro. Kun



Antikva - Meissen.

Sinjorino, en krinolino, kaj kavaliro kun komercisto kaj servisto.

Acier kaj precipe kun siaj sekvintoj dum la lastaj dek jaroj de la 18^a centjaro aliĝis la porcelanstilo kreita de Hoerold kaj Kaendler. Iom post iom la rokoko estis anstataŭata de la antikva arto, de la klasicismo. La rektaj linioj de la stilo de Ludoviko la XVI^a kaj de la „Empire“ forpuŝis la antaŭan stilon, sed ili ambaŭ malkonvenas al la porcelano. Tiu ĉi cirkonstanco kaj la ekfloro de la angla fajenca (Wedgwood) industrio, ankaŭ la malfavoraj politikaj konstelacioj kaŭzis la malkreskadon de la manufakturo ĉirkaŭ la jaro 1800. Dum ĉi tiu periodo la instituto estis direktata de

la konata grafo Markolini, kiu malgraŭ bonvolaj penadoj ne povis haltigi la repaŝadon. Nur post la jaro 1830, sub la direktado de la sekreta mina konsilano Kühn, en la Meissena manufakturo, ŝanĝo komenciĝis, unue rilate al la teknikaj kaj financaj, tiam post la jaro 1860, ankaŭ en la artaj aferoj. En la jaro 1830 la kortega instituto estis ŝanĝita je ŝtata fabriko. En la jaro 1865, post la disloko de la manufakturo el la Albrechtsburg en novan konstruaĵon en la valo de la rivereto Triebisch, dua granda flortempo komenciĝis. La fabrikaj profitoj pliiĝis. Okaze de la tutmondaj ekspozicioj la manufakturo montris ĝiajn kapablojn, kiuj alportis al ĝi financajn kaj artajn sukcesojn. Kiam, dum la lastaj dek jaroj de la pasinta centjaro, oni penadis krei novan, la nunan porcelan-stilon, tiam ankaŭ Meissen fervore partoprenis je la grandaj artaj progresoj. La sukceso unue montriĝis esence en la ĥemia-keramika fako, poste ankaŭ en la plastika branĉo kaj en la pentrarto per subglazurkoloroj. Hodiaŭ, sub la direktado de la sekreta komerca konsilano S^{ro} Gesell kaj de la supera mina konsilano S^{ro} D^{ro} Heintze, la instituto, kie la eŭropa porcelano estis eltrovita, sufiĉas ĉiujn postulojn, kiujn la evolucio de la moderna artmetio havigas al la plej nobla branĉo de la keramiko.

Estas neeble doni al la estimataj legantoj detalan raporton pri la tre interesa porcelanfabrikado, kiu apude similas al tiu de aliaj porcelanfabrikejoj. Tie ĉi nur tiom estos dirate, kiom estas necese por povi kompreni la postan teknikan kaj artan priskribon de la manufakturaj fabrikaĵoj.

D^{ro} Funk.

(Daŭrigota.)



Antikva - Meissen:
Virina pagodo.

Sanktaj lokoj.

La loko, kie bona homo restis,
Ĉi estas sankta, kaj jarcento poste
Resonas al la nepoj liaj vortoj. (Goethe.)


Ĉu vi jam estis en Svisujo, kara leganto? Ĉu vi vidis la lagon de la Kvar Kantonoj, la Mythenstein kun ĝia ĉapo, la glacipalacon de la Schreckhorn kaj la Jungfrau, de eterna tempo



Frederiko Schiller. Laŭ pentraĵo de Anton Graff.

en vualo? Ĉu vi ne sentis je ĉiu paŝo, ke Svisujo ne estas al vi fremda lando, ke io vivas en via koro, kiu vin aliĝas al tiu ĉi bela landeto? Subite vi ekscias la kaŭzon de tia sentado:

vi konas la bravajn gentojn, la nomojn, la ventegojn, la sonoriladon de la brutoj kaj eĉ la bovinon kun la rubando — — — vi ja legis „Wilhelm Tell“ de Schiller. La granda poeto neniam estis en Svisujo, li neniam vidis tion, kion li tiel bele priskribis en siaj verkoj. Li estis leginta la verkojn de homoj pli feliĉaj ol li, kiuj travojaĝis la landojn, al kiuj sia animo sopiris, la




Schiller en la Karla lernejo, leganta la „Rabistojn“.

fantazio anstataŭis la propran sperton, kaj li donis al ni la plej belan priskribon elpenseblan.

Kie do li estis, skribinte „La Rabistoj?“ Li kuŝis en lito en la „Karlschule“, (Karla lernejo) la kreaĵo de la duko Karl von Wuerttemberg, en lia kastelo „Solitude“ (Soleco). La dudekjara Schiller tute ne estis malsana, li estis devigata tion ŝajnigi, por trovi la tempon por la skribado de la tragedio. Plej granda kontrasto ne estas imaginebla — tie ĉi etiketo kaj sklava devigo — tie en la bohemiaj arbaroj homoj ebriaj per ideoj de libereco.

Kia kuraĝo do vivis en la koro de la juna Schiller! La poetoj estas privilegiuloj, kiuj elparolas tion, kiu kuŝas kaj vivas en la animoj de la aliaj homoj: ili estas la buŝo de la homaro. La poetojn trafas laŭdo kaj mallaŭdo, maltrankvila al ili estas la vivo.

Kiu deziras poeton kompreni,
En lian landon li devas enveni. *(Goethe.)*



La Domo de Koerner en Loschwitz.

Kiel ni vidis, la lando de la poeto ofte ne estas trovebla tie, kie li okaze vivas kaj loĝas. Schiller pasigis grandan parton de sia vivo en la urbetoj Weimar kaj Jena. Sed la lando de lia fantazio estis Francujo verkinte la „Jungfrau von Orleans“. Granda Britujo dum la kreado de „Marie Stuart“, kaj la varmege amata germana patrujo, kiam li verkis la grandan historian trilogion „Wallenstein“. Li fantazie vivis en Rusujo, skribinte la nefinitan verkon: „La falsa Demetrius“, la priskribado de tiu

malproksima lando prosperis al li mirinde. Eĉ Ĥinujo tiel estris kaj kaptis lian pensadon dum kaj post la verkado de „Turandot“, ke li revis vojaĝon al tiu ĉi preskaŭ ne alirebla lando, li efektive pasie deziris iam vojaĝi al Ĥinujo, tiu ĉi ideo lin multe okupadis dum la lasta jaro de sia mallonga vivo. En sia juneco Schiller pasigis du agrablajn jarojn en Loschwitz (Lošvic) apud



La Schiller-dometo en Loschwitz.

Dresden. Li tiam (1785) estis la gasto de sia amiko la konsilano C. G. Koerner, la patro de la poeto Theodor Koerner. En la modesta dometo, kiu estas kara memoraĵo por Loschwitz, la poeto travivis agrablan tempon, lia karaktero kaj vivtenado ricevis bonan influon en la gastema domo de la nobla familio de instruita eminentulo. Certe, „sinjoro Friedrich Schiller“ vivis en Loschwitz, li partoprenis al la familia vivado, li eĉ pasie enamiĝis kun juna fraŭlino, kiu lin akre seniluzioniĝis, sed kie estis

la poeto? La animo de la poeto vagadis en Hispanujo, en bela suda lando, li verkis la „Don Karlos“.

La ĉiutaga vivo kaj la okazintaĵoj de doma vivado oftege malhelpis la animan agadon de la verkisto. Bone konata estas ŝerca plendo pri tia malhelpaĵo:

Forflugas revo de feino!
 Adiaŭ bela vi princino!
 Diablo prenu versfaradon,
 Aŭdante ĉemizetlavadon.

La plej altaj ideoj ja plenigis la animon de la poeto, ideoj kiujn li semis en la korojn de la samtempuloj, pensoj, kies rikolto nin hodiaŭ estas benanta. — La du grandajn ideojn de sia vivo Schiller kunplektis kun la karakteroj de la tragedio Don Karlos: la amo je la patrujo kaj la sopiro je libereco de la spirito. Ke estu permesata al la homoj, vorte kaj skribe esprimi iliajn pensojn, tiu revo vivis en lia animo, la markizo Posa ĝin malkaŝe elparolas en la dramo Don Karlos.

Centjaro de tiam pasis, multaj de la deziroj de niaj antaŭuloj plenumiĝis, sed denove ni esperas, sopiras kaj celadas. Novaj ideoj nin vivigas kaj antaŭen puŝas, post centjaro ankaŭ niaj celoj certe estos atingitaj.


Marie Hankel.



Praha.

(Praga caput regni.)

La fondo de Praha falas en mitan epokon de bohema historio: sur ambaŭ bordoj de rivero Vltava (germ. Moldau) oni elkonstruis du fortajn kastelojn: Vyšehrad sur la dekstra kaj Praha sur la maldekstra. Laŭ malnova popola legendo fondis Libuše, filino de Krok, Praha'n en mezo de VIII. jarcento. Pri la deveno de Vyšehrad ni havas nenian precizan sciigon. Ambaŭ kasteloj estis tuj de komenco sidejo de bohemaj regantoj. Ĉirkaŭ la kasteloj formiĝis baldaŭ malgrandaj kolonioj — ĝermo de la urbo kaj antaŭurboj, kiuj poste ĉiam grandiĝadis sub la regado de la reĝoj, ĉar Praha havis tuj ĉiujn kondiĉojn por fariĝi centro de bohema regno kaj samtempe fokuso de bohema vivo kultura. Ne estas malproksima tempo, kiam la cirkonstancoj tiel ŝanĝiĝos, ke Praha sen malhelpo reokupos lokon al ĝi apartenantan inter aliaj grandurboj mezeŭropaj.



Reĝa kastelo de Hradčany.

I.

Praha, ĉefurbo de reĝno Bohemujo, apartenas rilate al pent-rinda situacio, al la plej belaj urboj en la mondo. Pro sia beleco kaj riĉeco je historiaj memoraĵoj ĝi meritas esti plej vizitata kaj ŝatata de fremdaj, precipe esperantistaj turistoj. Ĝen kelkaj el juĝoj esprimitaj de plej eminentaj homoj:

Goethe: Praha estas la plej multekosta perlo en la diademo de la urboj.

Alex. von Humboldt: De la plej belaj urboj de meza Eŭropo Praha okupas la unuan lokon.

William Ritter: Praha estas la plej valora libro de la historio kaj arĥitekturo.

Leroy-Beaulieu: Prave estas Praha nomata plej bela urbo de la mondo.

Viollet-le-Duc: Ĝi estas urbo bele grandioze konstruita, en stilo ĝis nun ankoraŭ mezepoka, kronita de akropolo, kiu efikas impreson de grandega gotika kastelo.

La urbo konsistas nun el ok kvartaloj: I. Staré Město (malnova urbo). II. Nové Město (nova urbo). III. Malá Strana. IV. Hradčany (kie estas reĝa kastelo). V. Josefov. VI. Vyšehrad. VII. Holešovice - Bubna (loko de nuna ekspozicio) kaj VIII. Libeň. Nombro de la loĝantoj estas 250.000. Antaŭurboj estas: Karlín, Žižkov (elp. Jižkov), Král. Vinohrady, Smíchov kaj Vršovice, Bubeneč, Košíře, Nusle-Pankrác, Michle. Kune kun tiuj ĉi urboj havas Praha 550.000 da loĝantoj. Laŭ nacieco vivas en Praha 93^o/_o da Bohemoj (sama 88^o/_o da katolikoj) kaj 7^o/_o da Germanoj. La urbo estas dividita je 22 paroĥejoj kun 58 preĝejoj katolikaj, 4 evangelianaj,



Preĝejo de
sankta Nikolao.

unu rusa kaj dek sinagogoj. Trans la rivero estas elkonstruitaj naŭ pontoj, kunigantaj la ĉefajn kvartalojn kaj antaŭurbojn. Praha estas sidejo de landa parlamento kaj de la superaj estraroj, de komandanto de VIII. arma korpuso, de ĉefepiskopo, landa komitato, de altaj kaj multenombraj mezaj kaj unuagradaj lernejoj, de akademio artista, de artindustria lernejo k. t. p.

Komerco kaj industrio de Praha estas post tiu de Wien la plej grava en tuta monarĥio aŭstria-hungara.




Pulva turo.

Praha estas sidejo de ses konsuloj de jenaj ŝtatoj: Belgujo, Francujo, Germanujo, Granda Britujo, Svisujo kaj Nordamerika Unio.

Inter multaj interesaj vidindaĵoj ni citu almenaŭ la plej gravajn: reĝa kastelo kun katedralo de sankta Vito, urba domo, ŝtona ponto de Karolo IV. kun statuoj kaj turoj, la pulva turo, preĝejo de Týn, Karlov kaj de st. Nikolao, monaĥejo de Strahov, Belvedere, malnova hebrea tombejo k. t. p.

Konsilojn al turistoj kaj informojn pli detalajn donas „Landa bohema ligo por akcelado de fremdula movado en reĝno Bohemujo“ (Praha, Josefské náměstí 5.) kaj konsulejo de Esperantista Klubo en Praha (s-o J. Vohnout, centra poŝta oficejo).



Ĉefa ekspozicia palaco.

II.

Por honorigi la sesdekan jaron de regado de Lia Imperiestra kaj reĝa Moŝto Francisko Josefo I., la distrikto de komerca kaj industria ĉambro en Praha organizas sub protektato de tronsekvanto Francisko Ferdinando jubilean ekspozicion de majo ĝis oktobro 1908. —

La ekspozicio okupas 400.000 m², ekspoziciaj konstruaĵoj 100.000 m².

La distrikto de komerca kaj industria ĉambro de Praha pagas 11 milionojn da kronoj de industriaj impostoj, t. e. duonon da tuta sumo el industriaj impostoj en Bohemujo kaj preskaŭ seponon da impostoj de tuta Aŭstrio.

En Praha kunvenos en jaro 1908 multaj naciaj kaj internaciaj kongresoj, precipe Internacia Kongreso de komercaj kaj industriaj ĉambroj kaj asocioj.

S^o Riedler, profesoro de tehniká lernejo en Berlin, diris: „La lasta landa ekspozicio en Praha (1891) prezentis koncerne la konstruadon de maŝinoj pli bonan kaj instruon rigardon ol granda halo por maŝinoj en Chicago.“

Kaj tamen la ekspozicio de maŝinoj en 1891 okupis sole 7.000 m², dume tiu en 1908 okupas pli multe ol 15.000 m².

La ekspozicio estas dividita en du partojn:

I. Parto ĝenerala:

Ekspozicio de la komerca kaj industria ĉambro. Subtenado de industrioj malgrandaj kaj artoj. Urbaj ekspozicioj. Komercaj kaj industriaj korporacioj. Instituto por bono de laboristoj kaj oficistoj (sociala politiko). Komerca kaj industria instruadoj. Financaj, kreditaj, asekuraj institutoj. Fervojoj, vaporŝipoj, pontoj kaj vojoj. Telegrafoj kaj telefonoj (La unua elektra senfonda stacio inter Praha kaj Karlovy Vary (Carlsbad) en Aŭstrio), Arĥitekturo, Inĝeniereco, Konstruado.

II. Parto industria:


En distrikto de komerca kaj industria ĉambro en Praha estas reprezentataj preskaŭ ĉiuj industriaj fakoj de aŭstria monarĥio, inter kiuj multaj per la plej eminentaj fabrikoj. Ekzemple en la distrikto estas: la plej granda sukerfabriko, la plej granda alkohol-distilejo en Aŭstrio, la dua plej granda bierfarejo, la plej granda rafinejo de mineralaj oleoj, la plej grandaj fabrikoj por konstruado de maŝinoj, de agrikulturaj maŝinoj, de vagonoj, la plej grandaj fabrikoj por fabrikado de vakstukoj, de tolaĵo, de ĉapeloj, k. t. p. el tuta monarĥio (aŭstrio-hungara).

* * *

III.

Bohema movado esperantista centriĝas en ĉefurbo Praha, kie estis fondita jam antaŭ ses jaroj unua memstara klubo bohema. Danke la viglan kaj senlacan laboron de ĉi tiu societo diskonigis Esperanto en landoj bohemaj tiom, ke ĝi trovas jam komprenon kaj akcepton en ĉiuj rangoj socialaj. En jaro 1907 fondis la societoj centran asocion sub titolo „Bohema Unio Esperantista“, kiu elektis kiel sia organo gazeton „Časopis Českých Esperantistů“. Tiu ĉi gazeto estas ne sole efika propagandilo de nia ideo inter Bohemoj, sed ĝiaj artikoloj faras ĝin bona in-

formilo de fremduloj pri la plej gravaj okazintajoj en bohema nacio. — Suprenomita Unio invitas ĉe okazo de nunjara jubilea ekspozicio kune kun „Esperantista Klubo en Praha“ ĉiujn samí-



Rudolfinum,
domo de belaj artoj kaj muzikarto.

deanojn, ke ili vizitu Bohemujon antaŭ la kongreso Dresdena. Praha plene meritas, ke la movado de turistoj direktadu al ĝi, ĉar ne ekzistas tie anguleto, kiu ne montrus fragmenton el historio de bohema popolo.

(Al vizitantoj fremdlandaj ni rekomendas turniĝi al iu el konsuloj de klubo, s-oj: Jan Vohnout, Praha III. 112. Lužická ul. — Ing. Jan Hofmann, Smíchov, Smetanova ul. 4. — Arch. C. Nebuška, Praha II. Myslíkova ul. 16. — E. Kühnl, Praha II. Dittrichova ul. 7. — Okazaj kunvenoj en kafejo „Union“ Ferdinandova tř.; samloke loĝejo de sekretario de klubo. La klubo kunsidas merkrede en restoracio „u Donátů“ Spálená ul. Al esperantistaj vizitantoj de Praha ni rekomendas uzadi ilustritajn poŝtkartojn kun teksto esperanta, kiujn eldonis Esperantista Klubo en Praha; prezo 6 hel. La kartoj estas aĉeteblaj ĉe sekretario aŭ en kancelario por informado de fremduloj: Josefské nám. — Samloke oni povas ricevi ilustritan esperantan gvidlibron tra Praha, eldonitan de „Bohema Unio Esperantista“ kaj de Časopis Českých Esperantistů“.)

Jvo.



El Esperantujo.

I. La familio Zamenhof.

Zamenhof! Por ni Esperantistoj tiu ĉi nomo enhavas tutan mondon de novaj sentoj. Ni ĉiuj, ni, kiuj havas la feliĉon koni persone la afablan modestan Doktoron „Esperanto“*) ne nur



Lazaro Ludoviko Zamenhof,
aŭtoro de la lingvo Esperanto.

*) D^{ro} Zamenhof (la familia skribmaniero estis Samenhof) eldonis siajn unuajn verkojn sub la pseŭdonimo „D^{ro} Esperanto“ kaj tiun ĉi nomon „Esperanto“ transdonis liaj disciploj al la nova „Lingvo Internacia“ mem.

admiras en li la genian eltrovinton de la Lingvo Internacia, de la hodiaŭ ĉiekonata, mondfama Esperanto, sed antaŭ ĉio ni ŝatas en D^{ro} Zamenhof la homon, al kiu natura korboneco, profundsentata amo je l' homaro kaj la plej intensa deziro, ke ĉiuj homoj fariĝu unu granda frataro, estis de l' unua juneco la gvidantaj steloj. Ne celo estis al Doktoro Zamenhof la nova helplingvo por gajni gloron kaj profitojn, ilo ĝi devis fariĝi por forigi miljarajn barojn, kiuj jam tiel ofte malhelpis la interkonsenton, la amikecon de l' diversaj homoj, eĉ de nacioj nur pro la diverseco de iliaj lingvoj. Unu lingvon, la gepatran, bezonu ĉiu por si mem, por la familiaj, la patrujaj rilatoj, kaj unu, la neŭtralan Esperanton, por la rilatoj kun la tuta mondo, la tuta homaro. Ke tiuj ĉi rilatoj estu amikaj, ke ili konduku al tutmonda gefrata amo, estas la arda deziro, kiu iras kvazaŭ kiel ruĝa fadeno tra la poezio, tra la paroladoj de l' Majstro. Tiu ĉi etika motivo, tiu spirito de l' Esperantismo donas propran belan ĉarmon al la himno „La Espero“ kaj trovas la plej noblan esprimon en la „Preĝo“, ambaŭ bone konataj de ĉiu Esperantisto. Ekbrilas la sama sento el la mallongaj notoj, kiujn Doktoro Zamenhof donis pri la origo de Esperanto kaj pri si mem en la „Deveno de Esperanto“:

„La ideo, al kies efektiviĝo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi — estas ridinde ĝin diri — en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis; mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi

Mi naskiĝis en Bjelostoko^{*)}, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: Rusoj, Poloj, Germanoj kaj Hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la

*) La 15^{an} de Decembro 1859.

strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj k. t. p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi „doloro pro la mondo“ ĉe la infano. Ĉar al mi ĉiam ŝajnis, ke la „grandaĝaj“ posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon“

Nun, se la Majstro hodiaŭ ne ankoraŭ povas konstati plenan plenumon de siaj deziroj kaj espero, de siaj sonĝoj de l' juneco pri eterna paco, li do povas esti kontenta je la ĝisnunaj rezultatoj, ĉar el la sennombraj semeroj, kiujn li mem, liaj disciploj kaj tiom da samideanoj semis kaj semas konstante, elkreskis potenca kverkarbo, vera arbego, kies radikoj forte ĝin tenas kaj kiun ventegoj ne plu povas mortskui aŭ pereigi.

Tamen ni ne intencas, skribi hodiaŭ plenan biografion de l' Majstro; ni bone scias, ke neniu estas pli kompetenta por tiu bela tasko, ol li, kaj neniu konas pli bone la historion de Esperanto, kiu estas plej intime, plej senpere kunligita kun la Majstro, ja kiu plenigas, kiel ni supre aŭdis, lian tutan vivon, ol la Majstro mem.

Kaj dum ni skribas tion ĉi, denove tute senintence ekbrilas antaŭ niaj okuloj plej klare kaj bele triumfaj tagoj el tiu ĉi historio, tagoj el la tempo de l' unua kongreso en Bulonjo sur Maro, kie la unuan fojon ni vidis per propraj okuloj, aŭdis per propraj oreloj, kiel senriproĉe funkciis la nova lingvo: Bulonjo, kie ni Esperantistoj aprobis fundamenton, sen kiu neniu konstruaĵo povas stari forte kaj kiu tamen permesas tiom da libereco por la plua konstruado, fundamenton, kies klasikan antaŭparolon ĉiu Esperantisto devus koni se eble parkere, ĉar ĝi montras la kielon de l' evolucio per vojo natura, senkonfuza kaj „sendanĝera“. — Ankaŭ ne mankis eksteraj honoroj al la Majstro. En Parizo la Ministro de l' Publika Edukado akceptis la Majstron kaj Francujo dediĉis al li la krucon de l'honoro.

Venis la Kongreso de Genevo. Ŝajnas al ni, ke en la tiea deklaro de la „neŭtraleco de Esperanto“ kuŝas „implicite“ la objektiva signo por tio, ke Esperanto forlasis la stadion de lingva provo kaj eniris tiun de l' pruvo, nome, ke ĝi de nun ne


plu estas projekto, sed efektive vera viva lingvo, uzebla por ĉiuj kaj ĉiaj celoj tute kiel ĉiu alia homa lingvo.

La saman pruvis en Kembriĝo la fondo de la Scienca Asocio, en Kembriĝo, kie Doktoro Zamenhof kaj lia afabla edzino estis akceptitaj kun sama entuziasmo kaj kun preskaŭ reĝaj honoroj, kutime nur montrataj al princoj.

Sed ni ne volas deflankiĝi. Ni ĝojas, ke ni povas prezenti jam en la unua numero de tiu ĉi gazeto la bildojn de l' Majstro, de la simpatia




Sinjorino Zamenhof.



Marko Zamenhof,
la patro de nia majstro.

familio Zamenhof, aldonante ankoraŭ nur kelkajn mallongajn notojn kaj „aforismojn“.

Estas kompreneble, ke Sinjorino Zamenhof jam kiel fianĉulino tutkore partoprenis je la idealaj penadoj de l' fianĉulo, sed ankaŭ kompreneble, ke la bopatro, S^{ro} S. Silbernik komence skuis la kapon pri la mondfeliĉigaj ideoj de l' bofilo, sed, ni ripetas, komence, ĉar poste li ne nur plene aprobis, sed akcelis ilin laŭ tuta povo. (Vidu: Lingvo Internacia de l' 15^a de Aprilo 1906 paĝo 246.) Tion rakontis al ni la Majstro en Nauheim' banejo,



Zofio

la infanoj de nia majstro.

Lidio

Adamo

kiun post la lacigoj de l' kongreso Gesinjoroj Zamenhof vizitis dum aŭtuno 1907.

Multe, plej multe dankas nia Majstro al sia patro, S^{ro} Marko Zamenhof*), kiu, mem filologo kaj instruisto, estis „tre ŝatata en sia lando, ricevis titolojn kaj ordenojn kaj fariĝis eĉ „ŝtata konsilanto“. La patro, al kiu laŭdire la Majstro similas en multaj rilatoj, donis la bonan konsilon al la filo, ke li ne tuj post la teoria ellaborado de la nova lingvo eliru kun ĝi, sed ke li ĝin antaŭe zorge provu praktike. Ni scias, kiel konsciencie D^{ro} Zamenhof, sekvis la konsilon (la 21^{an} de Julio 1887 aperis la unua Esperanta verketo) kaj ke li tiel trovis la ĝustan vojon al la hodiaŭa triumfo (C. Bourlet en „La Revuo“ de Februaro 1908 N^o 6 paĝo 293).

El la gefratoj de l' Majstro (kvar fratoj kaj tri fratinoj). D^{ro} Leono Zamenhof estas persone tre bone konata al la ĝisnunaj kongresintoj. Li estas fidela kunlaboranto de sia frato kaj ankaŭ kuracisto en Varsovio. Tiu amo al medicino ŝajnas fariĝi familia inklino, ĉar el la infanoj de Gesinjoroj Zamenhof la dudekjara filo S^{ro} Adamo Zamenhof kaj la deknaŭa filino Fraŭlino Zofio Zamenhof ankaŭ studas medicinon, kaj ni ne dubas, ke la

*) Mortis 70 jara la 29^{an} de Novembro 1907.

plej juna filino Fraŭlineto Lidio Zamenhof nur pro sia juneco (4 jara) ne sekvas jam hodiaŭ la ekzemplon de l' gefratoj.

Dum la Kongreso en Dresdno ni havos la grandan ĝojon saluti la amindan familion Zamenhof, Gesinjorojn Zamenhof kun la infanoj kaj S^{ron} D^{ron} Leono Zamenhof. Al ili ĉiuj plej koran bonvenon, al nia Majstro tamen la sinceran deziron, ke la venonta kongreso fariĝu nova sukcesplena triumfo por lia genia verko, por Esperanto. Vere, kun plej granda rajto la Majstro povus diri kaŭze de l'beno, kiun promesas donaci al homaro Esperanto kaj la Esperantismo:

„Exegi monumentum aere perennius“,
se li ne estus tro, multe tro modesta.

Ni Esperantistoj tamen scias, kiom da danko ni ŝuldas al S^{ro} D^{ro} Zamenhof, ni vidas en li veran bonfaranton de l' homaro kaj ŝatas lian noblan karakteron. Kiam ni kunvenos el la plej diversaj landoj en Dresdno, montrante denove la plenan taŭgecon de l' Zamenhofs lingvo, de l' Esperanto, ni povos diri kun Fichte (1808 Rede N^o 13): „Was dieselbe Sprache redet, das ist schon vor aller menschlichen Kunst vorher, durch die bloße Natur mit einer Menge von unsichtbaren Banden aneinander geknüpft“. Ne kiel fremduloj ni venos, sed kiel amikoj. Diverseco de l' lingvoj disigas la homojn, la sama lingvo unuigas ilin: Vivu Esperanto!

Bonvenon, koran bonvenon al la Majstro, al lia familio, al ĉiuj Esperantistoj, kiuj ja ankaŭ apartenas al unu sola, al la sama homa familio: Vivu la Esperantismo!

Vivu la Kongreso de Dresdno!

D^{ro} Mybs.





Bibliografio.*)

Sub la neĝo. Taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro de J. J. Porchat. Verko kronita de la Franca Akademio. Esperantigis J. Borel. Berlin S. (sen jaro) Esperanto Verlag Möller & Borel. 8^o. VIII kaj 144 paĝoj. Prezo 1 M.

J. Borel, al kiu la germanaj esperantistoj ŝuldas plej grandan dankon, kiu faris ageman propagandon por nia kara lingvo en la unuaj jaroj de tiu ĉi centjaro, donacas per tiu ĉi libreto al la Esperantistaro legolibron kun enhavo serioza kaj interesa, sed tamen simpla kaj facile komprenebla por ĉiuj komencantoj. Ni ne havas ĝis nun multajn tiajn legolibrojn kaj tial mi nur povas rekomendi la libreton al ĉiu komencanto. Legu la rakonton, kies literaturan kaj moralan valoron oficiale rekonis la Franca Akademio, en la internacia traduko kaj vi certe havos profiton.

S.

Kongresa Kantareto (kun notoj). Eldonita de la Kvaro por la Kvara. Dresden 1908. Presejo kaj eldonejo F. Emil Boden, Bismarckplatz 12. 26 paĝa. Prezo 0.50 M.

Por la kongresaj festoj kaj festetoj la Kvaro por la Kvara eldonis tiun ĉi kantareton elektinte el la riĉeco de la kantoj nur naŭ, nome: 1. La Espero, 2. La Vojo, 3. Al la Fratoj, 4. Kanto de Ligo, 5. Kanto de Studentoj, ĉiuj de nia majstro Zamenhof aŭ verkitaj aŭ tradukitaj; krom tio: 6. Paca kanto de la Esperantistoj de fervora Esperantisto germana, profesoro Sellin en Schwerin, 7. Venu Dresdenon! de agema ano Hugo Marx de la societo esperantista en Dresdeno, 8. Rozeto en herbejo laŭ traduko de profesoro Sellin, 9. La verda stelo, poemo de kvaranino Hankel. La Kvaro por la Kvara esperas, ke tiuj ĉi kantoj beligu la kvaran kongreson, sed esperas ankaŭ, ke oni kantu tiujn ĉi kantojn ĉie en la grupoj.

Germana Jarlibro Esperantista por 1908. Eldonita de la Germana Esperantista Societo. Ricevebla ĉe D^{ro} Schramm, Dresden, Ständehaus. 166 paĝa. Prezo 1 M.

Ĉar la „Tutmonda Jarlibro“ pro la ĝojiga kreskado de l' tutmonda Esperantistaro de nun ne plu povas doni la adresojn de ĉiuj Esperantistoj en la tuta mondo, estas necese por la apartaj landoj, eldoni mem specialan adresaron. Tial la Germana Esperantista Societo eldonis tiun ĉi libreton. Ĝi estas bona helpo por ĉiuj Esperantistoj vojaĝantoj Germanujon, ĉar nur en ĝi oni trovas la adresojn de la germanaj samideanoj. Tial kaj ĉar la profito de la libreto apartenas al la kongresa kaso, ĉiuj gesamideanoj aĉetu ĝin!

*) „La Bela Mondo“ raportas pri novaj verkoj, nur kiam la redakcio donace ricevis du ekzemplerojn. (Adreso: D^{ro} Schramm, Dresden-Ständehaus.)





***** Somero. *****



Laŭdu ni Dion, Li estas nia espero.

1. Laŭdu ni Dion, potencan la reĝon de l' tero.
Laŭdu do Lin, ĉar Li estas la vojo kaj vero.
Nun kantu ni
Gloron kaj dankon al Li.
Li estas nia espero.
2. Laŭdu ni Dion, ĉar ĉion li patre regadis
Tra la danĝeroj de l' vivo nin zorge gvidadis
Li gardos nin
Kiel Li faris jam ĝin.
Ĉu vi jam tion sentadis?
3. Laŭdu ni Dion, ĉar donis al ni Li sanecon
Kaj senŝancele konservis al ni fidelecon.
Ofte jam Li
Pruvis mirinde al ni
Lian senfinan bonecon.
4. Laŭdu ni Dion, ĉar benis Li nian laboron,
Sendis feliĉon al ni kaj pacigis la koron.
Pensu do vi
Kiel vi dankos al Li.
Kantu vi laŭdon kaj gloron.
5. Laŭdu ni Dion, Lin laŭdu la tuta homaro,
Laŭdu per preĝo kaj laŭdu per pia kantaro.
Dankon al Li
Kantu eterne do ni.
Laŭdu Lin, ho kristanaro.

(Hugo Marx, Dresden.)

Kongresimpresoj.

Tiuj, kiuj neniam ĉeestis esperantan kongreson, demandas sin maltrankvile, ĉu ili povos sin komprenigi, kiam ili kongrese interrilatiĝos kun ĉiunaciaj gesamideanoj; kaj tiu antaŭtimo estas ja tre komprenebla kaj tre pardoninda. Mi sentis tiun dubecan impreson kiel ĉiuj; kaj mi tre bone memoras, ke kiam okazis la neforgeseblaj Bulonjaj kongrestaĝoj mi ŝanceliĝis entrepreni la vojaĝon al la ne malpli neforgesebla kongresurbo, timante ke mi ne povos fari uzon el miaj malgrandaj konoj pri l' internacia lingvo. Mi ja demandis min kiamaniere alilanduloj, kiuj parolas lingvojn tiel malsimilajn unu de la alia sukcesus akcenti sammaniere nian karan Esperanton; kaj mi tremis pro timo pensante, ke mi eble rilatiĝus parole kun Angloj, Rusoj aŭ Japanoj, kies paroladetojn mi ne povus kompreni.

Miaj timoj baldaŭ ŝanĝiĝis en konfido, kiam mi estis farinta kelkajn paroleksperimentojn kaj mi tuj plezurege konstatis, ke mia maltrankvileco estis multe troa kaj ripozis nur sur fiktiva bazo.

De tiu tempo mi ĉeestis la Ĝenevan kaj la Kembriĝan kongresojn, kie mi parolis kun ĉiaj alilanduloj kaj mi nun estas tute konviktita, ke malgraŭ kelkaj negravaj malsimilaĵoj de elparolado, ĉiuj Esperantistoj de l' tero, kiuj konas sufiĉebo ne Esperanton, povas facile per ĝi ĉiam interkompreniĝi eksterordinaraĵo, kiun la belsoneco kaj facileparolebleco de l' Zamenhofa lingvo povas solaj klarigi, nekompreniblaĵo, kiu baldaŭ fariĝos komprenebla por ĉiuj, kiuj ne ankoraŭ parolinte kun fremduloj, ĉeestos la Dresdenan kongreson. Ĉiuj ŝanceliĝantoj venu en Germanujon; mi estas certa, ke ili reenlandiĝos entuziasmigitaj; same kiel mi, ili konvikiĝos pri la mirinda interkomprenibleco de Esperanto, kiun ili, pro tio, pli kaj pli, multe ŝatos por kiu ili pli kaj pli laboros. Kaj se estas ankoraŭ kelkaj gesamideanoj ne tute deciditaj ili atente legu la sekvantan okazintaĵon:

Ĝi okazis en la „Ĝeneva“ Kongreso la 30^{an} de Aŭgusto. Tiun tagon, ekskurso estis organizita sur la Lemano Lago. Sidante sur la ferdeko, mi komunikis miajn kongresimpresojn al

Anglo el „Liverpool“, kun kiu mi unuafoje parolis. Kiam ni estis pli bone konatiĝintaj unu kun la alia, mia kunparolanto petis de mi mian vizitkarton.

— Tre volonte, mi respondis, sed antaŭe, ĉu vi volus permesi, ke mi formulu al vi simplan demandon: divenu mian naciecon.

— Mi komprenas, diris la Anglo eletendante sian paperujon jam plenigitan je esperantistaj adresoj sur siajn genuojn; vi volas min trompi; sed mi jam konvikiĝis, ke vi estas Anglo.

— Nu, Sinjoro, jen mia karteto.

— Vere, vi estas Franco?

— Mi estas Franco.

— Nu, mi tion ne estus kredinta. Kaj li aldonis, metante senceremonie sian manon en la mian: la afero estas sengrava, ĉu ne? Vi estas Esperantisto kaj mi ankaŭ: ni do estas fratoj.

Albert Germaine-Troyes.




Frederiko Preller.

Laŭ sciigoj de sinjorino Toni Preller.

(Fino.)

En la jaro 1891 la saksa registaro komisiis Frederikon Preller, ornamu la ĉambregojn de la reĝa muzeo „Albertinum“




Corfu.

en Dresdno per bildoj de la plej famaj lokoj de Grekujo. Li tuj vojaĝis Grekujon kaj restis tie ses semajnojn, por pentri studaĵojn. La rezulton de tiu ĉi vojaĝo ni vidas en la „Albertinum“, kie nun troviĝas kvar grandaj murbildoj de li majstre pentritaj.

Granda estis la impreso de la famaj grekaj lokoj, tiel granda, ke la artisto malgraŭ la mallonga tempo de sia restado en Grekujo

povis fari multajn skizojn. La plej multajn el ili prezentas al ni la belega verko „Friedrich Preller d. J., Briefe und Studien aus Griechenland“ (leteroj kaj studaĵoj el Grekujo), kiun eldonis la presejo F. Emil Boden en Dresdeno. En ĝi ni vidas dektri bildojn de la greka lando kaj dudek ses beletajn, rapide faritajn krajon-skizojn, kiujn li pentris laŭ naturo.



Akropolis.

La naturo de Grekujo, kiun landon li jam de longe volis viziti, ravigis la artiston tiamaniere, ke eĉ malbela vetero ne malhelpis lin, desegni skizojn. Se oni legas la leterojn, kiujn Preller sendis al sia edzino kaj al siaj infanoj, — kaj tion oni povas fari, ĉar ili estas presitaj en la supredirita verko, — oni sentas la grandan impreson, kiun faris sur Preller la historiaj

lokoj. Li nur ĉiam tre bedaŭris, ke sia edzino kaj siaj infanoj ne estas kun li kaj ne povas admiri la belaĵojn de la bela greka lando. „Ne estas eble priskribi ĉiujn mirindaĵojn de la naturo de tiu ĉi rava regiono. Kion mi ofte deziregis, mi nun vidas: la famajn lokojn Corfu, Akropolis, Naŭplia, kaj Salerno, mi estas



Naŭplia.

tute entuziasmigita“, tion li skribis ne nur unu fojon, sed ofte al la amikoj kaj disciploj en la patrujo, kaj tiu ĉi entuziasmo ebligis al li, tiel bone plenumi la komision de la saksa registaro.

Multajn jarojn povis labori kaj krei Frederiko Preller en Dreseno, multajn lernantojn li vidis veni kaj foriri, multajn amikojn li akiris kaj kiam li mortis, oni vidis, kiel oni ŝatis lin

ĉie. Multaj nekrologoj aperis en konataj ĵurnaloj. En unu el ili ni legas la belajn vortojn:



Salerno.

„Preller postlasis multegajn bonajn verkojn de l' mano kaj de l' koro kaj ni amikoj kaj disĉiploj de la granda artisto ŝuldas al li multege.“



La reĝa saksa porcelan-manufakturo en Meissen.

(Fino).

La Meisena malmola porcelano, kiu ankaŭ en la nuna tempo posedas la samajn bonegajn konatajn proprecojn kiel dum la pasintaj tempoj, konsistas el la nebruligebla (nefandiĝanta) porcelantero (kaolino) kaj el la „feldspato“ fandiĝanta per alta temperaturo. La porcelano estas kovrata per kovrilo aŭ glazuro tre malmola kaj diafana, kiu konsistas ankaŭ el „kaolino“, krom tio el kalkŝtono kaj kvarco, t. e. fluigiloj, fandiĝantaj je tre altaj temperaturoj. La kruda „kaolino“ estas gajnata en la manu-



fakturaj minejoj, kiuj troviĝas en la saksaj vilaĝoj Seilitz kaj Sornzig. Per lavado ĝi estas purigata de sablo kaj de ŝtonoj: akvofluo forigas la pulvoran kaolinon en kolektkestojn, kie ĝi funde restas kiel tre maldika ŝlimo. Tiam per grandaj movkirliloj la purigita porcelantero en malseka stato estas kiel eble plej intime miksata kun muelitaj „feldspato“ kaj porcelanrestaĵoj, plue knedata per maŝinoj, tiamaniere ke fariĝas pastaĵo tre plastika kaj malseketa. La aplikebleco de ĉi tiu amaso por figuraĵoj, vazoj k. t. p. ĉefe dependas de la facila formebleco kaj de la plastikeco de la „kaolino“, kiu per tiuj ĉi proprecoj interesas nin Esperantistojn. Ĉar tiun ĉi proprecon posedas ne sole la „kaolino“, sed ankaŭ alia nobla materialo, nome la radikaro de nia fleksebla lingvo Esperanto, el kiu do facilege la plej diversaj vortoj povas esti formataj.



El la tiamaniere pretigita kruda porcelanmaso ĉiuj elpen-seblaj objektoj estas farataj. Multaj procesoj estas aplikotaj, por fabriki la amason da vazaroj kaj artobjektoj, por krei produktaĵojn perfektajn kaj neriproĉindajn. Plue, post la fasonigo, devas esti venkataj novaj malfaciloj, kaŭzataj de la varmeĝo necesa al la varmegigado de la porcelano. Rondajn kaj ovalajn objektojn oni faras sur la tornilo per ŝablonoj kaj gipsformoj. Figuraĵoj k. t. p. estas kopiataj kun helpo de gipsformoj; la tiamaniere faritaj objektoj poste devas zorgi esti retuŝataj, por ricevi la karakterizan esprimon, kiun la simpla kopilaboro neniam povas atingi. Kelkaj objektoj, precipe floroj, estas kreataj per senpera modelado en la maso mem. Post la finiĝo de ĉi tiuj laboroj la objektoj estas varmigataj ĝis ĉirkau 1000 C., en forno sube pri-skribota. Per tio ili akiras pli grandan firmecon kaj, kvankam ankoraŭ poraj, povas esti metataj en akvon, sen moligi. Ĝis tiu momento ĉiuj porcelanaĵoj sammaniere estas traktataj; de nune, lau la intencata dekoracio, kiu estas aligota al la porcelano, la fabrikado eniras malsamajn vojojn: 1. La porcelano direkte estas kovrata per glazuro kaj tiam varmegigata en granda forno ĝis la temperaturo de 1500°. Oni ricevas blankan glazuritan porcelanon, kiu nun, sur la glazuro, estas ornamata per nomemajlaj koloroj. 2. Antaŭ ol la porcelano estas kovrata per glazuro, unufoje varmigata ĝi estas surpentrata per subglazurkoloroj aŭ grandfajraj koloroj; ekz. la „Zwiebelmuster“ — bluiĝaĵo estas subglazurkoloro. Ankaŭ la fabrikmarko subglazure estas aligata sur la malsupra flanko de la objektoj. Ĉe tiu ĉi dekoracia maniero do post la surpentrado la porcelanaĵoj estas glazurataj; dum la sekvanta varmigado en tre alta temperaturo la koloroj unuigas kun la glazuro kaj tiamaniere fariĝas nedetruiblaj. 3. La porcelano estas bruligata ne estante glazurita: oni ricevas la blankan biskvitporcelanon. Kelkaj plastikaĵoj kaj bustoj tiamaniere estas farataj. Ili similas al la marmorfiguraĵoj.

La objektoj sub 1. kaj 2. do estas glazurataj, t. e. unu momenton metataj en akvon, kiu enhavas la subtile muelitan glazuron lakte suspenditan. La porcelano kovriĝas per maldika kaj egala glazurtavolo, precize konforme al la plastikaj formoj.

Nur per la varmigado en la grandaj fornoj la objektoj akceptas ĉiujn proprecojn karakterizajn de la porcelano. Antaŭ tiu ĉi

proceso ili estas enmetataj en kapsulojn el nefandiĝanta argilo, por protekti ilin kontraŭ malpurigo kaj difekto per fungazoj kaj per flugcindro. La fornoj de la Meisena manufakturo estas grandaj cilindraj fornoj trietaĝaj. Ili estas varmigataj per brunkarbo. La plej alta temperaturo — ekstrema blankardo — naskiĝas en la suba etaĝo; en la meza etaĝo la kruda, nove produktita porcelano, ĝis 1000^o, kaj en la supera etaĝo la kapsuloj kaj aliaj argilaĵoj estas varmigataj. Kiam la proceso estas finata, tiam, post malrapida malvarmigo, la objektoj estas klasigitaj. Oni diferencigas senmankaĵon aŭ „unuan elekton“, difektaĵon aŭ „duan elekton“ kaj krevitaĵon.

La porcelano surpentrita sub la glazuro nun estas preta komercaĵo. La blanka porcelano ankoraŭ estas dekoraciata per pentrado sur la glazuro. Por ĉi tiu celo la pentristoj aplikas metalajn kolorojn, nome emajl- aŭ mufelkolorojn, kiuj estas pastigitaj per terebintoleo kaj surmetataj per la peniko. Ĉiuj koloroj estas farataj en la ĥemia laborejo de la manufakturo mem. En mufeloj, t. e. grandaj ŝamotkestoĵoj enmuntitaj en specialaj fornoj, apud ĉirkaŭ 950^o C. la koloroj fandiĝas sur la glazuro. Krom tio la porcelano ofte estas ornamata per orumaĵo, kiu sammaniere estas surfandiĝata en la mufelo. — La nombro de la emajlkoloroj estas tre granda kaj entenas preskaŭ ĉiujn nuancojn de la paletro. La brilo kaj vera mieno de la koloroj nur aperas post la surfandiĝo, kian malfacilon la pentristo zorgeme devas atenti. La surglazurdekoracio povas esti tre diversa: oni diferencigas figur-, florpentradon, dekoracian pentradon por figuraĵoj kaj ornamvazaĵoj. Ĉiu speco povas esti farata en pli simpla aŭ pli luksa maniero. Kelkaj centoj da pentristoj, viroj kaj virinoj, estas okupataj en la manufakturo; inter ili troviĝas granda nombro da artistoj akademie instruitaj.

La porcelano, tia aŭ alia maniere perfektigita, estas aŭ ĉiutaĝa uzaĵo aŭ ornama kaj luksa porcelano; plie multe da porcelanaĵo estas fabrikata por ĥemiaj celoj, por la fiziko, elektrotekniko kaj por aliaj teknikaj branĉoj. Ankaŭ arte pentritaj kaheloj, por la vestado de muroj k. t. p., estas fabrikataj; pri la lasta apliko poste iom estos dirata.

Ĉiuj produktaĵoj direkte estas liverataj de la manufakturo mem kaj povas esti aĉetataj en la ĉefmagazeno de la fabriko



Fürstenzug.



en Meissen, aŭ oni povas aĉeti ilin en la manufakturaj komercejoj en Dresden kaj Leipzig.

Ĉar la nombro de la oferataj objektoj estas tre granda, la elekto ofte malfaciliĝas al la aĉetantoj. Tial mallonga resumo nun estos donata pri la komercaĵoj de la manufakturo, kiuj hodiaŭ estas fabrikataj. Rilate al la artaj principoj la manufakturo nun laboradas en du tute disigitaj apartaĵoj: Unuflanke la verkoj de la pasintaj artistoj de la 18^a centjaro estas rekreataj kiel eble plej ekzakte imitataj laŭ la konservitaj modeloj; aliflanke modernaj porcelanobjektoj estas kreataj.

Pri la nomo „Antikva Meissen“ precipe la multaj rokoko-figuraĵoj kaj — figuretaĵoj estas konataj: „la ŝafistoj kaj ŝafistinoj, la honesta metiistaro, la soldatoj kaj ĉasistoj, la muzikistoj kaj birdkomercistoj, la figuroj de la itala komedio, la elegantaj kavaliroj kaj koketaj sinjorinoj de la korteganaro, la Ĥinoj, Turkoj kaj Poloj, la Negroj kun la strutplumoj, kaj ne laste la pagodoj kun la daŭre ŝancelantaj kapoj, tuta malgranda mondo aparte. Inter ili vivas, ŝercas kaj amas la gaja ĥoro de la olimpiaj dioj. Precipe la fripona dio Amoro humorplene estas prezentata, kiel li amuze rekudras kaj reforĝas la korojn. Centmaniere formitan kaj vestitan ni ekvidas la ruzan knabon. Ankaŭ la amoro inter la homoj mem estas prezentata. Jen la ŝafisto kisas la ŝafistinon, jen la kavaliro ĉirkaŭprenos la gracian sinjorinon, malgraŭ ŝia vasta krinolino, k. t. p.“ En la 18^a centjaro ĉiuj tiuj ĉi figuraĵoj kaj grupoj servis kiel dekoracio de la ŝranketoj, speguloj kaj ĉefe de la festa tablego, sur kiu ili gustplene estis dislokataj ĉirkaŭ la fruktoj kaj kandelingoj. Ĉar jam tiam la artistoj de la manufakturo kreis pompajn manĝilarojn, kun belaj kaj riĉaj ornamaĵoj, ankaŭ beletajn matenmanĝ-, kafo- kaj teovazarojn, kun ĉiu alaĵo, kiel tranĉilbanketo, salujo, tabla sonorileto. Al ĉi tiuj vazaroj ankoraŭ aliĝis nombrego da diversspecaj aliaj objektoj: etaĝeraroj, horloĝoj, spegulkadroj, bombonujoj, pipkapetoj, ombrepreniloj, parfumujoj kaj multaj tiaj „galantaj“ artikoloj.

En la formoj de la rokoko ĉiu severa linio estas evitata; ili nur aperas graciaj, flekseblaj kaj afablaj. Kun granda amoro oni aplikas florojn por dekoracio, ĉe kiuj helaj nuancoj estas preferataj kaj, kun la milda blankaĵo de la porcelano, donacas al ĉio serenajn humorojn. Ankaŭ la manĝilaroj ofte estas sur-




penstrataj per floroj; precipe la Meisena „disŝutataj floretoj“ estas konataj. Krom la florpenstrado esence la prezentado de pejzaĝoj kaj figuraj scenoj evoluciis, la lastaj elprenitaj el la bestaro, la ĉaso, la milito. La multevaloraj kaj tamen plej multe aĉetitaj estas la multkoloraj kaj diversformitaj scenoj el la kamparaj ludoj de la nobla societo: la „genre Watteau.“ Antaŭ la surpenstrado per bildoj oni ofte supertegis la blankan porcelanon per unukolora fundo. Precipe la intensa „reĝblua“ fundo, samtempe kun oraoj, estis kaj hodiaŭ ankoraŭ estas tre estimata kaŭze de ĝia nobla mieno. La randoj de la vazaroj ofte estis ornamataj per plataj reliefdekoracioj, inter kiuj Ozier, Neubrandenstein kaj Marseille estas la plej konataj.

Ankaŭ la antikvaj hindaj, ĥinaj kaj japanaj penstraroj hodiaŭ ankoraŭ tre multe estas farataj, tute laŭ la antikva teknika maniero; tio estas ebligata precipe per la eminentaj laboroj de la fabriklaborejestro, mina konsilanto S^{ro} D^{ro} Förster, al kiu prosperis ekzakte tiel reeltrovi la antaŭe uzitajn kuprokolorojn, kiel ili estis aplikitaj en la 18^a centjaro, tiamaniere ke hodiaŭ oni povas atingi la samajn efektojn kiel en pasintaj artperiodoj de la manufakturo. Tiuj ĉi kreaĵoj precipe estas estimataj de konantoj kaj kolektantoj.

La Meisena Porcelan-Manufakturo ĉiam fabrikados la produktarojn de ĉi tiu iama flortempo; ĉar ili kompreneble ankoraŭ ĉiam ekscitas la raven de la publiko.

Tute alian aspekton vidiĝas la nunaj modernaj verkoj de la instituto. Ili enhavas ĉiajn elpenseblajn modernajn luksajn kaj uzajn porcelanarojn. La modeloj de la novmodaj porcelanaroj respondas al tute aliaj artaj kaj keramikaj principoj. Ni dudekcentjaranoj vivas en tute malsamaj tempoj kaj deziras tute malsaman hejmon kaj loĝaron, aliajn uzarojn kaj ornamarojn ol la popolo antaŭ 150 jaroj. Vera, laŭcela kaj laŭmateriala, simpla kaj tamen nobla devas esti ĉio ĉirkaŭanta nin. La celo devas krei la formojn, la bezono je beleco diversigos ilin; al la plastika elemento aliĝas la kolorplena ornamaro. Samtempe la penstrata dekoracio devas alfleksiĝi al la formoj kaj obei al la leĝoj de laŭceleco kaj estetika vereco de materialo. Konforme al ĉi tiuj postuloj, kiel en la tuta artmetio, tiel ankaŭ en la porcelanfabrikado plene nova direkto, nova porcelanstilo fariĝis, kiun multaj artistoj kaj ĥemiistoj merite kreis kaj disvolvis.



Antikva Meissen:
Pompa vazo, ornamata per reliefflorajo, de Kaendler.

De ĉirkaŭ dek jaroj ankaŭ la Meisena manufakturo fervore kaj sukcese laboras en tiu ĉi rilato. Plej multe da ĝiaj verkoj estis farataj de la manufakturaj artistoj mem. La nunaj estroj de la artaj branĉoj estas la skulptartisto S^{ro} Prof. Hösel kaj la pentrartisto S^{ro} Grust. La novaj homaj kaj bestaj figuraĵoj de la instituto montras kiel treege ebla estas porcelano; prezenti la flekseblecon kaj moveblecon karakterizan al ia vivanta kreaturo. Ĉi tiu naturalista arta prezentado esence estas helpata per la majstra pentrado de la figuraĵoj per subglazurkoloroj. Ĉar la subglazur-aŭ grandfajraj koloroj unuiĝas dum la varmigado kun la porcelanmaso kaj kun la glazuro al unu tuto, kaj tiam ili aperas al la homa okulo iom disnaĝantaj kaj antaŭen lumetas kvazaŭ sub diafana haŭto. Ili lasas al la perfektigitaj produktaĵoj la subtilecon kaj delikatecon de la porcelano kaj montriĝas kiel parto de la objekto mem. Fidele sekvante la tradicion, la Meisena manufakturo klopodas plimultigi sian subglazurkoloraron, plifortigi la nuancojn de sia paletro, efiki per delikataj konturoj kaj desegnoj, per kio ĝi diferencas de aliaj modernaj fabrikoj, precipe de Kopenhagen, kiu preferas la malfortajn, palajn nuancojn. La artistoj de tiu ĉi branĉo same laboras kun granda kompreno, kvankam eĉ tiu ĉi pentra tekniko enhavas la plej grandajn malfacilojn. Sed ne nur por la ornamo de figuraĵoj oni uzas la pentradon per grandfajraj koloroj, sed ankaŭ por la dekoracio de multaj aliaj ornamaĵoj kaj uzajoj, ekz. vazoj, platoj, teleroj, ŝeletoj kaj ŝelegoj, kiuj estas surpentrataj per pejzaĝoj, insektoj, floraj kaj aliaj motivoj. — Kelkaj novaj (ĉefe homaj) figuraĵoj estas surpentrataj per emajlkoloroj, gustplene kaj kun granda lerteco.

Dum la lasta tempo Meissen ankaŭ kreis novajn modelojn de manĝvazaroj, ekz. „arniko“ de R. Hentschel, „glicinio“ de O. Voigt, „noktviolo“ kaj „primolo“ de B. Barth. Inter la plej kreemaj kaj plej sukcesplenaj artistoj de la instituto ni citas: Walther (bestfiguraĵoj), K. Hentschel (mort. 1907; virinaj figuraĵoj kaj precipe ĉarmetaj infanaj grupoj), Eichler (la modelisto de la novaj „Parizaninoj“), Pilz (en Loschwitz; liveris bestfiguraĵojn kaj—grupojn). Diligenta kaj gustplena subglazurpentristo estas O. Voigt, de kiu devenas multaj modeloj por vazoj kaj ŝeloj, same la sentema Frlino. M. Hoest, plue R. Hentschel, kiu nun speciale laboras en pejzaĝpentrado, fine en la lasta tempo

B. Barth k. a. Tre lertan kaj multeflanke instruitan artiston posedas la manufakturo en la persono de M. Wiegand, kiu elpensis multajn dekoraciajn modelojn poste tradukitajn sur porcelano de aliaj pentristoj. Samtempe S^{ro} Wiegand estas tre bona modelisto, dotata de viva humoro kelkfoje proksimiĝanta al grotesko. Tria laborteritorio de ĉi tiu artisto montras lian talenton rilate al la dekoracio de pli grandaj supraĵoj, per la pentrado sur kaheloj, faritaj de malmola porcelano, per du aŭ pli multe da grand-fajraj koloroj.

Ankaŭ rilate al tiu ĉi tute nova fako la manufakturo povas konstati tre belajn sukcesojn: Alvenante en la Dresena ĉefstacidomo kaj enirante la duaklasan atendejon, la fremdulo ekvidos grandajn pentraĵojn sur porcelankaheloj, aligitajn al ĉiuj kvar muroj de la salono. Tiuj ĉi bildoj prezentas urbaspektojn de la reĝolando Saksujo, pentritajn en blua subglazurkoloro kaj ĉirkaŭgirlanditajn de frukt- kaj florpenetraĵoj en brunruĝa kolornuanco. Sed ne nur al malekstera ornamo de salonoj konveniĝas porcelanplataĵoj, ankaŭ al la arta dekoracio de eksterflankoj de domoj, de tutaj fasadoj, de monumentoj, de tomboj k. t. p. Ĉar kaheloj, fabrikitaj el malmola porcelano varmegiĝata ĉe grandega temperaturo, estas tute resistemaj kontraŭ nia norda klimato, tiamaniere ke ankaŭ en niaj malpli favoraj regionoj novaj ŝanĉoj malfermiĝas al la apliko de keramika eksterornamo, kiun hodiaŭ la arĥitekturistoj amegas. Ĉar pentraĵoj, konsistantaj el glazmosaikoj, fajenc-aŭ majolikkaheloj, kiujn ofte oni povas ekvidi sur domoj en Italujo kaj aliaj sudlandoj, fine ĉiam estos detruataj de la norda klimato kaj de la urbega atmosfero. Laŭ ĉi tiuj riprenoj kaj laŭ la ideoj kaj planoj de S^{ro} D^{ro} Heintze, en 1905, en Dreseno la revivigo de granda pentraĵo estis efektiviĝata de la porcelanfabrikado. Tiu ĉi pentraĵo, nomita „Fürstenzug“, prezentas la historion de la saksa Wettina princaro kaj troviĝas ĉe la reĝa kastelo, en la Augustustrato. En 1876, ĝi estis kreita per sgrafitotekniko de Prof. Walter, sed ne estis kontraŭstarinta al la atmosfera korosio. En 1907 la nova pentraĵo, konsistanta el kvadrataj porcelanplataĵoj surpentritaj de artistoj de la manufakturo, estis realligata kaj nun estas la tutmonda plej granda pentraĵo, havanta longecon da 100 m kaj altecon da 10 m. La artikoj de la kaheloj estis kunigataj per polurado, kaj la kaheloj mem estis aligitaj al la

muro per cemento. Oni nur uzis flavajn kaj nigrajn kolorojn, ekzakte konforme al la originala pentraĵo. Antaŭ la varmigado, la koloroj ne estis kovrataj per glazuro, kies brilo sur tia granda spaco nur ĝenus la okulojn de la pririgardantoj. La pentraĵo faras imponan impreson kaj argumentas precipe la grandan teknan eblon de la manufakturo.



Antikva Meissen:
Kavaliro kun hundo.

fakturo estas je la alteco de ĝia tradicia kapableco, kaj ili eble ekscitos la intereson de la Esperantistoj vizitontaj Dresdenon. Multaj kongresantoj supozeble pririgardos la Dresdenan komercejon de la manufakturo, aŭ, okaze de la projektata ekskurso al Meissen, la fabrikon mem. Tiam certe multoj gesinjoroj forprenos kun si tiun ĉi aŭ alian produktaĵon de la manufakturo, kva-zaŭ memoraĵon pri ĝajaj horoj pasigitaj en Dresdeno kajen Meissen.


Dro Funk.

Alia, malpli granda, pentraĵo konsistanta el porcelanplataĵoj, simila maniere farita, troviĝas ĉe la antaŭa eksterflanko de la ĝimnastikejo de la nova Meisena realĝimnazio. Tiu ĉi porcelanbildo estis kreita de la supere nomita artisto S^{ro} Wiegand, kiu ankoraŭ pentris aliajn tiajn pentraĵojn, same neglazuritajn, sed multekolorajn. Ili majstre estas farataj kaj jam estis elmetataj en kelkaj germanaj urbegoj. Oni esperas, ke la arĥitekturistoj baldaŭ uzos tiun ĉi novan metodon por eksterdekoracio.

La supraj traktaĵoj espereble montras, ke hodiaŭ ankoraŭ la Meisena porcelanmanu-

Saksa Svisujo.

Estas neniam rekomendinde, elekti fanfaronajn nomojn por la belaĵoj de ia distrikto. La loka patriotismo tion amas, ĝi ofte malŝpare laŭdegas la hejman pejzaĝon. Tian riproĉon la esprimo „Saksa Svisujo“ ne meritigas, kvankam ĝi anstataŭas la simplan nomon de „Sabloŝtona Montaro de la Elbo“. Certe, neĝe kovritajn ŝtongigantojn oni ne trovas en la Saksa Svisujo, kontraŭe, ĝi tute ne havas alpinan karakteron. Tamen la nomo



Elbvalo ĉe Mittelgrund.


estas rajtigita, la fremda vizitanto neniam moke kaj ridetante forlasas la interesajn regionojn de la Saksa Svisujo.

La tempoj pasis, kiam oni senpense kaj infane ĝuis la nekutiman aspekton de surprizaj naturaĵoj, kiam oni eble atente aŭskultis ian malsaĝan fabelon pri diabla deveno de la naturaj fenomenoj. Nia okulo nun ĉie serĉas la kialon. Ni konas nun la mirindan sed miraklan forton de la akvo.

El la ĉielo ĝi venas,
Al ĉielo ĝi iras,
Kaj ree malsupren
Teren ĝi falas,
Eterne ŝanĝante.


Pure kaj klare la guto de la pluvo falas teren, tie ĉi en-sorbas salon kaj kalkon, ĝi dismordetas kaj disigas la ŝtonaron. En antikva tempo unu granda ŝtona plataĵo kovris grandan parton de nia lando. Dum neimagineble longa tempo sennombraj fluetaĵoj ellavis la nunajn formojn de la Elba Montaro. Bona hazardo montras tiun ĉi devenon en la nomoj Königstein (Reĝa Ŝtono), Lilienstein (Lilia Ŝtono), ktp. Ili estas grandegaj ŝtonoj kun ebenaĵoj (Ebenheit), kie nun kuŝas kasteloj aŭ vilaĝoj.

Vaporŝipe ni atingis Wehlen, beleta malgranda urbo ĉe la Elbo. Ni supreniras la „Basteifelsen“ (Bastej-Ŝtonego), havante



Urbo Königstein kaj la Lilienstein.

sian nomon de la ŝajna fortika konstruado, kiu efektive nur estas formado de akvaj fortoj. Ni alproksimiĝas al la rando de la ebenaĵo, ŝirmita per fera barilo kaj nun ni ĝuas la belegan perspektivon. Jen la montoj jam nomitaj, la famaj larĝaj „Ŝtonoj“. La plej rimarkinda estas la „Königstein“. Ĝia izola situacio ĝin igis taŭga je milita fortikigo. Sed ĝi ne plu povas kontraŭstari al la nunaj pafilegoj, tial la fortikaĵo havas humanan pacan destinon, ĝi estas resanigejo por invalidoj. La aresto en tiu ĉi fortikaĵo do certe ne malhelpas la sanon de la politikaj kulpuloj, ĉar la aero tie ĉi estas pura kaj refreŝiga.



Bastej - Ŝtonego.


la diversaj kongresoj vizitante Dresdenon, neniam preterlasas la okazon, viziti tiun ĉi faman lokon.

Kiu havas tempon, certe celados al la eniro de la interesaj kaj iom danĝeraj valetoj kaj fendoj (Gründe). Precipe la „Schrammsteine“ (Ŝramŝtonoj) estas tre rimarkindaj, same kiel la „Schwansteine“ (Ŝvanŝtonoj), ili bonege montras la apartan karakteron de tiu ĉi ŝtonaro.

Feliĉe la kavoj kaj la intermontaĵoj nenie estas nudaj. Ili ja estas malsekaj, la bonfarantaj akvaĵoj ĉie

Kontraŭe de la „Königstein“ ni vidas la „Lilienstein“, la dunaskitan fraton de la Königstein. Certe, iam ili estis unuigitaj, nun la Elbo pace kaj trankvile fluas inter ili, ĝi tute ne ŝajnas kulpa je la disiĝo. Ĉi estas bela argenta rubando, trafluanta sian vastan valon, inter vilaĝoj kaj urbetoj, kampoj kaj herbejoj. Longan tempon ni staras sur la „Basteifelsen“ por ĝui la belan aspekton.


Ĝi estas vera internacia trafpunkto, ĉar tie ĉi renkontas la fremduloj de ĉiuj nacioj. Precipe la anoj de




La Ŝvanŝtono.

preparas la fundon por plantoj. Pinioj, filikoj, multkoloraj muskoj ĉie ornamas la profundaĵojn. Malsuprenrigardante oni ofte ĝuas tian agrablan vidiĝon de verdaj herboj kaj kreskaĵoj, ke oni poste en sonĝo aŭ meditado ĝin fantazie revidas.

La naturo tie ĉi havas altan, sed neniam severan karakteron, certa moleco moderigas la krudecon de la deklivoj kaj fendoj. Sportantoj certe volonte suprenrampos tra la malvastaj fendoj. Multaj interesaj nomoj rakontas el iama tempo, ili havas aŭ militan aŭ fabelan




Amselgrund. Merla Valo.



La Barbarino.

sencon. La strangaj formoj de la izolaj kolonoj precipe instigas la homan fantazion, diversajn fabelojn oni rakontas de la „Barbarino“. La scienculo ilin ridetante aŭskultas, sed li serĉas la devenon de la fenomeno. Jen la klariga hipotezo: ia malmola ŝtono kuŝante sur la ebenaĵo kontraŭstaris al la disigado de la akvoj, ĝi ŝirmis la fundon, sur kiu ĝi estis kuŝanta. La senĉese fluetantaj akvojom post iom forigis la ĉirkaŭantajn partiojn, ili kvazaŭ skulptis la kolonojn. Multaj el ili jam nun fiere portas bazaltan aŭ granitan kronon.

Sed ni revenas al la Bastej per la Bastejponto. Naturo konstruis tiun ĉi ponton, homa arto kaj amo por la beleco de la fenomeno ebligis la sekuran trairon. Ni ne forgesu la noblan viron, kies animo unue sentis la bonfaran, amikan influon de la



La Bastejponto. (Basteibrücke.)

naturon: la pastro Göttinger. Memora tavolo nin rakontas de lia naturama agado.

En la nuna tempo ni ja ne plu timas la naturon, ni ankaŭ ne rigardas ĝin indiferece. Ni sentas la parencecon de la homo kun lia patrino, kun nia tero. La Saksa Svisujo estas unu el ĝiaj plej belaj lokoj.

Marie Hankel.



Internaciaj respondkuponoj.

„La belan gvidlibron de la esperantista vilaĝo „Weisser Hirsch“ oni ricevas senpage, se oni sendas internacian respondkuponon“, tiun ĉi sciigon de la Kvaro por la Kvara oni legis en preskaŭ ĉiuj esperantistaj gazetoj. Kaj kio estis la rezultato?

Multaj, tre multaj gesamideanoj sendis internaciajn respondkuponojn kaj deziris la belegan gvidlibron, kiu ne nur estas tre utila pro la sciigoj, kiujn ĝi donas, sed ankaŭ estas artplena eldonaĵo, montrinda kiel propagandilo por nia kara lingvo.



Tiu ĉi fakto, ke tiel multaj leteroj kaj poŝtkartoj estis senditaj el la plej diversaj landoj de la tuta mondo, estas tre grava, ĉar ĝi montras, ke ĉie nia lingvo vivas kaj multaj fervoraj samideanoj ekzistas en ĉiuj landoj.

Ĉar multaj gesamideanoj sendis poŝtmarkojn kaj ne respondkuponojn ne sciante, kio estas respondkuponon, ni montras en tiu ĉi numero de nia gazeto tian respondkuponon.

„Mi sendas al Vi poŝtmarkojn, ĉar mi tute ne scias, kio estas internacia respondkuponon; skribu al mi, mi petas, kie mi

povas ricevi tiajn aĵojn kaj kiom kostas unu de tiuj ĉi kuponoj", tiamaniere skribis ne nur unu samideano, sed multaj, kaj tial oni permesu kelkajn sciigojn pri tio.

Se oni volis antaŭpagi ĝis nun al respondonta alilanda korespondanto la koston de la poŝtelspezoj, oni sendis al li enlandajn poŝtmarkojn, kiujn li bedaŭrinde nur tre malfacile povis ŝanĝi kontraŭ poŝtmarkoj de sia hejmlando, ĉar preskaŭ neniu volis akcepti la fremdlandajn poŝtmarkojn.

Hodiaŭ la afero estas alia: mi volas antaŭpagi al mia fremda amiko la respondon, kaj tial mi nun iras en la poŝtoficejon kaj aĉetas internaciajn respondkuponojn, kiujn eldonis la Internacia Oficejo de la Universala Poŝta Unuiĝo en Bern. Tiuj ĉi internaciaj respondkuponoj kostas 30 centimojn aŭ 25 pfenigojn k. t. p. Tiajn kuponon mi sendas al mia korespondanto kaj li ricevas en la poŝtoficejo de sia lando por ĝi poŝtmarkon 25-centiman aŭ 20-pfenigan k. t. p. Jam ne estas necese serĉi iun, kiu akceptas fremdlandajn poŝtmarkojn, ne, oni nun havas bonan ilon, por ricevi ĉiumomente en ĉiu poŝtoficejo la necesajn poŝtmarkojn por la respondo.

Tiun ĉi vere internacian ilon ni Esperantistoj devas tre ofte uzi, por ke ni montru, ke la internaciaj interrilatoj estas tre grandaj. Preskaŭ ĉiuj landoj aliĝis kaj permesas uzi tiajn respondkuponojn. Sed ne forgesu, ke la kuponoj devas esti stampitaj per la loka poŝtstampo, ĉar sen stampo multaj oficejoj ne akceptas ilin. Atentiĝu la oficistojn pri tio!

Ĝis nun la klarigo pri la uzmaniero de la kuponoj estas kvinlingva, sed senesperanta. Ni esperu, ke baldaŭ venu la tempo, ke ni nur trovas sur la kuponoj klarigon en du lingvoj, nome nur en la lingvo de la lando kaj en Esperanto!

D^{ro} Schramm.



El Esperantujo.

II. Reĝo Frederiko Aŭgusto.

Granda ĝojo en la tuta Esperantujo! Lia Moŝto Frederiko Aŭgusto, la reĝo de Saksujo estas nun la protektanto de la kvara kongreso. Koran dankon al li! Vivu la reĝ'!

AL LA REĜO.

Vivu la reĝ' al ni, tre longe vivu li!

Gardu lin Di'!

Justa kaj pia reĝ', — Dio pro nia preĝ',

Estu kun li.

Forta la reĝa tron', ver' estas lia kron',

Glavo la leĝ'.

Kun amo en la kor', reĝas kun granda glor'

Vivu la reĝ'!

Brulu, ho sankta flam' de la eterna am'

Pro la patruj'

Kaj forte staros ni, ĉiuj por unu li,

Pro la patruj'!

Longe, ho, restu vi gloro de la naci',

Sur reĝa seĝ'!

Via plej granda glor' en la popola kor',

Vivu la reĝ'!

L. Zamenhof.





Lia Moŝto, la reĝo de Saksujo, Frederiko Aŭgusto.

III. Niaj kantistoj dum la kongreso.

Minnie Nast studadis sub la protektado de la principino Wilhelm von Baden kaj principino Lowenstein en Karlsruhe kaj Salzburg sub la gvidado de la konata kantistino Bianka Bianchi. Ŝi ekkomencis sian artan vojon 1897 en Aachen kaj kontraktiĝis



Minnie Helena von Freneckell-Nast,
Reĝa Saksa kamerkantistino (Kammersängerin).

1898 kun la Reĝa Opero en Dresdono, al kiu ŝi ankoraŭ apartenas. Ŝi estas unu el la plej karaj favoritinoj de la Dresdona publiko. Tre brilan sukceson ŝi havis en Londono (Covent Garden), Vieno (festludoj), Amsterdam (Wagnerfestludoj), München (Mozartfestludoj). Ŝi ricevis multajn gast- kaj koncertinvitojn de Ameriko, Anglujo, Rusujo, Svedujo, Holando k. t. p. En la jaro 1905 ŝi vojaĝis en Usono kaj Kanado, post ŝia reveno ŝi estis salutata de la Dres-

dena publiko kun ĝojego, same kiel post ŝia reveno de Londono. Tiam la artistino estis hazarde malhelpata veturi per la pereonta vaporŝipo „Berlin“. Minnie Nast edziĝis kun Sinjoro K. von Frenckell el Helsingfors (diplomingeniero), nia samideano. Ŝiaj ĉefroloj estas: Mimi en la Bohème, Margarete en Faust, Eva en la „Meistersinger“, Amrei en Barfussele, Pamina en Zauberflöte (sorĉa fajfilo), Lotte en Werther, Cherubin en La edziĝo de Figaro, Zerline en Don Juan kaj Fra Diavolo, Gretel en Hansel und Gretel, Marie en Zar und Zimmermann (Caro kaj ĉarpentisto) kaj Trompetisio de Säckingen k. t. p. La artistino posedas diversajn ordenojn.

Jam de longe nenia muzika enterprenado okazas sen la kunagado de sinjorino von Frenckell-Nast. Tio nur estas prava, ĉar ŝi apartenas al la „Steloj“ kaj estas unu el la plej grandaj trezoroj de nia reĝa kortega opero. En eksterordinara maniero la juna kantistino, favorata de la dioj rapide akiris la simpation de la muzikistoj same kiel la amon kaj adoradon de ĉiuj muzikamantoj. Ŝia vera talento kune kun persona ĉarmo kaj nobela eksterajo, tuj al ŝi vekas simpation. Tiel ankaŭ la esperantista kongreso havos la ĝojon, aŭdi kaj admiri sinjorinon Nast.

Kiel bapтан donacon bonaj feinoj metis la ekbruligan, dian fajron en ŝian lulilon. Tiu ĉi fajrero kaj la mirinde aminda sono de ŝia voĉo tuŝas kaj senpere kaptas la korojn. Minnie Nast kantas kaj ludas ŝajne sen ia penado. Neniam oni rimarkas la lernadon. Kiel diaj inspiroj aperas ŝiaj kreaĵoj, ŝi ne ludas siajn rolojn, ŝi ilin ĉiufoje travivas.

En alta grado ŝi posedas la tonon de la vero. Kiel koncertokantistino ŝi montras la samajn kvalitojn, delikatecon en la esprimo, animplenan prezentadon kaj artan komprenon.

De kelkaj jaroj fraŭlino Irene von Chavanne apartenas al la Dresdena Reĝa Opero kiel eminentulino. Ŝia persona kaj voĉa supereco baldaŭ havigis al ŝi altan lokon inter la Dresdenaj artistoj. Ŝi naskiĝis en Graz kiel infano de alta oficiro, sian edukadon ŝi havis en Vieno (profesoro Ress) kaj en Dresdeno (metodo Souvestre). Jam dekkvinjara ŝi havis la feliĉon veki la intereson de la imperiestro Elizabeto de Aŭstrujo, kiu iniciatis sian artan edukadon. Post ŝia studado en Vieno fraŭlino de Chavanne kontraktiĝis kun la Dresdena Reĝa Opero. Brilajn

proponojn de Parizo kaj Vieno fraŭlino von Chavanne rifuzis por resti ĉe la de ŝi amata Dresdena teatro.

Posedante bonege edukitan vastan aldovoĉon kaj ĝustan esprimplenan kantmanieron, ŝi akiris la vivan simpatian de la Dresdena publiko kaj la estimon de la gazetaro. Ŝiaj ĉefrolaj



Fraŭlino Irene von Chavanne.

Reĝa kamerkantistino (Kammersängerin).

estas virinoj en la tragikaj teatraĵoj kaj muzikdramoj, ekz. Dalila, Orfeus, Fidis, Azuzena, Orsini, Ortrud, Klitemnestra, Herodias (Salome), Waltraude kaj aliaj eminentaj kantistinoj.

La artistino ankaŭ posedas agrablan, spritan bonhumoron, kiun ŝi antaŭ nelonge montris per la bonega prezentado de Madame Bertrand en „Maurer und Schlosser“, (masonisto kaj seruristo) de Auber. Ankaŭ kiel koncertkantistino fraŭlino de Chavanne estas tre estimata.

Léon Rains naskiĝis en Ameriko. Li akiris premion en la konservatorio (muziklernejo) de New York kaj unue uzis sian arton en sia patrolando kiel kantisto en koncertoj kaj oratorioj. Poste li studadis en Parizo kaj ekkomencis sian artan vojon en la „Metropolita Opero“. Li kantis ĉiujn seriozajn basopartojn en la originala lingvo, france, angle, itale kaj germane.



Léon Rains.

Reĝa Saksa kamerkantisto (Kammersänger).

De 1899 li apartenas al la Dresdena Reĝa Opero, kie li trezge distingiĝis kiel Sarastro, Mefisto, Hagen, Kardinalo, Landgrafo kaj je aliaj roloj. Lia sonplena malalta basoj havas mirindan voĉtonon, lia kanta edukado estas bonega. (Li komence studadis en New York sub la gvidado de Oskar Sanger.) S-ro Rains ankaŭ kun sukceso kantis en Bayreuth kaj London Conventgarden). Persone li estas tre estimata de Amerikanoj kaj Germanoj.



Bibliografio.

Lexikon deutscher Redensarten, ellaborita kaj en Esperanton tradukita de Wilh. Velten, Rektor em. kaj R. Richter, Verkehrsinspektor a. D. Dresden 1908. Verlag F. Emil Boden. 8°. V kaj 202 paĝoj. Prezo broŝ. Mk. 2.50; bind. Mk. 3.—

Jam multaj en nia literaturo estas la diversaj frazlibroj kaj konversacilibroj; sed maloftaj estas tiuj, kiuj tiel trafe atingas sian celon, kiel la nova lernolibro (aŭ pli bone parololibro) de niaj samideanoj S^{oj} W. Velten kaj R. Richter.

Anstataŭ prezenti al la leganto senligan sekvon da frazoj aŭ konversacioj pli malpli tedaj, kiuj ĉiam ripetas la samajn vortojn kun samaj parolturnoj, la aŭtoroj de tiu bonega volumeto grupigis frazojn rilatantajn al la sama germana vorto, por klarigi al la lernanto la diversajn manierojn traduki ĝin esperanten.

Ekzemple jen la germana vorto „*ein*“: ĝi povas esti tradukita, laŭ la okazo, per *unu, iu, ia, en, k. c.*, eĉ ne esti tradukita. La libro donas al ni kvindekajn da bone elektitaj frazoj, kie *ein* estas uzita ĉu sola ĉu en kunmeto. Tiel estas evititaj tiuj bedaŭrinde tro oftaj eraroj, kiuj devenas de nesingardema uzo de vortoj trovitaj en vortaro.

Oni povas eĉ diri plie. Tiu libro certe helpas al la Germanoj por analizo de ilia propra lingvo, kaj ankaŭ ĝi servos al la *negermanoj* por lerni la germanan lingvon dank' al Esperanto.

Jam post la Kembra Kongreso Prof. Mayer publike esprimis sian opinion, ke la reguleco kaj rimarkinda analizemo de Esperanto certe povas esti utiliga pedagogia lernilo por instrui pri ĉiuj lingvoj kaj aparte pri la propra gepatra nacia idiomo. S^{oj} Velten kaj Richter kvazaŭ efektiviĝis la diron de la eminenta scienculo, kaj ni devas tre kore ilin danki pro la valorplena laboro, kiun ili faris por la faciligo de la akiro de bona Esperanta kono.

Carlo Bourlet.

La Revuo. — En nia bibliografio ni intencas raporti pri la jam multaj kaj bonegaj gazetoj esperantaj; kaj kompreneble ni *devas* komenci tiun serion per la ĉefa nun ekzistanta literatura gazeto, la ĉiekonata „*Revuo*“, en kiu ĉiumonate nia estimegata Majstro D^{ro} Zamenhof verkas artikolon.

Ĝus finiĝis la dua jaro, kaj sur mia skribotablo kuŝas la dika ruĝa libro, kiu estas la broŝurita kolekto de la dek-du lastaperintaj numeroj. En la 592 blankaj paĝoj svarmas la belaj ĉu poeziaj ĉu prozaj tradukoj aŭ originaloj. Post la mirinda traduko de la Schiller'aj „*Räuber*“, la altliteratura Psalmaro el la Biblio, nia kara kaj lerta Estro plej delikate tradukis unu el la plej akraj kaj morobservaj komedioj de la franco

Molière. Noveloj, poezioj, kritikaj studoj de Prof. Ch. Lambert pri literaturo, de B^o de Ménil pri muziko kaj arto, vivplenaj notoj de Prof. Carlo Bourlet, k. c. formas literaturan ŝtofon, kiun envius pli ol unu el niaj naciaj gazetetoj.

Por plaĉi al siaj legantoj, La Revuo dum ĉi-tiu jaro ekuzis la duonon de siaj rozoj reklam-paĝoj por publikigi Felietonon, kiu estas la ĉiumonata, vivanta, raportanta parto de la gazeto. La ĉefredaktoro de tiu felietono estas S^{ro} René de Lajarte fervora Esperantisto kaj samtempe lertega ĵurnalisto, kiu perfekte scias tiun malfacilan sciencon de la resumo de multaj faktoj. Kiam oni ĉiumonate legis la „Notindaĵojn“, oni plene konas la staton de la disvastiĝo kaj progresado de nia lingvo.

Krom tio La Revuo organizas ĉiujare konkursojn, al kiuj povas partopreni ĉiuj legantoj. Tiun jaron ĝi aranĝis tri konkursojn; unu literaturan, kies premiito estas D^o Krukowski el Varsovio; unu por voĉdono pri la plej bona literaturisto, kaj la feliĉa kaj meritplena elektito estas la fama tradukinto de Faraono D^{ro} K. Bein (alie Kabe); fine lasta por verskvaro pri la kvara kongreso, kaj la gajnintoj estas niaj germanaj amikoj Prof. Christaller kaj S^{ro} Leopold Elb. Jen bonega maniero por instigi la fervoron kaj laboremon de la Esperantistoj.

Kiu volas havi perfektan stilon esperantan, kiu volas koni la literaturecon de nia bela lingvo, kiu volas legi vere interesajn tekstojn, tiu abonu, zorge traleĝu kaj trastudu la Zamenhofan Revuon.

Libramanto.






Hofphot. Otto Mayer-Dresden.

L. L. Zamenhof

laŭ fotografajo dum la kvara Kongreso.



Nia Esperanto vivas.


Ni kongresas ĉiujare
Por festadi ĝajan feston,
Tial venis ni grandare,
Sopirante la ĉeeston.

Post laboro kaj penado
Nun postulas ni ripozon.
Post dorneĝa laborado
Ni deziras nun la rozon!

Nia Esperanto vivas,
Floras ĉie sur la tero,
Ĉie nia lingvo servas
Al la bono, belo, vero.

Nia Esperanto vivas,
Tion montru la kongreso,
Flue, lerte ni parolas:
Nia estas la progreso!

Marie Hankel.



La kvara internacia esperantista kongreso.

Estis belaj, neforgeseblaj tagoj en Dresdeno, kiuj bedaŭrinde tro rapide forflugis.

Estis vera nova triumfo de nia kara Esperanto. Je la unua fojo esperantista kongreso povis nomi Reĝon sia protektanto, je la unua fojo la esperantistoj aŭdis klasikan dramon luditan de famaj aktoroj. Kaj la solenaj diservoj, la kortuŝantaj vortoj de l' predikistoj, la belaj kantoj, ĉu ili ne estis ĉiuj por la kongresintaj deviga pruvo por la taŭgeco de Esperanto? Multaj esperantistoj, kiuj ĝis nun ne vizitis kongreson, venis Dresdenon kun stranga frapado de l' koro, ili estis lernintaj la lingvon, sed ĝis nun ili ne havis okazon, paroli kun fremdaj samideanoj. Ĉu ni komprenos la fremdulojn? Ĉu oni komprenos nin? Sed baldaŭ iliaj okuloj brilis, ili estis mirigitaj vidante kaj aŭdante la samideanojn. Ho, oni ja komprenas unu la alian! Kaj baldaŭ ili babilas, babiladas esperante, jen ili parolas kun franco, jen kun anglo, jen kun japano k. t. p. La akceptejoj estis vera muzeo de popoloj. Riprezentantoj de 40 diversaj popoloj ĉeestis, unu granda rondo familia, pri kiu profesoro Sellin el Schwerin kantis la vortojn:

„Ne plu batalos en koler',
„La bonoj kaj malbonoj,
„Ne plu ektramos nia ter',
„De l' tondro de kanonoj.

„Japanon, Ruson tie ĉi
„Admiros ni ligitajn,
„Germanon tie vidon ni
„Kaj Francon kunigitajn.

„Ne Irlandano Anglon plu
„Aŭ Hindo nin malbenos,
„Ne blanka flavan, nigran plu
„Mokegos aŭ ĉagrenos.

„Ĉar ĉiuj fratoj estos ni
„Amantoj kaj helpantoj,
„Kaj ĉiuj kompreniĝos vi,
„Samlingve parolantoj.

„Kaj kio estas nun al ni
„La kunplektant' rubando?
„Ĝin konas ĉiuj, estas ĝi
„La kara Esperanto.“

* * *



No. 1. La eminentuloj salutas Dron Zamenhof.

1. Redaktoro Müller, 2. Redaktoro Mäder, 3. Konsulo Neubert, 4. Prof. Scheffler, 5. Generalkonsulo Kaps, 6. Sinjorino Hankel, 7. Wackrill (lingva komitato), 8. Abato Pichot, 9. Doktoro Mybs, 10. Rektoro Boirac, 11. Nylen-Svedujo, 12. Konsulo Scheller, 13. Sinjorino Junk, 14. von Hahn, 15. Ekscelenco von Criegern, 16. Doktoro Zamenhof, 17. von Frenkell, 18. Chavet, 19. Doktoro Kabe, 20. Pastro Schneeberger, 21. Generalo von Criegern, 22. Doktoro Hanauer, 23. Mudie, 24. Generalo Sebert, 25. Prof. Bourlet, 26. Kapitano Perorgardo, 27. Rega konsilano Hohlfeld, 28. Pollen, 29. Moscheles, 30. Grabovski, 31. Meisel, 32. Pastro Kühn, 33. Prof. Cart, 34. Insp. Schwellenbach, 35. Doktoro Arnhold, 36. Doktoro Schramm, 37. Komerca konsilano Arnhold, 38. Lerneja konsilano Pritzel.

Akcepto de D^{ro} Zamenhof.

Lundon, la 17^{an} de aŭgusto je la 9^a matene multaj Dresdenaj kaj esperantistaj eminentuloj iris en la „Aŭlon“ de la Tehnika lernejo por akcepti nian karan majstron Zamenhof. Ĉeestis ekscelenco von Criegern, la generaladjutanto de Lia Moŝto la reĝo de Saksujo, la poliestro de Dresdeno, multaj konsilanoj kaj kelkaj de la fremdaj konsuloj, kiuj loĝas en Dresdeno. La Dresdenanaj anoj de la Kvaro por la Kvara prezentis D^{ron} Zamenhof al la eminentularo. Ekscelenco de Criegern kaj aliaj plej altaj ŝtataj kaj urbaj oficistoj afable salutis la majstron kaj parolis kun li pri nia afero. Kiam D^{ro} Zamenhof forlasis la Tehnikan lernejon kun la sekvantaro, la amaso da esperantistoj, kiuj malpacience atendis antaŭ la kongresejo, por vidi la majstron, korege salutis lin kriante: Vivu Zamenhof! Vivu Esperanto!

Malfermo de la Kongreso.

Per aŭtomobiloj veturis Zamenhof kun sia sekvantaro al la festdomo „Vereinshaus“: Belege estis ornamita la grandega salono. La ornamo estis vere internacia: ĉie multkoloraj flagoj kaj insignoj de la plej diversaj popoloj. La salono jam estis pleneĝa, kiam Zamenhof alvenis. Mankas taŭgaj vortoj por priskribi la entuziasmon de la esperanta popolo salutanta sian majstron. Aplaudado, ne ankoraŭ aŭdita en tiu salono, pleneĝis la aeron. Kolonelo Pollen, la prezidanto de la tria kongreso malfermis la kvaran, salutante ĉiujn ĝeamikojn alvenintajn el proksimaj kaj malproksimaj landoj. Poste parolis je la nomo de la saksaj ministroj la Sekreta Konsilano Lange finante sian favoran paroladon per la vortoj: „La lingvo estas la plej granda trezoro, donita al la homoj. Sed la diverseco de la lingvoj kvazaŭ malbeno premas la homaron. Tial ni deziras, ke Via verko kresku kaj floru.“ Kaj la ĉefurbestro de Dresdeno, Financa konsilano Beutler diris koregan bonvenon al la esperantistaj gastoj de la urbo Dresdeno.

Apenaŭ ĉesis la aplaŭdegoj sekvintaj tiujn simpatiajn paroladojn, kiam la majstro starigis. Nun ĉiuj en profunde spira silento aŭskultis lian paroladon. Li dankis al la saksa reĝo, al la ŝtataj kaj urbaj estraroj, al la Kvaro por la Kvara kaj al la Dresdenaj esperantistoj. Grava estas la enhavo de la plua



La kvara internacia esperantista kongreso.

No. 2. D^{ro} L. Zamenhof forlasas la tehnikan lernejon.

parolado, tiel grava, ke ĉiu devas legi laŭvorte ĝin en la eldono de la „Revuo“. Ĉiuj partoj estis laŭtege aplaŭdataj kaj kiam la majstro eksidis, ripetiĝis la entuziasma aplaŭdo kaj oni kantis kune la „Esperon“.

Post la majstro parolis ĉirkaŭ 40 naciaj delegitoj. Per oficialaj delegitoj estis riprezentataj Japanujo, la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, la Ruĝa Kruco, la Internacia Pacifista Societo; plue parolis delegitoj el Hispanujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Belgujo, Flandrujo, Britujo, Francujo, Irlandujo, Kanado, Malto, Bulgarujo, Brazilujo, Skotlando, Tuniso, Ĉilo, Danujo, Islando, Italujo, Norvegujo, Rusujo, Serbujo, Svedujo, Svisujo, Portugalujo k. t. p.

Grandega estis la impreso de tiu ĉi malferma kunveno, tiel grandega, ke Dresdena ĵurnalo diris, ke en tiu momento la internacieco havis triumfon ne ankoraŭ konatan en Germanujo.

Parolado de la oficiala reprezentanto

de la Reĝa Ministro de l' interno, kulto kaj publika instruado
en Saksujo Sro Geheimrat Lange.

Altestimataj kunvenintoj!

En la nomo kaj laŭ komisiono de la Reĝa Ministrejo de l' interno, de l' kulto kaj de l' publika instruado, mi havas la honoron saluti la kvaran internacian esperantan kongreson. Eble neniam ĝis nun kuniĝis ĉi tie tiel multenombra kaj diversdevena kunvenantaro.


Kiam oni rigardas tiun salonon, venas al ni vole-nevole en memoron la vorto de l' poeto:

„Kiu kalkulas la popolojn, kiu diras la nomojn,

„kiuj gastame ĉi-tie kunvenis?“

Sed oni devas kompreni la vortojn pli larĝe, ol ilin pensis Schiller, ĉar en la Korinta terkolo estis kunigitaj nur rasoj de Greka deveno, dum ĉi-tie pace kaj amike kunsidas reprezentantoj de la plej diversaj popoloj, de la plej malproksimaj partoj de la tero. Kaj io pli alta, pli vastampleksa, vin ĉiujn kondukis ĉi-tien. La plej grava donaco, kiun ricevis la homo, kiu lin altigas super ĉiuj aliaj kreadoj, estas la lingvo; kaj speciale pro ĝi, kiu tamen antaŭ ĉio igas homon homo, la popoloj de la tero estas disigitaj. Tio premas ilin kvazaŭ malnova malbeno.

Kaj nun viaj penadoj celas ligi la popolojn almenaŭ per la ligilo de komuna lingvo. Pli ol unu provon antaŭ la via oni faris en tiu direkto, kaj ili malsukcesis. Malgraŭ tio vi, gvidataj de genia viro, kun freŝa fervoro kaj daŭrema forto, entreprenis vian laboradon kaj ĝin jam bone antaŭenpuŝis sub la flago de l' Espero. Via mondvasta agado bone progresadu, kaj ĝi parte helpu, ke la registaroj de la diversaj popoloj, kiam ili sin ekstere kom-



No. 3. La malfermo de la IV. kongreso.

prenos, ankaŭ sin interne komprenu, ke ili lernu sin senĉese pli kaj pli kompreni, kaj ke laste ili sin ekkonu kiel fratojn kaj kiel infanojn de tiu sama granda, eterne forta kaj bona Patro!

Tradukita en la kunveno *Profo Carlo Bourlet*.

Parolado de la ĉefurbestro de Dresdeno Geh. Finanzrat Beutler.

Tre estimataj ĝesinjoroj!

La urbestraro de Dresdeno komisiis min, saluti la kvaran internacian esperantistan kongreson en la nomo de la urbo kaj bonveni ĝin ĉe ni. Mi ju pli volonte akceptis tiun-ĉi komision, des pli konvinkita mi estas de la graveco de Esperanto por interrilatoj inter ĉiuj civilizitaj popoloj de la terglobo. Tamen kelkaj naciaj lingvoj kun pli aŭ malpli multe da rajto postulas esti en certa senco mondlingvoj kiel ekzemple la angla, la hispana, la germana, la franca lingvoj. Sed ĉiuj nur estas gravaj por la interrilatoj de pli aŭ malpli limigita parto de la kulturaj nacioj, kaj apenaŭ ekzistas la ŝanco, ke unu el tiuj-ĉi lingvoj akiros la estrecon solan en la tutmondaj interrilatoj kaj per tio la efektivan karakteron de lingvo internacia. Se oni nun sukcesis trovi en la genia eltrovo de Sinjoro Zamenhof almenaŭ provizore ilon facile lerneblan por la interkomunikiĝo skribe kaj parole de ĉiuj popoloj, estas sendube, ke tiu-ĉi eltrovo akiros konstante pli kaj pli multe da aproboj kaj ŝateco. Dum tempo, kiam la nacieco, originaleco de la lingvo de ĉiu popolo ludas tiel gravan rolon en la politika vivo, dum tempo, kiam aliflanke la interkomunikiloj kaj la facileco de la interrilatoj atingis tiel altan gradon, dum tia tempo ĉiu rimedo, kiu faciligas al la popoloj la scion de unu pri la alia kaj per tio la interkomprenon, devas esti bonvenata aparte ĝoje. Tial tute ne estas miriĝe, sed estas nur komprenebla sekvo de tiu-ĉi stato, ke en kuneco kun via kongreso kuniĝis internaciaj unuiĝoj de multegaj diversaj kategorioj, por kunside konsiliĝi pri iliaj samaj interesoj, uzante Esperanton kiel interkomprenilon.

Sed nia urbo, kiu jam ĝuadas de jardekoj grandan internaciecon kaj en kies muroj gastoj el ĉiuj partoj de la tero jam estis bonvenataj, ŝajnas esti certa en aparta grado orportuna esti unufoje ankaŭ la centro de via celado. Ĉiukaze vi povas kalkuli ĉe nia urbanaro je perfekta kompreno de via celado, kaj mi estas certa en konsento kun tiu-ĉi urbanaro, se mi deziras al viaj laboroj kaj kunsidoj la plej bonan sukceson. Ankoraŭ unufoje:

Koran bonvenon en Dresdeno!



Kongresaj impresoj.

Kelkajn tagojn antaŭ mia definitiva forveturo el Dresdenu, mi vizitis D^{ron} Schramm, en lia oficejo ĉe la deputatejo, dezirante saluti kaj lastfoje danki lin por lia senlaca afableco kaj komplezemo. Ĉiam afabla D^{ro} Schramm igis min viziti la belan novan palacon, en kiu kunvenas la deputatoj kaj senatanoj, la diversajn ĉambrojn kaj salonojn por la ministroj kaj ambaŭ prezidantoj, la bibliotekon, en kiu speciala fako estas difinita por la esperantaj libroj, bele binditaj kaj ornamitaj de la Saksa reĝa ŝildo. Post tiu interesa vizito ni revenis al la oficejo de D^{ro} asesoro. Apud la pordo pacience staris proksimume dudek personoj, atendantaj la revenon de D^{ro} Schramm por enskribigi sin kiel lernantoj de la novaj kursoj, kiuj estas baldaŭ malfermotaj.

— Kiom da personoj vi enskribis hodiaŭ? mi demandis la Doktoron.

— Proksimume cent.

— Kaj de la fermo de l' kongreso?

— Pli ol mil.

— Do, la Dresdena kongreso estas granda sukceso por la propagando!

— Mirinde grandega, kiel vi povas konstati.

Kaj efektive kun nepriskribebla ĝojo tion mi konstatas. Ĉiujare en ĉiu lando, kie okazis universala Esperantista kongreso la propagando farita de la urbanoj kaj de la alilandanoj, kiuj grandamase alvenas el la kvar anguloj de la mondo, disvastigos nian belan ideon, konatigos nian karan kaj tre utilan lingvon, kaj pli profunde fosas la jam profundan sulkon, el kiu ĉiujare levigas kaj mirinde kreskas fruktoplenu kaj riĉega rikolto.

Jen la lasta kaj la plej plezuriga impresu, kiun mi ricevis de la kvara kongreso, en Dresdenu.

Sed ĉar la redakcio de „Bela Mondo“ faris al mi la grandan honoron, peti personajn impresojn, tre volonte en la urbu mem, en kiu okazis la kvara kongreso, mi serĉos en la memoro ankoraŭ tute varma kaj entuziasmega, kaj mi klopodos rakonti — eble senorde — tion, kion naskis en mia koro la neforgeseblaj tagoj, kiujn mi kun nedirebla plezuro travivis en Dresdenu dum preskaŭ tri semajnoj.

Tute artaj estas miaj impresoj; kaj forlasante la oficialajn protokolojn de la aĝadaj kunsidoj, kiujn oni povos legi en la oficialaj gazetoj, mi, kiu estas tre modesta artamanto, nur diros tion, kion mi eksentis en la intima koro.

Jam dum la vojaĝo sur la rivero Elbo, kiam mi forveturis de la Bohema landlimo, miaj okuloj estis ĉarme ravitaj de la pentrinda aspekto de la Saksa Svisujo, de la strangformaj rokoj,



No. 4. La Ŝrammŝtonoj en la Saksa Svisujo.

kiujn kronas malnovaj kasteloj, de la riverbordo, sur kiuj stariĝas belaj domoj kaj luksaj palacoj. Jam la mirindaj vidindaĵoj de Dreseno, de malproksime aperantaj tra la nuboj, la multnombraj turoj, sonorilejoj de preĝejoj, kupoloj de monumentoj ravigis mian vidon, kaj la ensorĉo daŭris, kiam mi preterpasis la belajn stratojn jam ornamitajn de saksaj kaj esperantaj flagoj, kiuj unusente kunmiksas siajn verdajn kaj blankajn kolorojn. La unuajn tagojn mi dediĉis al la vizito de la muzeoj, en kiuj oni kolektis la plej belegajn ĉefverkojn de la pentrarto, kaj ĉiujn momentojn, kiujn mi povis ŝteli al la laboro pro la organizado de la ekspozicio de la Pariza grupo kun profesoro Carlo Bourlet,

mi utilis por viziti la muzeojn kaj ankaŭ la operdomon, en kiu famekonataj gekantistoj konatigas la ĉefverkojn de la germana muzikarto.

Tiamaniere la unua semajno pasis tiel rapide, kiel fulmotondro.



No. 5. La kvar tulipulinoj el Harlem.

La muziko, kiun mi tiom ŝatas kiom Esperanton, okupas gravan lokon en miaj kongresaj impresoj.

Unue la koncertoj donitaj en la salonoj de la Vereinshaus la Sabaton 15^{an} kaj la Dimanĉon 16^{an} de Aŭgusto, dum kiuj lertaj amatoroj estis aplaŭditaj en diversaj kantoj kaj komedioj, precipe „la kvar Tulipulinoj el Harlem“. Dum tiuj du koncertoj oni multe ŝatis la ĝehoristojn, kiuj sub la direktado de S^{ro} Kurt Blumentritt multfoje kantis la „Esperon“, la „Kanton de Ligo“ kaj aliajn popolajn kantojn tre bone aranĝitaj por voĉoj.

Antaŭ la granda nacivesta balo en la Vereinshaus en alia granda koncerto, mi aplaŭdegis la reĝajn gesalonkantistojn Sinjorinon Minnie von Frenckell-Nast, Fraŭlinon de Chavanne kaj Sinjoron C. Rains, kies belegaj voĉoj kaj grandega talento nediskuteblamaniere montris la harmoniecon kaj la belsonecon de Esperanto. Ĝis la kongreso en Dreseno la profesiuloj sin tenis aparte de la esperantista movado; tial ni devas multe kaj tutkore danki tiujn verajn artistojn, kiuj tiel bele helpis nian propagandon, kaj danki ankaŭ tiun, kiu varbis ilin, Sinjoro Karl von Frenckell, kies sindonemeco klopodis por la aranĝoj de la muzika parto.



No. 6.

Nacivesta balo. Kolonelo Pollen.

Al tiuj festoj ankaŭ donis sian artan helpon la muzikistaro de la 2. Königl. Sächs. Grenadier-Regiment Nr. 101, „Kaiser Wilhelm, König von Preußen“, kapelestro reĝa muzikdirektoro S^{ro} L. Schröder kaj la bonega harpistino F^{ino} Joh. Sturm, D^{ro} R. Hering, komponisto, S^{ino} koncertkantistino Wilhelmine Nüßle kaj ŝia edzo, F^{ino} Hahn, F^{ino} Eva Malzmann k. t. p.

Kun granda bedaŭro mi ne povas citi la nomojn de ĉiuj, kiuj partoprenis tiajn artajn festojn, sed mi kunigos ilin en sama korega danko, ĉar ili donis al ni neforgeseblan impreson.


Pri la Diservoj, kiuj okazis Dimanĉon en la Herz-Jesu Kirche je la 10^a kaj en la Kreuzkirche je la 11^{1/2}^a, pri kiuj mi raportis

en la „Kongresa Gazeto“, mi nur aldonos tion, ke kune kun ĉiuj ĉeestantoj mi ricevis grandan emocion pri la predikoj de Abato Pichot kaj de Pastro Kühn, kaj iliaj belaj paroladoj montras, ke Esperanto tute bone taŭgas por la esprimo de la plej altaj pensoj kaj de la plej religiaj sentoj.

Tute mirinda estas artefarita lingvo, kiu naskas tiajn belajn ojn en ĉiuj fakoj, en kiuj oni petas ĝian helpoj!

Ĉie ĝi triumfis, dum la koncertoj, en la preĝejoj, en la teatro, ĉie kaj ĉiel.

* * *



No. 7. Sinjorino Fraŭlino Baronino Sinjorino
 Sahla. de Chavanne. de Ménil. de Frenckell-Nast.

Sed la plej grava kaj la plej interesa fakto de la kvara kongreso estis sendube la reprezentado de Ifigenio en Taŭrido. Ĝi estis la vera triumfo de nia kara lingvo. Ĝia sukceso ne nur devenas de la granda arto, kiun elmontris la ĉefaj aktoroj,

pri kiuj ni poste parolos, sed ankaŭ de la belega traduko farita de nia Majstro, kaj de la graveco de la verko mem. Tiuj, kiuj en sia koro eksentis grandan korprenon precipe dum la tria akto, nun konvinkiĝas, ke Esperanto estas literatura lingvo, enhavanta



No. 8. Fraŭlino Apitz. Fraŭlino Forti. Fraŭlino Hahn.
La kantistinoj.

en tre alta rango la eblecon, montri la plej delikatajn, la plej dramajn, la plej noblajn sentojn de la animo.

Tiu reprezentado estis vera ensorĉo. De la unua sceno, kiam Ifigenio malrapide malsupreniras la ŝtuparon de la templo, ĝis la lasta „adiaŭ“ dirita per tremanta voĉo de la reĝo Toas, granda emocio korprenis la ĉeestantaron. Ĉio helpis al la suk-

ceso de tiu reprezentado: la granda talento de la aktoroj F^{no} Hedwig Reicher, S^{roi} Emanuel Reicher, Bruno Decarli, Kurt Stark, Oskar Fuchs, la scenaj aranĝoj de S^{ro} Reicher, la muziko de Gluck ludita dum la interaktoj sub la direktado de la reĝa ĉefmuzikdirektoro von Schuch mem, la belega dekoracio: ĉio estis vere mirinda, kaj eĉ la plej malgranda kritiko ne povas stariĝi en tiu artega dramludado.

Koncerne F^{mon} Hedwig Reicher, al kiu estis komisiita la plej grava rolo, oni ne povas trovi sufiĉajn vortojn por laŭdi ŝin. Ŝi estis en mirinda maniero la belega greka pastrino, kies ĉiu gesto elvokis la antikvan plastikon, la reĝa filino plena je majesteco, la amoplena fratino de Oresto kaj ĉiu el ŝiaj movoj, ŝiaj sintenadoj, eĉ ĉiu vorto elparolita de ŝia sentplena voĉo kreis ĉirkaŭ ŝi tute artan atmosferon.

Jen la plej bona provo de la beleco de nia kara Esperanto. Lingvo, de kiu oni ricevas tiajn impresojn, povas eble pliriĉiĝi, sed tute ne bezonas, kiel diras tre malmultaj reformistoj esti plibonigita. Cetere kelkaj el ili post tiu reprezentado konfesis, ke ili eraris kaj tute konvinkitaj denove refariĝis fidelaj esperantistoj. Tio ankaŭ certigas la triumfon, ĉar la vero ĉiam fine venkos!

Ĉiu teatra elmontriĝo en nia lingvo sukcesis. Mi ne povis ĉeesti la reprezentadon de la Svedaj aktoroj, kiu okazis, la Dimanĉon 16^{an}, en la Hotelo Palmengarten. Sed ĉiuj, kiuj tie ĉeestis, diris la kuriozan impreson, kiun ili ricevis de la ludado de Fraŭlino Julio kaj de Pario de Strindberg, tre bone luditaj de la geaktoroj de la Sveda Esperanta teatro, sub la direkcio de S^{ro} Ivan Hedqvist.

* * *

Unu el la plej interesaj partoj de la kongresoj Esperantistaj, kaj certe tiu, kiu pli bone agas por la propagando, estas la opa ekskurso.


La Kvaro por la Kvara organizis du belajn ekskursojn: la unua en Meissen, la dua en la Saksan Svisujon. Priskribi ilin estas preskaŭ neeble. Ĉu oni povas priskribi la entuziasmon de mil kvincent samideanoj, ĝojaj interparoladi inter si? Ĉu oni povas priskribi la scivolemon de multaj miloj de neesperantistoj, kiujn altiras la nombro de la gekongresanoj? Ĉu estas priskribebla la



No. 9. Internacia grupo.
Anglo Hispano Italo Svedinoj Finno Serbo Aŭstro



No. 10. Internacia grupo.



No. 11. Foirejo de Meissen.

elokventa bruego de tiom da homoj, kiuj kredas al la sama celo kaj komprenas, ke ĝi estas efektivebla?

Sed la ĝojo de la Esperantistoj ne nur devenis de la sukceso de Esperanto; la rimarkindaj vidindaĵoj pligrandigis ilian entu-




No. 12. Ŝipveturado.

ziasmon: Meisseno, la malnova urbo, kaj ĝia belega katedralo, Bastei kaj la sovaĝaj rokaroj, de kies supraĵo la vido trakuras la valon de Elbo kaj la saksajn montarojn; kaj la foiro en Meissen, kaj la vilaĝa festo en Wehlen, kaj la vaporŝipa veturado en la nokto, dum el ĉiu bordo multkoloraj fajroj lumigas la kastelojn, la vilaojn, la palacojn, dum la ŝipoj naĝas sub fajraj pontoj faritaj el raketoj, kies flamoj kuniĝas tre alte sur la ĉielo: Tio lasos en ni ĉiuj neforgeseblajn memorarojn.

Ĉiuj ekskursoj sur vaporŝipoj estas tute taŭgaj por la interkonatiĝo. Dum la kongresaj tagoj la esperantista armeo disvastiĝas tra la urbo, en la akceptejo, en la „Vereinshaus“, kie havas lokon la agadaj kunsidoj, en la muzeoj k. t. p. Sur la vaporŝipoj oni vere sin sentas pli proksimiĝantaj unuj de la aliaj, la eminentuloj, kiujn la oficialaj ceremonioj apartigas de la esperanta popolo, sin miksas kun la ceteraj. Ĉiam afablaj S^o Doktoro kaj S^{ino} Zamenhof senlace skribas sian nomon sur la esperantistajn poŝkalendarojn eldonitajn de niaj bonegaj amikoj, la fratoj Borel. Oni ĉirkaŭas F^{inon} Hedwig Reicher, nia bela Ifigenio, kaj ŝian patron. Gesinjoroj Mybs ĉiam ĝojaj ricevas komplimentojn de ĉiuj pri la bona organizado de la festoj. D^{ro} Schramm ĉiam bonhumora, trakuras la ŝipon kaj sin montras samtempe en multaj diversaj lokoj. Sur la ferdeko S^{ino} Marie Hankel, indulgema kaj fervora kuraĝigas la nove bakitajn esperantistojn; S^o Heinrich Arnhold, la financa ministro de la kvaro zorgas, por ke ĉio estu en bona stato, dum liaj du fratinoj prave nomitaj „la ambaŭ ridetoj de l' kongreso“ babiladas kun ĉiuj. Ĉiuparte oni gratulas Sⁱⁿ L. Elb kaj H. Marx, kiuj tiel lerte tradukis la tekstojn de la melodioj kantitaj dum la diversaj koncertoj de l' kongreso. Ĉiu estas ĝoja kaj feliĉa. Oni vere faras (kiel kantas nia „Espero“) unu grandan rondon familian. Oni ĝuas la ĝojon, vivi sen ia ajn maltrankvilo, ĉar ĉiu komprenas, ke nia unueco estas nia forto, ni sukcesis dank' . . . al nia unueco, kaj tia intima unueco triumfigis ĝis nun la esperantismon.

* * *

Nun, en la urbo pli trankvila, kiu reprenis sian kutiman aspekton, la esperantistaj flagoj ne jam flirtas sur la fasadoj de



No. 13. La studentoj, kiuj fondis Studentan Ligon.



No. 14. L. L. Zamenhof kaj edzino kun la tri fratoj Aleksandro, Henriko kaj Leono.

la hoteloj kaj de la privataj domoj. La tramveturiloj jam ne montras per verdaj afiŝoj la vojon al la akceptejo, kaj la bruema negermana esperantistaro ĉesis pleniĝi la stratojn je sia laŭta voĉo.


Tamen la urbo Dresden konservas eĥon de la pasintaj festaj tagoj; ĉie ĉe la fenestroj de la librejoj kaj fotografaj magazenoj restas postsignoj de l' triumfa kongreso. En ĉiu strato, sur kiu mi piediras, en multaj domoj, en kiujn mi eniras, mi, kiu antaŭ unu monato, neniun konis en Dresdeno, ĉiutage retrovas geamikojn kaj premas amikajn manojn. Kaj tio ankoraŭ estas bonfaro de Esperanto, kiu tiel intime kunligas la samideanojn, kiu unuigas en sama sento tiom da malsimilaj sentoj, kaj de hieraŭ nekonataj homoj faras sincerajn kaj por ĉiam fidelajn amikojn.

Reveninte hejmen, mi pripensas pri la neforgesebla semajno de l' kongreso, kaj post kelkaj tagoj, kiam mi forveturos el Dresdeno ia milda penso trankviligos la maldolĉecon de la foriro, kaj tiu penso estos: en la proksima kongreso mi retrovos la geamikojn.

Ĝis revido!

En Dresdeno, la 5^{an} de Septembro 1908.

Barono F. de Ménil.



„Ifigenio en Taŭrido“

de Goethe

en la reĝa operdomo Dresdena.

Inter la serio da artistaj prezentadoj dum la kvara internacia kongreso esperantista la plej alta kaj brila estis tiu de „Ifigenio en Taŭrido“.

Kvankam oni antaŭe ne dubis, ke la majstreca traduko de l' verko de Goethe farita de D^{ro} Zamenhof klare elmontras la porpoezian flekseblecon de nia lingvo kaj tiel plej perfekte adaptiĝos al la originalo, kiel estas ja atingebla de traduko, tamen la realeco superis ĉion esperon.

Estis, kvazaŭ spirito de soleno regadis la publikon, tiel internacie eble neniam antaŭe plenigintan nian belegan operdomon, soleno nepriskribebla, nur kunsentebla. La afero do estis la venka ekeniro de nia kara lingvo en la sanktejon de l' arto, en unu el la plej noblaj temploj de l' muzoj, kie niaj plej bonaj germanaj aktoroj servis kiel pastroj kaj nia senpara reĝa orkestro resonigis la altan muzikon de Gluck, vera oferfesto al la olimpano, kiu certe estus ĝojigita pri ĝi. La versoj ja defluis la lipojn de l' artistoj kun la plej bela harmonieco, la altaj, noblaj pensoj ja per perfektformaj frazoj estis transigitaj al la aŭdantaro, kiu bone konas lian nomon, sed neniam estus trovinta okazon ekkoni kaj ekami lian klasikan priĝrekan dramon. Nur per Esperanto la ĉefverkoj de l' poetoj el ĉiuj popoloj povas iĝi komuna proprajo. Unutona la efiko povis esti nur al tiuj, kiuj ne komprenas la lingvon kaj tial sin devis kontentigi per la belegaj scenbildoj kaj la muziko; sekve ili tute ne povas juĝi pri la boneco de l' traduko nek pri la beleco de la lingvo.

La reprezentado ne povas esti sufiĉe laŭdata; antaŭ ĉio „nia Hedwig“: kia belega virino, vera pastrino de l' ĉasta diino; ĉiu movo donacis novan ĝuon al la ravita okulo, ŝia tuta figuro kvazaŭ naĝis en beleco kaj harmonio, ĉiu rigardo de ŝi ĉarmeginta, ĉiu manmovo konvinkiga; eĉ je la plej alta pasieco tiu ĉi Ifigenio restadis nobla kaj nobela. Kiel kortuŝante ŝi deklamis la kanton de l' Parkoj. El ŝia buŝo fluis la paroloj kiel muziko en la orelojn kaj la korojn; ĉiu amis kaj admiris. De tiam Hedwig Reicher estas — nia Hedwig.

Toas, ludita de Emanuel Reicher, montris, kontraŭ la nobla heleneco de Ifigenio, la barbaron, sed tute modere, kaj komprenigis al ni la enamiĝintan maljunulon, donante al lia personeco multegon da belaj trajtoj. Kiu do ne volonte katenus tian Ifigenion por ĉiam al si mem?



No. 15. S^{ro} Emanuel Reicher.

Tute bonega estis S^{ro} Bruno Decarli (Leipzig) kiel Oresto; oni devige komprenis lian konsciencan turmenton, kiam lin persekutis la furioj kaj malheligis lian animon, oni devige kun li ĝojegis, kiam fine li sentas sin liberigita kaj nun staras, aĥilsimile, reĝo kontraŭ reĝo. La vizio de l' fantomprocesio estis vere majstre ludata kaj deklamata de li.

S^{ro} Kurt Stark (Wien) en la rolo de Pilado alportis alian agrablan kontraston; same kiel ĉe Toas kaj Ifigenio la barbaro kontraŭas la Grekinon, tiel ĉe Oresto kaj Pilado la krimulo turmentata de pento pri mortigo de l' patrino, kontraŭ la luma natureco de l' amiko, kiu baldaŭ al si gajnos la koron de Ifigenio. Lia ludo estis samvalora al liaj kunaktoroj. Ankaŭ pri Arkas — S^{ro} Oskar Fuchs (Berlin) — ni nur povas laŭde raporti; li senmanke reprezentis la fidelan serviston, kiu volonte malenvias al sia majstro la belan Grekinon.

Esceptinte la iom malbelan kolorigon del' „e“-oj, kies kaŭzon mi ne komprenas kaj kiu ĉe S^{ro} Stark certe trosimilis la diftongon „ä“ vakantan en Esperanto, ni devas esprimi al ĉiuj aktoroj la plej sinceran admiron, pri iliaj perfekta lernado kaj tute modela elparolado. Neniu vorto perdiĝis; eble la mallaŭta sintendo de la multenombra aŭskultantaro tion favoris.

La sceneja bildo estis belega, la templo konstruita laŭ la heroa epoko per ciklopa ŝtonaro konvenis al la barbareco de Taŭrido; la sankta arbareto, la blua maro ondete moviĝanta, la subiro de l' suno mirinda.

En la antaŭscenejo staras arbego, al kiu estas alligitaj Oresto kaj Pilado; tiu agado kunigas la unuan kun la dua akto. La tuta agado estis aranĝita en du partoj, la unuaj tri aktoj seninterrompe, la du lastaj same. Nur la orkestro eksonis ĉe la interaktoj kaj ludis, kiel ĉiam perfekte, la uverturon kaj la interaktmuzikon el la Gluck'aj operoj Ifigenio en Aŭlido, Ifigenio en Taŭrido kaj Alceste.



No. 16. Muzikdirektoro von Schuch de la reĝa operdomo.

La Kvaro por la Kvara.

En Kembridĝo estis tri personoj, kiuj aranĝis la trian kongreson, nome la „Trio por la Tria“: Mudie, Pollen kaj Cunningham. En tiu ĉi jaro ni havis „Kvaron“, kiu nelacigeble preparis la „Kvaran“, nome:

1. Sinjoro D^{ro} Mybs, la afabla kuracisto el Altona, kiu estas la prezidanto de la Germana Esperantista Societo;

2. S^{ro} D^{ro} Schramm, la reĝa asesoro kaj bibliotekisto el Dresdeno,



No. 17. La ĝesinjoroj Zamenhof kun la Kvaro por la Kvara.

D^{ro} Mybs. D^{ro} Schramm.

S^{ino} Hankel.

D^{ro} Arnhold.

kiu fondis antaŭ du jaroj la Esperantistan Societon en Dresdeno kaj estas la prezidanto de tiu ĉi laborema grupo;

3. S^{ro} D^{ro} Arnhold, la financministro de la kvara kongreso, kiu estis tiel bona kasisto, ke ni ne havas deficiton, sed tre bonan staton de nia kaso;

4. S^{ino} Hankel, la vidvino de la universitata profesoro D^{ro} Hermann Hankel (matematikisto), kiu laboris kaj skribis ĉiutage senlace, la mastrino de „Esperantujo“.



No. 18. Lasta sceno de l' „Ifigenio“.

Al lia majesta moŝto la saksa reĝo, kiu metis la reĝan operejon al dispono je tiu ĉi okazo, sed bedaŭrinde ne povis ĉeesti, ni ŝuldas humilan dankon; ankaŭ al S^{ro} generalmuzik-direktoro von Schuch, kiu estris la orkestron kaj al D^{ro} Fanto, kiu tiel laŭstile kaj noble farigis la novajn kostumojn, ni ŝuldas plej sinceran dankon.

Oni estis insiste petita, ne aplaŭdi dum la ludo; tre saĝa decido por tia solena dramo. Pro tio eksplodis post la lasta malleviĝo de l' kurteno nepriskribebla ĝojeĝo, la aktoroj estis ĉiam denove aklande elvokataj al antaŭbareto, ĝenerala entuziasmo daŭradis kaj pli ol unu okulo malsekiĝis pro ekscito. Kaj, kio eble neniam antaŭe okazis, la publiko post donaco de riĉa floraro al la aktoroj (la scenejo similis al ĝardeno) unuanime sin turnis al loĝio de la unua etaĝo, kie nia majstro sidadis apud sia aminda edzino, kaj aplaŭdis; eĉ la aktoroj sur la scenejo kuniĝis kaj ĉiuj kore aklandegis lin, la malgrandan grandan viron, malgranda je statur, granda je modesteco kaj spirito. Vere ni devas danki al li, la donacinto de taŭga elprovita internacia helpa lingvo, tutkore danki starante fidelaj inter lia anaro, restante senlacaj laboristoj, ĝis kiam Esperanto al militis la tutan terglobon.

Danki ni ankaŭ devas al la viglaj batalantoj, hodiaŭ precipe al S^{ro} Reicher, kiu multe oferis por akiri la universalan teatron al Esperanto, por kiu li kuraĝe kaj fervore bataladas. Lia rekompenco estas la beleĝe prosperinta provo kaj ĝi certe baldaŭ havos la sukceson, ke Hamleto kaj la Rabistoj, kiuj jam ekzistas en majstra traduko de D^{ro} Zamenhof, ankaŭ eniros la scenejon en Esperanto.


Baldaŭ la kritikemuloj kaj dubemuloj silentiĝos kaj la suno de l' mondteatro leviĝos kaj kun eterna brilo lumante ĝojigiĝos milionojn da homaj koroj per unu lingvo, kiu ebligas la komprenon de la ĉefverkoj de ĉiuj nacioj.

Leopold Elb.





No. 19. Hedwig Reicher.



Al fraŭlino Hedwig Reicher.

Ho, kiam kontraŭ ni, Ifigenio,
En blanka vesto de pastrino greka
Aperis Vi, belege kortuŝanta,
Nin ĉiujn korpremegis arta sento.
La dolĉa via voĉo nin alprenis,
La belaj viaj brakoj nin altiris,
Kaj ĉiam noblaj, ĉiam tre plastikaj,
La ĉarmaj viaj movoj nin allogis.
Forgesis ni, ĉe via la eniro,
Pentritajn bildojn de l' dekoracio,
La moviĝantan maron, la subiron
De l' suno forlasanta la ĉielon:
Forgesis ĉion ni, Vin ekvidante.
Vi estis la vivanta, suferanta
Doloro, turmentita de la Sorto.
Sed via gracieco ne lacebla
La Diojn kaj la reĝojn fine venkis,

Malnovan Vi elvokis la epokon:
 Antikva jam Grekujo sin elmontris,
 En via sintenado kaj en gestoj;
 Kaj dolĉan, kiel lingvo de Homero,
 Tre belan novan lingvon Vi parolis,
 La lingvon de noblec' kaj de beleco.
 Vi vere estis ja Ifigenio!
 Sed ne nur la Estinton Vi priskribis
 Nun gloran la Estonton Vi profetas;
 Kaj voĉo via, voĉo de Sibilo.
 Al nia tempo surprizita diras,
 Ke la belec' neniam povas morti,
 Ĉar nia kara lingvo ĝin konservas.
 Kaj la ĉefverkoj, dank' al Esperanto
 En ora sunradio nun revivos,
 Kaj la trezorojn de literaturo
 Dank' al la lingvo nia ĉiu konos.


Pli ankaŭ granda, ol Ifigenio
 Vi staras, ĉar vi estas la simbolo
 De Esperanto nia, kiu metas
 Sur vian belan kaj reveman frunton,
 Per glora gesto, sian verdan kronon.

Barono F. de Ménéil.



Saksa Porcelano.

Apenaŭ enirinte la Saksan ĉefurbon, la faman Dresdenon miaj okuloj rimarkis ion novan belan, kiun mi ĝis nun neniam kaj nenie vidis. En Coeln mi vidis sanktaĵojn, en Praha librojn, en



No. 20. Horloĝo el saksa porcelano donacita al la majstro Zamenhof.

Bulonjo ŝipaĵojn, kaj en Dresdeno mi vidis „Saksan porcelanon“. La montraĵ fenestroj kun la belaj delikataj objektoj, brilantaj per freŝa arta pentrado altiris mian rigardon per sorĉa forto. Sed mi estas singardema homo, mi ne tuj rapidegas en la magazenojn, antaŭe mi ekzamenos! Je ĉiu paŝo mi ilin vidas la novajn kaj la malnovajn modelojn, tasojn, vazojn, statuetojn; en la strato

de la kastelo, apud la fama apoteko, kie la eltrovinto de la multekosta porcelano Böttcher loĝis, la reĝa manufakturo, mi vidis la belan horloĝon, la honoran donacon de la germanaj Esperantistoj al l' D^{ro} Zamenhof. Fine en la Aŭgustusstrato la granda „Rajdantaro“, kiu ornamas tutan flankon de la strato — — ankaŭ tio Saksa porcelano!

En Meissen mi vidis la fabrikadon de la delikata materialo, lertegaj manoj formas, knedas, pentras la mirindajn artaĵojn, vera sorĉejo por miaj mirigataj okuloj. Kaj nun vespere dum gaja festo aperas sur scenejo vivanta porcelana statueto, rokoka belulino kaj kantis per dolĉa rava voĉo ĉion, kiun mi pensis kaj sentis:

Multaj homoj ŝatas maloftaĵojn,
Kaj aĉetas bildojn, armilar'
Kaj monerojn, strangajn vidindaĵojn
Kaj mirindajn bestojn el la mar'.
Kion kaptis ajn kolektemulo
Zorge enordigas sia man'.

Memoraĵojn de eminentulo
Venecian vitron, saksan porcelan'.
„Gesinjoroj, bone do rigardu min,
Ĉar mi estas saksa porcelanulin',
Kaj aĉetemuloj gardu vin:
Delikata estas saksa belulin'!

La tutan nokton mi sonĝis pri saksa porcelano. Mi aŭdis la argentan voĉon de la belulin', miaj fingroj singardeme tuŝis la delikatajn formojn, miaj oreloj aŭskultetis la bruston de l' puntvestoj de la delikataj pantofloj. En mia revo mi vidis la tutan urbon Dresdenon el porcelano: la kastelo, la kortega preĝejo estis el porcelano, la Zvingro ĵus eliris el la manoj de lerta artisto, ĝiaj pordoj malfermiĝis kaj eliris fraŭlinoj kaj sinjorinetoj, ĉiuj rokoke vestitaj: ili dancis, kantis, kliniĝis kaj frapetis min per siaj ventumiloj.

Bela neforgesebla sonĝo! Sonĝoj kaj revoj forflugas, sed la memoro de tiu ĉi bela tago al mi restis. Por efektive daŭrigi ĝin, mi al mi aĉetis la sekvantan tagon grandan keston plenan de antikva porcelano, por forpreni ĝin Anglujon. Mi trovis ion novan por kolekti — novan ornamon de mia vivo, novan „Belan Mondon“.

Jam anglo venis demandante:
„Kiu estas via la patruj'?“
Tiajn belulinojn nur en Germanuj'
Gesinjoroj, petas mi, ne tuŝu min.
Ĉar mi estas saksa porcelanulin',
Kaj aĉetemuloj, gardu vin
Vojaĝema estas saksa belulin'!

Anglo.

Ekspozicio.


Jam pasis tri kongresoj, en kiuj ni povis admiri belajn ekspoziciojn; sed neniam ĝis nun ni trovis tiel imponantan bone ordigitan amason da dokumentoj.

Eniru la teknikan lernejon, turnu vin maldekstren, kaj funde de l' koridoro vi trovos tiun novan paradizon de Esperanto.

Ĝuste kontraŭ la enirejo, enkadrigita inter du stabloj portantaj unu honoran diplomon de Hamburga grupo al Zamenhof,

alia premian diplomon de Esperanta ekspozicio, troviĝas

la tablo de Zamenhof. La portreto de la Majstro tronas super lia verkaro kaj la unuaj literaturaj libroj de la unuaj fideluloj de la genia elpensinto de Esperanto.



No. 21. Generalo Sebert
Prez. de la organiza komitato.

Kiam oni vidas tiujn modestajn libretojn titolitajn



No. 22. Rektoro Boirac
Prez. de la lingva komitato.

„D^{ro} Esperanto: lernolibro por Francoj — Germanoj — Angloj — Poloj“ k. t. p., kiam la disciploj religie kaj ame palpas la faman „Dua libro“, la unuajn eldonojn de „Ekzercaro“ kaj „Universala Vortaro“, oni vere sin demandas, kiel tiuj broŝuretoj povis enteni tiom da alloga forto, tiom da entuziasmigo.

Ne per bruado, per perforto, per perfida mona subaĉeto, per trompo, sed per sia beleco, per sia propra valoro, Esperanto, tiel malbone armita por la batalo, timplene kaj senskue akiris la mondon.

Lingvo, kiu per tiaj rimedoj sukcesis, ne estas plu detruibla, eĉ se kontraŭ ĝi amasiĝus ĉiuj trezoroj de la mondo.

Apud la „Fundamento“ kuŝas kvazaŭ kiel korpogardistoj la verdaj kajeroj de la unuaj pioniroj. Jen la verkaro de Grabowski: Kondukanto, la Gefratoj, Neĝa blovado, Janko Muzikanto, La Liro, jen aliaj de Kazi-Girej: Kvar tagoj, Attalea princeps (k. a.) kaj la malnovaj kunbatalantoj, unuaj amikoj de la unua

horo venis de malproksima lando por aplaŭdi la triumfon de la amata majstro.

Nun senfine disvolviĝas la longega vico de la tuta Esperanta libraro.

Jen la riĉa literaturo, la verkoj de Kabe, Vallienne, Noël, Lambert kaj tiom da aliaj, jen la ruĝaj kovriloj de la fama kolekto de la Revuo, jen la diversaj elegantaj broŝuroj de la Presa Esperantista Societo, la anglaj eldonoj lukse faritaj de la B. E. A. kaj de Stead.

Apude sciencaj, religiaj, sociaj verkoj, la diversaj sciencaj terminaroj, la pacifistaj, la Bibliaj, la sanktaj libroj.

Tuta kolekto da en punkteliefaj Brailléaj literoj presitaj volumoj por blinduloj pruvas la agemecon de Prof^o Cart, kiu tiel trovis belegan rimedon por grandege helpi al la malfeliĉa stato de blinduloj. Proksime longa serio da muzikaj pecoj montras la mirindan harmonian taŭgecon de nia bonsona lingvo por la kantado, kaj tie inter multaj bonegaj verkistoj tronas la plej konata, B^{no} de Ménil, la nun ĉiekonata aŭtoro de la oficiala muziko de nia himno Espero.

Nun venas la vico de la multenombraj naciaj lernolibroj: la germanaj de Borel, de nia kara senlaca kvarano Schramm, de Stark, kaj la bonega Leksikono de Velten kaj Richter ĵus eldonita de nia lerta presisto Boden; la tiel multenombraj francaj libroj de Cart, Aymonier, Chavet kaj Warnier, k. a.; la anglaj, hispanaj, italaj, katalunaj, portugaliaj, holandaj, svedaj, danaj-norvegaj, rusaj, polaj, estaj, litoraj, hungaraj, bulgaraj, turkaj, grekaj, arabaj, eĉ japanaj, eĉ malaĝaŝaj formas tian imponantan aron, ke eĉ la plej optimistaj Esperantistoj mire rigardas tiun miraklan spektaklon.

En speciala fako D^{ro} Hanauer prezentas al ni originalan kaj plej lertan metodon por instrui pri Esperanto.

Kvin tabloj estas kovritaj de ekzempleroj de la sesdek nun ekzistantaj gazetoj, de la malnova gazeto „Esperantisto“, eldonita de 1889 ĝis 1895 en Nürnberg ĉe Tümmel, ĝis la plej lastaj: Ĉila „Du Steloj“ kaj admirinda „Bela Mondo“.

La propagandiloj diversaj, la bonegaj ĉefeĉaj ŝlosiloj, kaj ankoraŭ multo, multeĝo, kiun ni forĝesos aŭ ne vidis!

Multaj el tiuj trezoroj estas alportitaj de Prof^o Bourlet, kiu ilin elĉerpis el sia propra biblioteko aŭ el tiu de la Pariza Grupo.

Apude oni vidas la aplikon de la lingvo.

Grandaj landkartoj kaj statistikaj paperoj de la Centra oficejo montras la disvastigon de Esperanto en Eŭropo kaj Ameriko.

Komercaĵoj kaj plie komercaj aĉetindaĵoj pruvas jam la uzeblecon de Esperanto.

Inter ili sur la unua vico brilas la firmo Seidel & Naumann, la konstruistoj de la Ideal - skribaĵo, kiu aranĝis plej artistan elmontrejon kaj Winckelmann kraĵone desegnis belan serion da portretoj de eminentaj samideanoj, kaj apude troviĝas la elegantaj fotografajoj



No. 23. La pordisto de la kunveno de la Ĉila Esperantista Asocio.

presigis beleĝan katalogon de siaj skrib - maŝinoj speciale aranĝitaj por la esperanta skribado. Plie modesta, sed ankaŭ tre interesa estas la elmontro de la simpla malkara skribaĵo „Mignon“; kaj bombonoj, kaj cigaroj, kaj diversaj steloj k. c. plenigas la liston.

Eĉ la artistoj ne mankas: S^{ro}



No. 24. Profesoro Cart.

de nia nova samideano S^{ro} James Aurig.


Kiu ne ankoraŭ ĉion tion vidis, iru rapide por vidi, kiu jam vidis, iru por revidi!

Sub la konduko de S^{ro} de Frenkell la mirigitaj Dresdenaj ĵurnalistoj venis rigardi kaj admiradi tiun vere



No. 25. Profesoro Bourlet.

grandiozan ekfloradan en nia Esperanta verda herbejo. —
Vidinto.



No. 26. La ŝipoj forveturas al la Saksa Svisujo.

Al la Saksa Svisujo.

Post la emocio de la *Ifigenia* prezentado, taŭgis io ripoziga por nia streĉita cerbo, por nia ekscitita spirito.

• Ĵaŭdon pasintan je la 9^a matene la 1500 kongresanoj flue alkuras al la kajo sub la teraso.

Kvar ŝipoj ornamitaj per esperantaj standardoj kaj diversnaciaj flagoj nin atendas.

Ni ilin baldaŭ plenigas.


La ŝiparestro Schramm akompanata de la direktoro de la vaporŝipsocieto, S^{ro} Fischer, sur inspektora ŝipeto parade inspektas, ĉu ĉio estas en ordo.

Nenio lamas. — Bone antaŭen! Kaj dolĉe la ŝiparo ekveturas.

Komforte sidantaj ni admiras la preterpasantan pejzaĝon.

Jen Loschwitz kaj Weisser Hirsch; jen la granda kampdomo — palaco de lia Majesta Reĝa Moŝto en Pillnitz. Ne malproksime sur la bordo maljuna sinjorino pentras, apude staras, en flava livreo, kun cilindra ĉapelo, unu lakeo — ĝi estas, oni diras, principino Mathilde, kiu kore favoras al nia afero.

Wehlen . . . sur ĉiuj ŝipoj esplodas krioj — tiuj krioj, kiuj tiel mirigas la Dresdenan gazetaron; ni divenas . . . Zamenhof verŝajne estas tie. Efektive sur la alpardiga flosponto staras



No. 27. S^{ro} Fischer, la direktoro de la saksa-bohema vapor-ŝip-societo.

nia Majstro veninta kun la familio de konsilanto Arnhold en aŭtomobilo.

Nun la bordoj altiĝas, altaj rokoj borderas la riveron, kaj pli kaj pli pitoreska fariĝas la pejzaĝo.

Ni estas ravitaj.

La kvar ŝipoj haltas.


La Esperantistaro malrapide el-ŝipiĝas kaj nun longa procesio komencas surrampi la vojeton, kiu, laŭlonge de la montoj, inter ŝtonegoj, sur pontoj, sub centjaraj arboj, suprenkondukas al „Bastei“.

„Supre sur la monto“ nin atendas la tagmanĝo, kiun ni malsataj ĝoje englutas antaŭ ol denove ĝui la mirindan vidaĵon, kiun oni havas de sur tiu natura fortikaĵo.

Je la kvara komenciĝas la mal-suprenirado al Wehlen sur belega



No. 28. En la krampvalo.



vojo, unue meze de arbaro kaj fine en mallarĝa, profunda, de altaj rokmuregoj bordenita krampvalo.

En Wehlen estas vilaĝa festo. La malgranda placo estas plenigita, superplenigita de babilantaj Esperantistoj, inter kiuj kuradas, cirkuladas zorgplenaj kelnerinoj.

Ĉe l' balkono de la ĉefa „Wirtshaus“ aperas frake vestita Sinjoro. — Li estas la urbestro de Wehlen, kiu senĉese interrompata de niaj entuziasmaj aplaŭdoj, nin alporolas kaj salutas en Esperanto. Iu diris al mi, ke la urbestro konas Esperanton de unu tago! Nia majstro D^{ro} Zamenhof, apud li starante, kore respondas. Je la 8^a ni iras al la kajo. La muzikistaro de Wehlen akompanata de lampionportistoj nin kondukas al la ŝiparo, kiun ni baldaŭ revenigas.


Nun komenciĝas la plaĉa reveno inter la iluminitaj bordoj.

Ĉie eksplodas raketoj, ĉie eklumas artaj ruĝaj fajroj, kiuj heligas la vila'ojn, la palacojn, kies profiloj tiel fantaziplene, fee, artplene aperas sur la nigra fono de la verdaj montetaj arbaroj.

Gigantaj ombroj, kvazaŭ fantomoj revenintaj el la mezepoko, ombroj de kavaliroj kaj sinjoroj, strange projekciitaj sur la fasadoj prezentas al ni kvazaŭ nokta teatro de la malnovaj germanaj „Riesen“, kiuj revenas el la Tŭringaj fosaĵoj por saluti nin.

Jen ankoraŭ nova bonega ĉarma tago, kiun ni ŝuldas al nia bona Kvaro.

Carlo Bourlet.



No. 30. La kvar esperantaj vaporŝipoj.



No. 31. En la krampvalo.


La Religiaj Diservoj.

Kiel dum la lastaj jaroj la Dimanĉa tago estis dediĉita al la solenaj Diservoj, kaj la gekongresanoj ĉeestis tre multnombraj en la diversaj preĝejoj. Dank' al la senlaca sindonemo de Sinjoro von Frenckell, kiu tre ageme kaj tute sola prenis sur sin la malfacilan taskon, organizi la programojn, la muzika parto de la religiaj ceremonioj tute belege sukcesis.

La katolika Diservo okazis je la 10^a en la preĝejo de la Sankta Koro de Jesuo (Herz-Jesu-Kirche).

Dum la meso oferita de S^{ro} abato Richardson oni unue aŭdis la tute rimarkindan ĥoristaron (la Dresdena Liedertafel), kiu kun sento kantis belegan ĥoron de Beethoven „La honoro de Dio el la naturo“.

La belaj voĉoj, kantante kapelmaniere, naskis ĉe la ĉeestantaro tre grandan impreson. Aliaj religiaj kantoj estis kantitaj de S^{ro} Gotardo (Patronia) kaj S^{mo} Guivy (Himno). En la „trio“ eltirita el la ĥoroj, kiujn Mendelssohn verkis por „Atalio“, kaj kies parolojn esperantigis D^{ro} Noël, Sinjorino Sahla bonvolis en la lasta momento pruntedoni la multvaloran helpon de sia tre bela voĉo. Fine la ĉeestantoj havis la grandan ĝojon aŭdi la reĝan kamerkantistinon, Sinjorino Minnie von Frenckell, kies ĉarma kaj tute mirinde belsona voĉo kantis kun granda impreso la delikatan kaj harmoniplenan kanton de Hugo Wolf, „Dormanta Jesu-knabo“.



No. 32. Pastro Kühn kun holanda kolego.

Post la meso la tre respektinda kanoniko Pichot, paroĥestro de sankta Devoto, en Monako, faris belan kaj tre altan predikon, kies simbola senco povis rilati al Esperanto la universa lingvo de ĉiuj fideluloj.

En la preĝejo de la Sankta Kruco okazis, je la duono de la dekdua, la lutera Diservo. Ĝin komencigis tre bela kanto „Laŭdu ni Dion“ kantita de la tuta ĉeestantaro kaj tre bone esperantigita de S^{ro} Hugo Marx (kiu esperante tradukis preskaŭ ĉiujn religiajn kantojn kantitajn en la du preĝejoj). Poste laŭtigis la bela kaj tre varma voĉo de Fraŭlino Susanna Apitz en la kantiko „La Ĉiopovo“ laŭ la muziko de Franz Schubert por vira ĥoro, orĥestro kaj orgeno. Granda estis la impresoj kaj ĉiuj laŭdis la belegan ludadon de tiu grava muzika verko. La orgeno estis tre lerte ludita de S^{ro} Pembaur, reĝa orgenisto, aranĝita de Franz Liszt sub la direkto de S^{ro} Kurt Blumentritt. La forta voĉo de Fraŭlino Apitz naskis tre religian movadon. Inter la strofoj de la kanto „Kor' kun koro kunigita“ okazis tre altsenta prediko de la pastro Lic^{to} Kühn, kies emocieco konvinkis la ĉeestantaron, ke Esperanto estas la vera lingvo de la internacia religia sento.

Kaj kiel tio okazis en la lastaj kongresoj, la esperantistoj, kiuj ĉeestis la du Diservojn certe konservos en sia koro bonan memoron de tiuj ceremonioj, dum kiuj la voĉoj de grandaj kaj veraj artistinoj aldonis al la religia sento tute noblan kaj artan impreson.

Barono F. de Méné.



La policianoj.

Koran dankon ni ĉiuj ŝuldas al la esperantistaj policianoj. Ne nur unu, kiel en Kembridĝo, sed dudekkvar policianoj komprenis nian karan lingvon, sed ili ne nur komprenis, ne, ili ankaŭ bone parolis esperante kaj ĉiam ili ĉeestis por helpi nin. Ili estis vere verdsteluloj, ĉar ili portis ĉe sia maniko specialan rubandon kun nia verda stelo! Kaj mi aŭdis, ke la poliestro ordonis, ke ili portu ĉiam nian stelon, ne nur dum la kongreso. Grava imitinda afero! Ŝajnas al mi, ke la poliestraro de Dresdeno estas tre progresema, ĉar oni ofte vidis ankaŭ la estrojn de la policianoj, S^{ron} de Wolff, reĝan konsilanton kaj S^{ron} Barth, polickonsilanton, kiuj eĉ ĉeestis dum la ekskursoj.

Kaj kion faris la esperantistaj policianoj? Ili estis veraj helpantoj kaj protektantoj. Se mi ne trovis aŭ sciis la vojon, mi serĉis verdstelulan policianon kaj li tuj afable kaj klare sciigis



No. 33. La verdstelulaj policianoj montras la vojon.



No. 34. D^{ro} Mybs kaj D^{ro} Schramm
kun la Dresdenaj policanoj, kiuj parolis esperante.

min pri ĉio, kion mi deziris, kaj ĉio en nia lingvo! Kelkaj de ili eĉ rapide kaj flue parolis kaj ni nur devas danki al D^{ro} Schramm, kiu tiel bone instruis la policianojn. Se oni venis matene en la kongresejon, niaj policianoj jam ĉeestis kaj atendis nin helpeme. Ĉiam afable kaj ĝojgite ili demandis: Ĉu mi povas servi al Vi? Kion Vi deziras? k. t. p. Sinjoro profesoro Cart kaj sinjoro profesoro Bourlet el Parizo, tiuj ĉi du fervoraj francaj samideanoj, ofte parolis kun niaj policianaj amikoj instruante kaj informante ilin kaj dankeme ili akceptis ĉiun instruadon. Ankoraŭ dum la kongreso ili fondis polican grupon esperantistan por disvastigi nian karan Esperanton inter la policanaro ne nur de Dresdeno, sed de la tuta Germanujo. Ni deziras al la grupo, ke ĝi ĉiam vivu, kresku, kaj floru!

Fremdulo.



Weisser Hirsch.

La kongreso estis fermita, la Revuo estis disdoninta siajn premiojn, la bela riĉa semajno finiĝis!

Sed jen cetera numero sur la programo: dimanĉon la 23^{an} post la angla diservo, je la ŝipveturado al Weisser Hirsch, la Esperantista Vilaĝo. Kio kaj kie ĝi estas? Artikolo estas en la kongreslibro, ni ĝin ne ankoraŭ legis, belan prospekton ni ricevis antaŭ longa tempo . . . nu, ni vidu! Jen vaporŝipo, ornamita per flagetoj, ĝi estas la nia. Ĉiam ŝipojn kun multkolora flagaĵo oni pretiĝis por la Esperantistoj en la gastama urbo Dresden. Hodiaŭ unu ŝipo sufiĉas, jam multaj gastoj forveturis, des pli granda estas la ĝojo retrovi kaj denove saluti la amikojn. Ho tiuj nekompareblaj ŝipveturadoj! Kiom da gajaj kaj interesaj interparoladoj vi ebligis! Post mallonga agrabla veturado la ŝipo albordeĝas en Loŝvic. Jen, granda surprizo: la samideanoj el la Esperantista vilaĝo staras sur la bordo, ili nin akceptas kun muziko, flagoj kaj floroj. La muziko (la bonega muzikistaro de la 177^a regimento), kondukas, la longa ĉeno de la Esperantistoj sekvas. Post agrabla gaja promenado aŭ marŝado, nesentebly surprizante ni atingas la vilaĝon aŭ pli bone, la belan aerkuraclokon Weisser Hirsch, girlandoj, flagoj kaj: Vivu Esperanto nin denove salutas.

Ĉe monumento oni haltas, la direktoro de la fama Sanatorio de Lahmann, profesoro Pajra, per afablaj vortoj salute alparolas nin, sinjorino Junck lerte kaj rapide esperantigas la vortojn. Tiam la Esperantistaro marŝadas al la Parkhotelo, gvidata de junaj fraŭlinoj en originalaj kostumoj, portante grandan rubandon kun la vortoj: Vivu Esperanto! Nova surpriza ĝojo: la Majstro ankaŭ alvenis, entuziasme li estas salutata!

La gesinjoroj Zamenhof gaje kaj afable partoprenis al la tagmanĝo, al la vizito de la Sanatorio kaj al la amika babilado. Ĉiam denove ili konsentis al la fotado (nia bildo montras unu el la interesaj grupoj), ili eĉ ĉeestis la vesperan dancadon, la gajan finon de la bela tago.

La festo certe bone prosperis al la burĝoj de Weisser Hirsch. Ĉu ankaŭ la „Revo“, la Esperantista Vilaĝo bone sukcesis? Ni aŭdis ke oni forsendis 2000 prospektojn de Weisser Hirsch en la vastan mondon, al Esperantistoj sendinte poŝtkuponojn.



No. 35. Vizito en la Esperantista vilaĝo „Weisser Hirsch“.

Kia granda laboro, elspezo kaj laboro! Kaj la rezultato? Kiam post kelkaj tagoj la Esperantistoj, kiuj efektive restadis en Weisser Hirsch sin reciproke nombris, nur 8 personoj sin trovis entute. Kunkalkulante kelkajn amikojn, kiuj nin ofte vizitis, ni estis dek, pluaj ne estis troveblaj. En tiu ĉi malgranda nombro troviĝis anglo, francoj, poloj, ruso, italino kaj germanoj: ses anoj de diversaj nacioj, kiuj estis feliĉaj, ke ili povis uzi nian lingvón. Ĉiumomente ni renkontis unu la alian, ni aranĝis longajn promonadojn al „Fischhaus“, „Heidemühle“ kaj „Ullersdorf“, ĉiutage je la kvara ni kunvenis en Parkhotelo, vespere ni ie kune vespermanĝis.

La sinjorinoj Junck kaj Hankel, la sinjoroj Ĉefeĉ, Kabe kaj Evstiféieff apartenis al la malgranda rondo. S^{ino} Junck eĉ aranĝis propagandan paroladon kaj kursojn, ŝia bela Esperanto faris grandan impreson.

La burĝoj de Weisser Hirsch aranĝis balon, ili respektplene invitis la geesperantistojn, kiuj danke akceptis. Certe ili ŝuldas dankon al la komunumo, kiu kun senlaca afableco akceptis la fremdajn gastojn.

Kaj ili mem, tiuj ĉi malmultuloj, ĉu ili estis kontentaj, ĉu ili ĝuis la unuiĝon? Certe, kaj en tia grado, ke la horo de la adiaŭo al ili estis terura. Kiam la lastan fojon ili aŭdigis la tiel ofte aŭditan: „Ĝis la revido“, tiam la voĉoj estis malklaraj, la okuloj estis malsekaj!

Vilaĝanino.

Fotografajoj.

Dum la kvara Esperantista Kongreso estis faritaj multaj fotografajoj, Kiu deziras aĉeti iun, skribu pro tio al la fotografiistoj mem.

La bildoj numero 5, 6, 7, 14, 15 en tiu ĉi numero estas haveblaj ĉe S^{ro} J. Aurig, Dresden-Blasewitz, kiu havas fotografajojn de ĉiuj eminentuloj, tiuj de numero 8, 9, 10, 11, 12, 13, 17, 27, 32 ĉe S^{ro} Herzfeld, Dresden, Pragerstrato, tiuj de numero 28, 29, 31 ĉe S^{ro} Fuhrmann, Dresden, Stephanienstrato kaj tiuj de numero 16, 18, 35 ĉe S^{ro} Hahn's Nachfolger. La bela bildo de nia majstro estas havebla ĉe S^{ro} Otto Mayer, Dresden.

Bibliografio.

„La Bela Mondo“ raportas pri novaj verkoj, nur kiam la redakcio donace ricevis du ekzemplerojn. (Adreso: Dro Schramm, Dresden-Ständehaus.)

Tutmonda Jarlibro Esperantista enhavanta la adresaron de D^{ro} Zamenhof por 1908. Redakcio: F. de Ménéil, Administracio: Hachette et C^{ie}, Paris. 8^o. VI kaj 213 paĝoj. Prezo 2 Fr.

Ĝus aperis la nova eldono de la tutmonda jarlibro por la jaro 1908. Pro la konstanta kreskado kaj plimultiĝo de la esperantistoj ne estis eble, ke oni publikigis ĉiujn novajn adresojn. Tial ni nun nur trovas en ĝi la adresojn de konsuloj kaj informistoj, sciigojn pri ĉiuj grupoj (sidejo, nomoj kaj adresoj de l' prezidantoj kaj de la komitatanoj), kaj la adresojn de l' esperantistaj hoteloj. Nova, tre grava fako estas la listo de firmoj, hoteloj, restoracioj k. t. p., kiuj uzas Esperanton. Estas nepre necese, ke ĉiu grupo havu en la biblioteko ekzempleron de tiu ĉi utila jarlibro, eldonita de nia senlaca samideano Barono de Ménéil, kiu ĉiujare faras la grandan laboron, por kolekti la materialon por la adresaro, kiu nun regule aperas en la monato, kiu antaŭvenos la kongreson, t. e. en Julio. S.

Tre ĝojigitaj. Prediko okaze de la kvara internacia esperantista kongreso parolita de Pastro Lic^{to} D^{ro} Kühn dum la diservo protestanta. Kun aldono: Ordo de Diservo.

Kio ajn estas vera, kio ajn estas pura, kio ajn estas justa. Prediko dirita de l' Abato Pichot, kun la permeso de la Dresdena episkopo, en la preĝejo de la S. Koro de Jesuo dum la diservo katolika esperantista.

Granda estis la impresoj, kiuj ĉiuj ricevis dum la du diservoj. La plimulto da kongresanoj alvenis jam sabaton la 15^{an} de aŭgusto por ĉeesti tiujn ĉi diservojn, kiuj estis aranĝitaj tiamaniere je horoj malsamaj, ke oni povis ĉeesti la protestantan kaj la katolikan. Kortuŝantaj estis la predikoj, tiel kortuŝantaj, ke oni petis la Kvaron por la Kvara presigilo. Jen ili estas presitaj kaj haveblaj por 20 pfenigoj de D^{ro} Schramm, Dresden-Ständehaus. La profito apartenas al la blinduloj.

Bilz, Oraj reguloj por la vivaĉo. Kun 80 ilustraĵoj kaj multaj artaj aldonoj. Eldono de F. E. Bilz en Dresden-Radebeul. 8^o. 96 paĝoj.


Kun plej koraj deziroj por la plia disvastiĝo de nia kara Esperanto kaj por la humanaj kaj sciencaj penadoj, helpotaj per tiu internacia helpa lingvo, S^{ro} Alfred Bilz, la direktoro de granda sanigejo dediĉis tiun ĉi belege ilustritan verkon kiel memorarĵon al la partoprenantoj de la kvara esperantista kongreso. Kelkaj ekzempleroj restis kaj estas senpage riceveblaj de D^{ro} Schramm, Dresden-Ständehaus, se oni sendas internacian respondkuponon.

Ideal, Skribmaŝino. Belege ilustrita katalogo pri la skribmaŝino „Ideal“. 8^o. 38 paĝoj.

Ankaŭ tiun ĉi katalogon, bonan propagandilon por ĉiu ekspozicio esperantista, oni povas ricevi senpage de D^{ro} Schramm en Dresdeno, se oni sendas internacian respondkuponon. De la skribmaŝino „Ideal“ nun ankaŭ ekzistas speciala tipo kapabla skribi Esperanton tute plene kaj korekte.



Esperantujo.



Horoj de vespero.

Post la tago de laboro
Laca estas ĉiu koro,
La gajecon ĝi sopiras,
Refreŝigon ĝi deziras.

Ni alportas al la homoj,
Ripozantaj en la domoj,
La plenumon de l' espero
Per la „Horoj de Vespero“.

Marie Hankel.



En doloro.

Mi ludas la harpon
La karan al mi,
Kaj melodiojn
Mi vekas el ĝi,
Elvenas la tonoj,
Elflugas la sonoj,
Esprimas doloron —
Pacigas la koron!

Marie Hankel.



Lazura reĝno.

Ho lazura reĝno! Ho reĝno de la lazura lumo, juneco kaj feliĉo! Mi vidis vin . . . en sonĝo.

Mi sidis kun kelke da kunuloj en bela, ornamita ŝipeto. Kvazaŭ cigna brusto ŝvelis la blanka velo sub la ĝajaj flagrubandoj.

Mi ne konis miajn kunulojn; sed mi sentis per mia tuta estaĵo, ke ili estis same junaj, ĝajaj kaj feliĉaj, kiel mi!

Mi ne turnis la atenton al ili. Mi vidis ĉirkaŭe nur la senliman lazuran maron, kiu tuta estis kovrita de la oraj skvamoj de l' ondoj. Kaj super mia kapo — same senlima, same lazura maro, kaj sur ĝi, kun triumfo ruliĝis la suno bonkore ridetante.

De tempo al tempo eksonis inter ni rido sonora kaj ĝoja, kiel la rido de l' dioj!

Aŭ subite el ies buŝo elflugis vortoj, versoj, plenaj de mirinda beleco kaj de inspiro . . . Ŝajnis, ke la ĉielo mem sonoris responde al ili kaj ĉirkaŭe la maro akorde tremis . . . Kaj ree regis la silento de la feliĉo.

Malpeze saltante sur la molaj ondoj, navigis nia rapida ŝipeto. Ne la vento movis ĝin; ĝin direktis niaj propraj, ĝajaj koroj. Kien ni deziris, tien ĝi obee rapidis, kvazaŭ vivanta.

Ni renkontis insulojn, sorĉajn, diafanajn insulojn, brilantajn kiel multekostaj ŝtonoj, jaspoj kaj smeraldoj. Ebrüigaj odoroj flugis de la rondaj bordoj; unuj ĵetis sur nin pluvon de blankaj rozoj kaj konvaloj; de aliaj subite sin levis ĉielarkaj, longflugilaj birdoj.

La birdoj rondflugis super ni, la konvaloj kaj rozoj fluidiĝis en la perla ŝaumo, glitanta sur la glataj flankoj de nia ŝipeto.

Kun la floroj kaj birdoj alflugis dolĉaj, dolĉaj sonoj . . . Virinaj voĉoj sonoris en ili . . . Kaj ĉio ĉirkaŭe: la ĉielo, maro, ŝanceliĝanta velo supre, murmureto de la fluo malantaŭe, — ĉio parolis pri la amo, pri la dia amo.

Kaj la amatino, la elektita amatino de ĉiu el ni — ŝi estis ĉi tie, nevidebla kaj proksima. Ankoraŭ unu momenton, kaj ekbrilos ŝiaj okuloj, ekfloros ŝia rideto . . . Ŝia mano prenos vian manon kaj tiros vin kun si en nevelkantan paradizon!

Ho, lazura reĝno . . . mi vidis vin en sonĝo.

El „Versaĵoj en Prozo“ de Turgeniev tradukis Kabe.

Elektitaj pensoj de l' tutmondaj filozofoj.

El la komenco de l' „Rondo de Legado“, kolektita de Leo Tolstoj.

Emerson. — „La societo de l' plej saĝaj kaj plej indaj homoj, kiu povas esti elektata el ĉiuj civilizitaj landoj daŭre de miljaroj, lasis por via dispono en la plej bona ordo la rezultatojn de sia studado kaj de sia saĝeco. La homoj mem estas kaŝitaj kaj nealireblaj; ili estas izolitaj kaj ne havus paciencon, se oni interrompus ilian okupadon; ili estus apartigitaj de vi per etiketo, sed la penso, kiun ili ne diris eĉ al la plej bonaj el iliaj amikoj, estas skribita tie per kompreneblaj vortoj por ni, fremdaj homoj de aliaj tempoj.“

Ŝopenhauer. — „La homaro devus uzadi la mallonge kaj ŝparege mezuritajn ekzistadojn, por konatiĝi kun la majstroj el ĉiuj aĝoj kaj nacioj, kun la geniaj artistoj altigantaj kvazaŭ turoj, super la vulĝarularo, kun la nomoj kronitaj de senmorta gloro.“

Leo Tolstoj. — „Eĉ se ni ne dezirus tion, ni ne povus ne senti nian interligon kun la tuta homaro: nin interligas kaj la industrio, kaj la komerco, kaj la artoj, kaj la scioj, kaj ĉefe la unueco de nia situacio, nia rilato al la mondo.“

K. Ĝorĵ. — „La organizado de l' mondo, en kiu ni vivas, estas tia, ke milo da homoj laborante kune, povas produkti multfoje pli, ol kiom povus produkti la sama milo da homoj laborante dise. Tamen ĝi ne pruvas ankoraŭ la necesecon de tio, ke 999 homoj fariĝu efektive sklavoj de unu.“

El la ĥina saĝeco. — „Kiam vi aŭdos pri la malbono de l' homoj — ĝi estu por vi tiel same dolora, kiel la pikiloj enirantaj dorson. Kiam vi aŭdos pri la bonaj aĝoj ornamu vin per ili kiel per la florkronoj.“

Leo Tolstoj. — „La lasta ordono de Kristo esprimas Lian tutan instruadon: „Amu unu la alian kiel mi ekamis vin.“

Ibrahimo el Kordovo. — „Mia religio estas la amo al ĉio vivanta.“

Kant. — „Oni devas edukadi la infanojn ne konforme al la estanta, sed la estonta, kiel eble plej bona stato de l' homaro.“

El la persa Kejjam. — 1. „Regardu al la mateno; levu vin junulo kaj enspiru la ĝojon de l' ĉielruĝo! Ni profitadu de l' mateno, ĉar multaj matenoj spirados ankoraŭ, kiam en ni forestos jam la spiro.“

2. „La malsameco de l' kredoj dividis la homaron je 72 nacioj, — el ĉiuj iliaj dogmoj mi elektis unu: la dian amon.“

El la ĥina budhismo. — „Kio estas la boneco? Antaŭ ĉio kaj pli grava, ol ĉio, — ĝi estas la konformigado de l' volo al la konscienco (prudento).“

Heraklito el Efeso. — „Dum ni estas vivantaj, niaj animoj estas malliberigitaj per nia korpo, sed, kiam ni mortas, ili reviviĝas.“

Spinoza. — 1. „Ne la morto ekzistas, sed vico da ŝanĝoj, kiun mi jam travivis, kaj la pli bonajn mi estas ankoraŭ travivonta.“

2. „La homa animo ne povas tute detruigi kune kun la korpo: de ĝi restas io tia, kio estas eterna.“

Leo Tolstoj. — „Por la privata kaj komuna vivo unu leĝo estas bona: se vi volas plibonigi la vivon, estu preta ĝin fordoni.“

Lamenné: „La malvivuloj estas tiuj, kiuj dronante en la zorgoj pri la pereemaĵoj, eĉ ne scias, ke ne ili estas animo, postulanta liberiĝon, ke vivi signifas bataladi, signifas morti por tio, ke la granda liberiĝo estu farita.“

Ĝ. Rjoskin. — „La plej grava en la historio de l' homo estas tio, al kio li celadis. Ĉio farita de li dependis ĉiam ĉefgrade de l' akcidentaj cirkonstancoj kaj en la plej bona okazo elmontriĝis, kiel tute ne perfekta plenumo de liaj intencoj.“

Ĉanning. — „Vi demandas, en kio konsistas la ĉefa esenco de l' karaktero de Kristo. Mi respondas, ke ĝi estas Lia konvinkeco pri la majesteco de l' homa animo . . . En la plej malalte defalinta, malĉastiĝinta homo Li vidis estaĵon, kiu povus fariĝi anĝelo de lumo.“

Torò. — „Serĉadu ne nur moralan vivon, sed celadu al tio, kio estas pli alta, ol la moraleco.“

Holms. — „Grava estas ne tiu situacio, kiun ni okupas, sed tiu direkto, en kiu ni nin movas.“

Manu. — „La animo estas per si mem kaj sia juĝisto kaj sia defendisto. Ne ofendu vian konstantan animon — la plej altan internan juĝiston.“

Lessing. — „La indeco de l' homo estas mezurata ne per tiu veraĵo, kiun li posedas, sed per tiu laboro, kiun li uzis, por ĝin akiri.“

Sulejmano el Grenado. — „La vivo estas lernejo, en kiu la malsukceso estas pli bona instruisto, ol la sukceso.“

Cicerono. — „Kiam oni demandis Sokraton, de kie li devenas, li diris, ke li estas tutmondregnano.“

*Esper. Fino Anna Ŝarapov,
en la bieno de P. Birjukov,
Kostroma distrikto, Ruslando.*



Pri Ifigenio en Taŭrido de Eŭripides kaj Ifigenio en Taŭrido de Goethe.

(Parolado de Prof. Cart en Dresdno la 10^{an} de Aŭgusto 1908.)

Estimataj gesinjoroj!

Se hodiaŭ, okaze de l' mirinda traduko de l' ĉefverko de Goethe, kiun donis al ni D^{ro} Zamenhof, anstataŭ longa, lerta, klera kaj elokventa komparo inter la dramo de Eŭripides kaj tiu de l' germana poeto mi faras simplan „kozerion“, pardonu! Pro diversaj motivoj mi deziras paroli kiel eble plej senorname kaj uzi lingvon plej facilan. Vi do ne estu tro severaj, se miaj vortoj kaj esprimoj ŝajnos al vi kelkafoje, por tiel alta subjekto, ne sufiĉe noblaj, eĉ iom tro komunaj kaj ĉiutagaj.

Goethe verkis sian „Ifigenio“ en la jaroj 1779—1787. Lia modelo estas la Ifigenio de Eŭripides, la fama greka poeto. Modelo? . . . Ne, sed nur preteksto, ĉar, se la ĝenerala plano, la anekdoto estas la sama, tute diversaj estas la moroj kaj personoj de l' dramo.

Jen la Eŭripida fabelo:

„Ĉar la vento estas ne favora al la grekoj, kiuj intencas ŝipveturi Trojon, Agamemnono, la granda reĝo, laŭ dia ordono, oferbuĉas sian filinon Ifigenion. Tiu ĉi tamen estas transportita de Artemiso (Diano), kiu ne volas ŝian morton, en sovaĝan landon, Taŭridon, kie ŝi estas pastrino de la diino. Por venĝi la supozitan morton de sia filino, Klitemnestro, edzino de Agamemnono, mortigas sian reĝan edzon. Sed Oresto, filo de Agamemnono, venĝas siaflanke la morton de l' patro per la mortigo de la patrino. Por tia abomeninda krimo la Furioj lin terure persekutas kaj lin de tempo al tempo frenezigas. Apolono tamen, frato de Artemiso, havas kompaton kun li kaj promesas lian resaniĝon, se li nur rekondukos Grekujon la bildon de la diino-fratino, bildon, kiu nun troviĝas, ĝi ankaŭ, en Taŭrido. Do Oresto, kun sia fidela amiko Pilado, ŝipveturas Taŭridon kaj, alveninte, ekzamenas, kiamaniere oni povos ŝteli la sanktan

statuon, kiu estas en la templo. Sed la afero ne estas facila kaj la du junuloj devas atendi la nokton en kaŝejo, apud la maro. Dum ili restas tie, subite Oresto, freneziĝinte, sin ĵetas



Emanuel Reicher.

sur brutaron, kiu sin paŝtas en la ĉirkaŭaĵo. La paŝtistoj lin kaptas kun Pilado kaj ilin kondukas al la reĝo de l' lando. Laŭ kruela kutimo la kaptitoj estos dediĉitaj de Ifigenio al la morto. Sed la pastrino deziras savi almenaŭ unu el ili. Ŝi donas do

al Pilado leteron alportotan en Grekolandon kaj samtempe, ĉar ŝi timas, ke la letero eble perdiĝos, ŝi recitas al li la enhavon, kiu estas: Oresto venu en Taŭridon por savi sian fratino Ifigenion! Tiamaniere la ĉeestanta Oresto rekonas sian fratino. Ili tri decidis, ke ili forkuros, prenante kun si la sanktan bildon. Por tio Ifigenio, „ruza kiel ĉiuj virinoj“, imagas, ke la statuo estas malpurigita kaj ke ŝi devas ĝin lavi en la maro, kien ŝi samcele kondukas la du fremdulojn. Apud la bordo estas ŝipo. Facile ili do forveturus, se kontraŭa vento ne malhelpus ilian foriron. La reĝo rekaptas ilin. Sed Artemiso mem sin nun intermetas kaj ordonas al la reĝo obeema, ke li permesu la reveturon de la fremduloj en ilian patrolandon kun la pastrino kaj la statuo de la diino.“

Belega estas la poezio de la ĥoroj, kiuj montras la plej dolĉan, la plej gracian amon al Grekujo, amon, kiu ankaŭ plenigas la koron de Ifigenio kaj inspiras ŝiajn plej elokventajn strofojn. Kortuŝanta estas la amikeco, ĉiam fidela, inter Oresto kaj Pilado. Sed sovaĝaj estas ankoraŭ la sentoj, kruelaj la moroj; ruzo, perfido, mensogo ŝajnas kontraŭ fremda reĝo ne nur permesitaj, sed laŭdindaj.

Por kompreni tian dramon, iru en vian Albertinum kaj tie rigardu, sur la supra etaĝo, la batalon de la Centaŭroj kaj Lapitoj, kiu ornamas la frontonon de greka templo.

*
*
*

Goethe apenaŭ ŝanĝis la fabelon mem de l' dramo! Tamen tuj en la komenco, li montras al ni, jam kaptitaj, Oreston kaj Piladon. Ni do ne plu vidos en ili la ruzajn ŝtelistojn de l' Eŭripida tragedio.

Alia ankaŭ estas sceno de la rekono. En mirinda teatra movo Ifigenio rekonas Oreston ne dank' al sendota letero, sed ĉar li mem ekkrias:

„Mi estas mem Oresto! Kaj ĉi tiu
Krimula kap' kliniĝas al la tomo
Kaj serĉas morton. Kaj en ĉia formo
Mi estas preta vole ĝin akcepti!
Ho, kiu ajn vi estas, mi al vi
Kaj al amiko mia malfeliĉa
Deziras savon; sed al mi la savon
Mi ne deziras.“ *)

*) Akto III, Sceno I.

Fine, la du amikoj ne forrabas la statuon de la diino, kiun konservas la reĝo, ĉar, kiel klarigas Oresto al Ifigenio:



Hedwig Reicher.

„La dio diris: Kiam la fratino,
Restantan kontraŭvole en la templo
De l' malproksima bordo de Taŭrido,
Vi reveniĝos en la grekan landon,
Vi tiam liberiĝos de l' malbeno. —
Ni pensis, ke la vortoj de la dio
Koncernas la fratino de li mem,
Li tamen pensis vin!“ *)

*) Akto V, Sceno VI.

Tiamaniere en la tragedio de Goethe ĉio finiĝas pace:
„Adiaŭ!“ — diras Ifigenio al reĝo Toas en la lasta sceno:

. . . . „Turnu vin al ni kaj donu
Al mi elkoran vorton de disiĝo!“



Oskar Fuchs (ludis la rolon de Arkas).

Kaj la reĝo, etdante al ŝi la manon, respondas:
„Adiaŭ!“

Ni, tie ĉi, ne plu havas la venkon de l' ruzo, de l' perfido,
de l' mensogo, sed la venkon de l' pureco, de l' amo, de l' vereco.



Inter la dramo de Eŭripides kaj tiu de Goethe jarcentoj pasis. La kristanismo, tute trapenetrita de la plej alta greka filozofio, iom post iom faris pli dolĉaj la morojn, pli nobla, pli severa la konsciencon: abomenindaj ŝajnas nun, — eĉ kontraŭ



Kurt Stark (ludis la rolon de Pilado).

malamiko, — la ruzo, la perfido, la mensogo; honorindaj: la pureco, la malkaŝemeco, la vereco!

La heroino ne plu estas la ruza, sovaĝa filino de Helado, kiu nepre volas reveni en la amatan, belan patrolandon eĉ, se

necese, dank' al malhonestaj rimedoj, ne, ŝi iĝis la ĉasta, dolĉa filino de la plej delikata, plej rafinita Helenismo. Nenion ŝi diras, laŭ la esprimo de Goethe, kion ne povus diri la Sankta Cecilio de via Dresdena Muzeo aŭ la Sankta Agato de Bulonjo: senkulpa virgolino ŝi estas, kristana pastrino, greka sanktulino!

Ĉiujn kaj ĉion ŝi pacigas ĉirkaŭ si: la popolon kruelan de Taŭrido, kiu forgesis la „antikvajn sangajn oferdonojn“, ĉar de ŝi „Sur milojn dolĉe gutas la balsamo;“ *)

la reĝon, kiu ŝin komence, pasie, furioze amis kaj poste ŝin aminde kaj amike ellasas; la frenezan fraton, fine, kiu povas diri al ŝi:

„Vi min ektuŝis, kaj mi resaniĝis;
En viaj brakoj min la lastan fojon
Atakis la malsano plej kruele
Kaj plej terure skuis mian cerbon;
Sed tuj, kiel serpento en kavernon
Ĉi fulme malaperis. Kaj per vi
Mi ĝuas nun denove plej libere
La lumon de la tago.“ **)

En ŝin Goethe metis sian tutan amon al la virinoj, kiujn plej li amis, al Charlotte Buff, al Korona Schroeter, al S^{ino} von Stein; en ŝin li metis sian tutan, plenan arton, ĉerpitan el la plej sincera, profunda admiro por la verkoj de la grekaj skulptistoj.

Ifigenio, en lia poemo, ne plu estas, kiel ĉe Eŭripido, unu persono el la dramo, ŝi mem estas la tuta Dramo, la konflikto ne plu estas inter diversaj personoj, ĝi estas nur en ŝia koro.

Por kompreni tiun dramon, konsideru en Albertinum la ĉastan, gracian bildon de Artemiso en la „Salono de Praksiteles“. Sed sub tiun ĉastan vestaĵon, sub tiujn graciajn liniojn, en tiun puran korpon metu ne grekan animon, sed tutmondan, eternan, virinan animon. La senkulpa Ifigenio estas vere „das ewig Weibliche“ de la granda germana poeto, la „eterna virineco“, kiu alportos al la mondo la deziratan sanktan pacon.

Neniun pli belan, pli taŭgan dramon oni povus elekti por Esperanta Kongreso!

Grandan dankon ni do ŝuldas al nia Majstro kaj al la aktoroj, kiuj prezentos al ni, kun eminenta talento kaj neduba sukceso, la tragedion de Goethe en traduko inda de l' originalo. *Th. Cart.*

*) Akto I, Sceno II. **) Akto V, Sceno VI.

P. S. Ĉu mi bezonas aldoni, ke la sukceso por la dramo, la tradukinto kaj la aktoroj superis la atenton de vi ĉiuj. Pli mirindan Ifigenion ol estis F^{no} Reicher en pli mirinda kadro oni ne povas imagi.

Tra la oriento.

Estas bona ideo, ke sinjoro Bolthausen en Solingen jam de kelka tempo entreprenas ĉiujare vojaĝojn tra la oriento gvidante la partoprenantojn tra la plej belaj kaj interesaj lokoj. Ĉar li bone konas la tutan orienton; li scias, kiom da malhelpaĵoj ekzistas por vojaĝo en orientaj landoj. En la monato aŭgusto de la jaro 1902 li forvojaĝis la unuan fojon kun 25 personoj kaj hodiaŭ li preparas la dudekkvinan vojaĝon.

Ĉiuj partoprenintoj ĉiam revenas tre kontente, ĉar ili vidis multe da lokoj, urboj kaj regionoj ne pagante multan monon. Bolthausen estas aminda gvidisto, kiu zorgas kiel patro por la kunvojaĝantoj, por ke ili bone manĝu kaj dormu kaj neniam estu tro lacigitaj. Estas plezuro vojaĝi ne zorgante pri io kun tiu ĉi informita, ĉiam afabla sinjoro.


Ne estas eble priskribi detale tian vojaĝon tra la oriento. Ĉiutage novaj impresoj! Ĉiutage belegaj vidindaĵoj! Mi volas doni al la legantoj nur kelkajn skizojn de la lasta vojaĝo.



La partoprenintoj de la unua vojaĝo antaŭ la templo de Jerusalemo.


Ni forveturis la 21^{an} de septembro de nia renkontpunkto Triest per la aŭstra rapidvaporŝipo al Patras, kie ni forlasis la

ŝipon por daŭrigi la vojaĝon per fervojo. Ni vidis Korinth, Megara kaj Eleusis kaj atingis je la tria la faman ĉefurbon de



Erechtheion en Athen.

Attica kaj de la nuna Grekujo, Athen! Kiel ofte mi volis viziti tiun ĉi sanktan urbon! Ĉiam oni aŭdas de la urbo de la Grekoj,



La malliberejo de Sokrates en Athen.

sed neniam oni havas okazon vidi ĝin. Kaj nun mi trapaŝas la stratojn kaj stratetojn de tiu ĉi mondfama urbo. Mi estas kiel

en revo. Kaj nia gvidisto montras al ni ĉion tiamaniere, ke oni ofte kredas vivi en antikvaj tempoj. Jen la „Akropolis“, kiun mi ofte deziregis vidi, jen la famaj „Propyläen“. Jen staris la grandega statuego de la „Athene Promachos“, jen estis la „Erechteion“. Ĉie lokoj jam de l'juneco al mi konataj! Ĉu vi jam vidis la malliberejon de Sokrates? Malliberejon de Sokrates? Jes, diras mia najbaro, oni diras, ke en tiuj ĉi keloj, kiujn vi vidas, travivis Sokrates la lastajn horojn antaŭ la morto. Mi vidas kaj vidas, ĉie monumentoj, muroj, restaĵoj el antikvaj tempoj, el la tempoj, en kiuj la greka ĉefurbo estis la centro de ĉiu belo!




Konstantinopel.

Mi estis lacega, kiam mi iris dormi. Mi vidis tro multajn vidindaĵojn. Mi revis pri iamaj tempoj, kiam subite oni vekis min per la vortoj: Estas la oka! Leviĝu, ni volas viziti la havenon Piräus kaj tiam daŭrigi nian vojaĝon. Estis nia gvidisto, kiu afable ridetante eniris en mian ĉambron. Kaj nun rapide, por vidi novajn mirindaĵojn! — —

Baldaŭ mi sidas sur la ŝipo. Ni veturas: Mi rigardas la marbordon, mi vidas la vilaĝojn kaj urbojn, kaj kiam mi demandas la nomon, mi aŭdas ĉiam nomojn malfremdajn por mi. Mia fantazio laboras, mi, kiu ĵus sin levis, jam ree revas kaj revas. La ĉielo estas blua, la maro trankvila, ĝusta tempo por travivi en pensoj la historion de antikvaj tempoj! La maro jam ne estas fremda al mi; tiun ĉi maron ofte traveturis la ŝipoj de la grekoj, en ĝi ofte havis lokon marbataladoj.

La tago forflugas, nova tago alproksimiĝas, malrapide lumiĝas kaj subite aperas la turoj de Konstantinopel. Ho kia belega

neforgesebla aspekto! La turkoj estas pravaj, se ili nomas ilian ĉefurbon „Deri Seadet“, tio estas: pordo de l' feliĉo. Kvar tagojn ni restis en la urbo, por ke ni povu bone studadi ĝin. Unue mi vizitis la malnovan „Serail“. Estas granda domegato kun belegaj ĝardenoj kaj malnovaj palacoj, ĉio ĉirkaŭita de muroj. Se oni trairas la ĉefpordegon, oni vidas la monejon, la preĝejon de la sankta Irene, du muzeojn kaj la artlernejon. Tra dua kaj



Moskeo en Konstantinopel.

tria pordego ni venas al la plej interna korto, kie troviĝas en belega konstruaĵo la salono de la deputatanoj kaj kie estas la imperiestra tresoro. Tute alia vivo, tute aliaj domoj kaj stratoj, ne grekaj impresoj, sed orientaj. Ne temploj, sed moskeoj kaj preĝejoj altiras nian atenton. Sed kiu povus trovi la ĉefvidindaĵojn inter tiom da konstruaĵoj! Dank' al nia senlaca gvidisto ni povas viziti ĉion, kion oni povas vidi en tiu ĉi stranga urbo. Ĉar mi volas skribi specialan artikolon pri ĝi, sufiĉas por hodiaŭ ĉi tiuj sciigoj.

La dekunan tagon de nia orientvojaĝo ni alvenis je la unua en la haveno de Smyrna. La vaporŝipo haltas. Ni elŝipiĝas. Jam vagonoj estas pretaj por ni, por ke ni povu viziti la tombon de Polykarpo, la valon de Meles kaj la urbon kun la multaj magazenoj kaj bazaroj. Sed ni ne havas multe da tempo, ni devas rapide trapaŝi la mallarĝajn stratetojn kaj forlasi la

urbon, kiun ni jam bone konas el la historio de l' eklezio, kie ankoraŭ hodiaŭ loĝas tri ĉefepiskopoj. Ni rigardas la belegan,



Haveno de Smyrna.

tre gravan, imponantan havenon. Homoj alvenas kaj foriras, jen alportas servisto pakaĵojn, jen kuras ŝipanoj, jen oni senŝarĝigas ŝipon. — Sed estas la sepa, ni devas reiri al nia ŝipo.



Enlanduloj.



Turka virino.

Chios, Samos, Kalymnos, Kos, Rhodos, la fame konatajn grekajn insulojn ni rigardas starante sur la ferdeko. Ni preterveturas la insulon Cypren. Nur malmulte da tempo nia vaporŝipo albordiĝas. La alian tagon matene je la sesa ni jam estas en Beirut.

Ree tute aliaj impresoj, tute aliaj sentoj. Ni alproksimiĝas al la „sankta lando“. La montaro Libanon kaj la Antilibanon, la urboj Damaskus, Tiberias, Kana kaj Nazareth vekas aliajn pensojn en niaj koroj. Ni renkontas enlandulojn, ni aŭdas la turkan kaj araban lingvojn, ni pasigas la nokton sub tendoj. Malrapide ni rajdas al la „sankta urbo“ Jerusalem. Jen estas unu el la multaj putoj, kiuj ludis tiel gravan rolon en estinteco kaj ankoraŭ hodiaŭ estas tiel gravaj. Ju pli proksime ni venas, des pli granda estas la nombro de lokoj, pri kiuj ni aŭdis en nia juneco de niaj instruistoj.


Jerusalem nun estas dividita en kvar partoj: en oriento la mahometana kvarano kun la templa placo (Haram eŝ Ŝerif), en okcidento la kristanaj loĝejoj kun la preĝejo de la sankta tombo kaj la domoj de la episkopoj, en sudo la armena parto kun kastelo kaj monaĥejo, fine en la valo la domoj de la hebreoj. Preskaŭ ĉiuj stratoj estas mallarĝaj kaj ofte malpuraj, la domoj



Poŝtmarkoj de la ses poŝtoŝtatoj en Jerusalem.

preskaŭ ĉiuj malgrandaj kaj malaltaj. Grandaj publikaj placoj ne ekzistas. Anoj de la plej diversaj nacioj loĝas nun en Jerusalemo. Ses el ili havas poŝtoŝtampojn, nome la turkoj, la rusoj, la aŭstroj, la francoj, la germanoj kaj la italoj*). Jerusalemo havas nuntempe ĉirkaŭ 50 000 loĝantojn (10 000 kristanoj, 10 000 mahometanoj kaj 30 000 hebreoj); por ĉiuj loĝantoj ĝi estas ankoraŭ hodiaŭ sankta urbo.

Pri la templo, pri la „via dolorosa“ t. e. vojo dolora kaj pri la preĝejo de sankta tombo mi raportos en sekvantaj numeroj.



La tomboj de Kairo.

Hodiaŭ mi nur volas diri: vizitu tiujn lokojn mem kaj vi tion ne bedaŭros. Ni estis ok tagojn en la urbo kaj ĉiutage ni trovis novajn interesaĵojn, havis novajn impresojn kaj bedaŭris, ke ni devis forveturi, ĉar ni ja volis viziti ankaŭ Egiptujon.


Kairo, la ĉefurbo de Egiptujo kaj la plej granda urbo de tuta Afriko bedaŭrinde laŭ la karaktero jam ne estas pura araba loko. La nova urbo estas konstruita laŭ modelo de la franca ĉefurbo Paris. Ni devas tial iri en la arabajn kvartalojn, kiuj estas efektiva labirinto. Multaj angulaj stratetoj kaj en kelkaj el ili loĝas nur metiistoj, anoj de la sama korporacio. El la bazaroj estas la plej granda „Ĥan el Ĥalili“; ĝi konsistas el pli ol unu korto kaj multaj kovritaj stratoj, kie oni povas aĉeti en

*) Se oni sendas 1,80 M. al sinjoro Bolthausen-Solingen, oni ricevos koverton kun poŝtmarkoj de la ses poŝtoŝtampoj kune stampitaj (vidu la bildon en tiu ĉi numero).

butikoj orientajn komercaĵojn. Vizito de tiu ĉi bazaro kaj de la bazaroj de la oraĵistoj kaj aliaj metiistoj estas tre interesa. En la oriento de l'urbo troviĝas la tomboj de la kalifoj. Rimarkinda estas precipe la tomboskeo de la sultano Barkuk kun du belegaj kupoloj kaj du ravaj minaretoj. Sed ni ankoraŭ volas vidi la „Nil“on, ni volas rigardi piramidojn, do ni forraĵdu sur kameloj kaj ĝuu ankaŭ tian aspekton. Lasta impresio de nia vojaĝo estis kolosa piramido. Ni rigardas ĝin mirigitaj. Montrante al ni obeliskon nia gvidisto demandas nin: Nun, ĉu vi estas kontenta? Ĉu Vi nun havas iometan impreson de orientaj landoj? Jes, jes, malgraŭ la mallonga tempo, kiun ni vojaĝis, ni multon vidis kaj en la proksima jaro mi volas partopreni je vojaĝo pli granda sub via afabla gvidado. Mi reveturos hejmen tre kontentigite kaj rekomendos al ĉiuj miaj amikoj tian viziton de l' oriento. S.



Familio B. en la oriento en la jaro 1906.




Parto de Altfriedstein.

Altfriedstein.

Altfriedstein, ho kio estas tio? — — Ĉu Vi ne legis la artikolon en „La Revuo“ pri „dometoj por libertempo“? — — Jen Altfriedstein estas kolonio de tiaj dometoj.

La vilaa kolonio Altfriedstein kuŝas tute proksime de la saksa ĉefurbo Dresdeno sur monteto sudorienten dekliva. En sep minutoj oni atingas la stacidomon de Kötzschenbroda kaj de tie oni povas uzi tramveturilon aŭ fervojon aŭ vaporŝipon por veturi Dresdenon. Sed ne nur pro tiu ĉi proksimeco de l' ĉefurbo la kolonio estas oportuna por libertempo, ankaŭ la tuta situacio invitas nin resti tie kelkajn semajnojn aŭ eĉ por ĉiam.

Ekzistas apenaŭ loko, kiu estas tiel sana kiel la kolonio Altfriedstein. Neniĉ norda vento, belegaj grandaj arbaroj tute proksimaj, ĉiam freŝa aero kaj vasta rava perspektivo ĝojigas la koron de la loĝantoj. Se oni volas fari promenadojn, oni trovas ĉie bonajn vojojn. Belegan aspekton oni ĝuas de la „Friedensburg“ (paca kastelo), de kie oni vidas la Elbvalon, la




Brühlstrato.

vilaĝojn dekstre kaj maldekstre de la riverego, la saksan ĉefurbon, eĉ la montojn de la Saksa Svisujo kaj de la „Erzgebirge“.

Estas neeble, priskribi la preferojn, kiujn oni havas, se oni ne loĝas ĉiam en fermita vico de domoj de urbeĝo, sed sur la kamparo en pura naturo

ĉirkaŭita de arboj kaj ĝardenoj. Ne estas mirinde, se multaj homoj deziregas vivi se nur kelkajn semajnojn malproksime de la bruego kaj mallibereco de la granda urbo.



Vilao por unu familio. 6 ĉambroj, 1 ĉambreto, kuirejo, balkono k. t. p.
Prezo kun la placo 22 700 M.


Ĉu estas eble, aĉeti propran vilaon? En la urbo, ne! Sed en vilaa kolonio oni nun povas aĉeti dometon jam je la prezo de 20000 markoj. Kaj por ebligiti tion, fondiĝis en Dresdno la societo „Dresdner Villenbau-Gesellschaft Neubert & Co.“ La dometoj ne



Vilao.

estas multekostaj. Niaj bildoj montras tiajn vilaojn. Se oni volas havi en Dresdno loĝejon de kvin aŭ ses ĉambroj, oni devas pagi 1100—1200 markojn, sed oni ne havas multe da komfortaĵo, oni ne havas ĝardenon, oni ne havas propran domon kaj kunloĝas ofte kun multaj fremdaj homoj. Se oni aĉetas vilaon por 20000 markoj, oni loĝas multe pli malkare, multe pli oportune, multe pli bone. Sufiĉas jare ĉirkaŭ mil markoj.

Kvankam oni malfermis antaŭ ne longa tempo la kolonion Altfriedstein, jam multaj fremduloj enloĝiĝis tie, ĉar la kondiĉoj estas tre favoraj. Por la finita domo, preta al uzado, kun aliĝo al la kanalizado, akvokondukilo kaj lumigado oni pagas la sumon tiamaniere, ke la aĉetanto pagas la duonon de la prezo en tri partoj, nome $\frac{1}{6}$ ĉe la notaria fordono de la teraĵo, $\frac{1}{6}$ ĉe la starigo de la tegmenta laboro kaj $\frac{1}{6}$ ĉe la fordono de la enloĝebla posedaĵo. La resta duono estos kovrita per hipoteko post la fino de la konstruo.



Lindenau - strato.

Bedaŭrinde multaj personoj tute ne scias, ke jam ekzistas tiaj vilaaĵoj kolonioj kaj tial ni esperas, ke ni faris servon al niaj legantoj, se ni atentigis ilin je la kolonio Altfriedstein.



Vojaĝo al la Kanariaj Insuloj.

Raporto de Paŭla Nobbe-Tharandt.

„Ĉu ni jam veturas?“ demandis kelkaj pasaĝeroj ĉe la vespertablo de la ĉarma „Kap Blanko“.

„Certe, jam de duona horo!“

Kaj tiel neriproĉinde kviete, ke oni tute ne rimarkis la movadon de la ŝipo, fariĝis la dektaga veturado sur sudamerika vaporiŝipo de Hamburg al Tenerife.

Horlonge oni povis kuŝi revante sur la ferdeko, kompreneble varme envolvita, ĉar estis februaro (1905). La gejunuloj ludis la kutimajn ŝipludojn, alian fojon ni ĉiuj rampis en la savboatojn, enspiris la mirinde puran aeron kaj vagiĝis ravitaj niajn rigardojn super la sunlumigitan malhelbluan maron, sur kiu dancis malgrandaj, blankaj ŝaŭmkronetoj.

La „Kap Blanko“ unue albordiĝis Bulognon s. m. La alian matenon, je la duono de la sepa, ni ekvidis la pentrindajn kretstonegojn de la multe prikantita insulo „Wight“ en la plej delikata blua lumeto de la leviĝanta suno. En Southampton ni akceptis ankoraŭ kelkajn pasaĝerojn kaj tiam ni veturis antaŭen seninterrompe tra la timiĝa, sed al ni tre ĝentila „Golfo de Biscaya.“


Per ĝia maŝino de 4500 ĉevalpovoĵoj „Kap Blanko“ trapasis 25 km ĉiuhore. Tiel ni rapide antaŭen iris, preterpasante ni salutis multajn ŝipojn, grandajn kaj malgrandajn.

Nur ĉe „Vigo“ (Hispanujo) ni denove albordiĝis. Tie ĉi ni havis la unuan sudan impreson.

Ĉar provizaĵo estis akceptota, ni havis tempon de kelkaj horoj. Tial oni boatis bordon, veturante meze inter la du belegaj, blankaj fratinŝipoj: „Kap Blanko“ kaj „Kap Ortegál“, ambaŭ kuŝantaj en la haveno de Vigo. Krom tio 13 anglaj ĝrizaj militŝipoj, kun siaj blankvestitaj, manovrantaj marsoldatoj, vivigiĝis la bildon.

Vigo estas superstarata de kelkaj montetoj, unu el ili portas antikvan fortikaĵon. De la urbo mem ne multo estis videbla.

En la vendejaro regis sude vigla vivo. Kapoj de blanka brasiko kaj florbrasikoj de duonmetra diametro estis elmetitaj apud omaroj de neniam vidata dimensio.



Pejzaĝo, karakteriza por la Kanariaj Insuloj.

Je la tagmezo la veturado rekomencis, de nun sen interrompo. La aero fariĝis pli varma, la maro se eble, ankoraŭ pli glata kaj pli blua. Mola adiaŭa emocio ekprenis nin, tion ĉiu komprenos, kiu jam iafoje ĝuis la dian vivon sur granda vaporŝipo dum blua vetero!

La antaŭesperon de nia alveno en Tenerife balo estis aranĝata sur la ferdeko. Super nia tablo — ni „Tenerifanoj“, 23 personoj estis kunsidigitaj — pendis multkoloraj elektraĵgirlandoj. Kiel balsalono servis la tiel nomata „laŭbo“ sur la supera ferdeko, kiu estis ornamita per internaciaj standardoj de la ŝipoficiroj.

La voĉoj de kvin nacioj — de angloj, francoj, hispanoj, argentinanoj kaj germanoj — supersonis sin reciproke.


Se ni tiam estus sciintaj paroli Esperanton! Eble unu aŭ la alia jam portis la „Verdan Stelon“, kaj ni nur ne sciis ankoraŭ, kion tio signifas!

La sekvantan tagon, je tagiĝado, ni alproksimiĝis al Tenerife. Tiel belegan enveturon, kiel Viktor Meyer ĝin priskribas en siaj „Martotagoj en la Kanaria Arĥipelo“ ni bedaŭrinde ne povis noti, sed ni poste devis esti miloble kompensataj.

Momente ni nur vidis la grizajn, dezertajn ŝtonegojn de la

„Anagaĉeno“ kovritajn de densa nebulo. Entiu dezertaregiono nur kreskas eŭforbio kaj „sempervivum“, malriĉuloj tie loĝas en kavernoj el la ŝtonego elkonstruitaj.

Fine „Santa Cruz“ aperis, ĉirkaŭprenante sian havenon per vasta duoncirklo. Sed bedaŭrinde ankoraŭ nun la vulkano „Pico de Teyde“ ne estis videbla: landnuboj kovris la monton,



Kavernoj.

kiu per sia alteco de 3716 m super la maro kronas la tutan pejzaĝon.


Des pli intensive miaj ĝepatroj kaj mi povis dediĉi nin al la ĝojo, revidi miajn ĝefratojn, kiuj — vivante en Tenerife — salute akceptis nin jam sur la ferdeko de nia ŝipo.

St. Cruz estas vera urbo de la sudo pro siaj „azoteas“ (plataj tegmentoj), siaj ravaj originalaj „patios“ (internaj florkortoj) kaj pro siaj publikaj placoj, superombrataj per palmoj, ĝigantaj araŭkarioj, dragoj (Dracena Draco) kaj per aliaj sudaj kreskaĵoj.

St. Cruz havas 20000 loĝantojn, ĝi ne nur estas la ĉefurbo de Tenerife kun ĝiaj 32 lokoj kaj 110000 homoj, sed ankaŭ la plej granda urbo de la tuta arĥipelo.

Tiun ĉi tagon bedaŭrinde ni devis tuj forvojaĝi. Elektra dentradtramo kondukis nin al „La Laguna“, 600 m pli alte kuŝanta loko. De tie ni veturis en antaŭmendita triĉevala kaleŝo, sur bone prizorgata „carretera“ (ŝoseo) al la fina celo de nia vojaĝo, al la mondfama „valle de Taoro“ aŭ la valo de „Orotava“.

Neniam ni forgesos tiun fabelan veturadon kun siaj en venka beleco radiantaj aspektoj: maldekstre la neĝkovrita „cumbre“ (la plej granda altaĵo de la montaro) kun la ankaŭ neĝkovrita Pico de Teyde, nun akre kontraŭ la blua ĉielo kontrastanta, kaj dekstre la sunlumigita malhelblua maro. Kun miro ni vidis la ondmovadon dum nemovata aero, ĝi estas kvazaŭ la spirado de la maro! Metron alteĝi suprenigis blankan ŝaŭmon, ĝin ĵetante kontraŭ la nigraj lafaj ŝtonegoj, reen rapidante super la nigra sabla bordo.



Ondmovado.

Inter la ĉeflokoj, kiujn ni pasis: Tacaronte, Matanza, Victoria kuŝas seninterrompe sennombraj bienoj, domoj kaj kabanoj.

Matanza kaj Victoria! Duoble terure ni homoj de hodiaŭ sentas la hontindaĵon de pasintaj centjaroj en tiu ĉi bela pejzaĝo, ŝajne nur kreata por feliĉo!

Matanza signifas „buĉado“! Kiam en la dekkvina centjaro normanaj-hispanaj al militistoj volis ekokupi la Kanariajn insulojn, la praloĝantoj, la kuraĝaj „Guanchos“ kuniĝis sub sia reĝo (mensey) en la jaro 1494, surprizis la uzurpulojn kaj mortigis ĉiujn. Sed post kvar jaroj hispanoj venis denove je pli grandaj amasoj, venkis la „Guanchos“ ĉe „Victoria“ kaj plenumis teruran sangbanon. Per tio la forto de la „islenos“ (insulanoj) estis rompita por ĉiam.

La „Guanchos“ estis granda, hela, blonda kaj simpatia homraso. Ili multe superis la plejmultajn eŭropajn uzurpulojn. Ilia societa kaj ŝtata ordo estis — kiel Hans Meyer en sia germana libro „La Insulo Tenerife“ priskribas detale — surprize perfektigita.

Poste la prainsulanoj tiel daŭrige miksiĝis kun hispanoj kaj emiĝantoj de nordafriko, ke oni nur malofte ekvidas blondan infankapeton.

Santa Ursula! Ĉiuj grizaj fantomoj de pasintaj tempoj disfluas kiel nebulo antaŭ la suno! Se nur estus al mi donita la forto, priskribi la miraklojn de tiu idilia, ĉarma, kaj samtempe eksterordinare grandioza perspektivo super la valo Oratava, kiu nun prezentas sin al miaj rigardoj!

Tie estas la loko, kie la fama Aleksander von Humboldt kliniĝis, kisis la teron kaj certigis, ke li ne vidis tian belajon dum siaj malproksimaj vojaĝoj.

La „carratero“, supreniranta konstante estis atinganta la supregon de la vojo, kaj ni troviĝis sur la „Ladera“ (deklivo) de St. Ursula. Kune kun la „Ladera de Tigaiga“ etendiĝante al la okcidenta horizonto, tiu ĉi „Ladera de St. Ursula“ enkadrigas la vastegan grade al la maro deklivantan valon: „Valle de Taoro“.

Meze de la valo elstaras izolaj „montanetas“ (montetoj) malgrandaj vulkanoj — ĉiuj kanariaj insuloj ja havas vulkanan devenon! — Preskaŭ en la mezo de la vasta valo, je alteco de 330 m kuŝas „Villa Orotava“, belega malnova urbeto, malsupren „Puerto de Orotava“ etendiĝas ĝis la maro, per ĝiaj multkoloraj domoj kaj turoj ĝi ankaŭ prezentas pentrindan bildon. Inter la



Puerto de Orotava.



Villa de Orotava.

du urbetoj estas dissemnitaj multaj apartaj pli malpli luksaj bienoj, palacoj, domoj kaj kabanoj, ili estas ĉirkaŭitaj de kreskaĵaro pli riĉa kaj ĉarma ol sur la suda flanko de Tenerife apud St. Cruz. Super la tuta vasta grandioza panoramo tronas la Pico de Teyde je la okcidenta horizonto. Iom da tempo ni veturis laŭlonge de la krute deklivanta „Ladera“, tiam la „carretera“ serpentumis al dekstro malsupren tra aleo de eŭkaliptoj kaj tre maljunaj korkkverkoj! —

Ni preterpasis domojn kun altaj fermataj fenestrokovriloj. Malgrandaj klapetoj malfermiĝis kaj scivolaj belulinoj penis vidi la „ingleses“ (angloj)! Afablaj kamparanoj salutis ĉie kaj postvokis flatojn al ni, dum knabetoj postkuris al la kaleŝo, ridante kaj petadante: „Cuartito, se!“ aŭ: „Penny, sir!“ Kiel anglo ĉiu fremdulo estas rigardata de la kanaria popolo kaj senmezuran miron ni kaŭzis, klariginte, ke ni venis el tute alia tre granda lando, kiu estas nomata „Germanujo“.

„Ĉu ĝi estas ankoraŭ pli granda ol la tuta insulo?“ (Tenerife), ili demandis kun grandaj okuloj.

Fine ni atingis la domon de miaj gefratoj: ideala germana hejmo kun suda ĉarmo, por kelkaj monatoj nia restadejo.

Sub pompa ekzemplero de mirto etendiĝante la branĉojn al la unua etaĝo, ni trinkis la kafon matene, dum miloj da rozoj transsendis sian bonodoron de la ĝardena muro. Inter palmoj, dragoj kaj figuoj transbriletas la blua maro: izolaj velŝipoj preterglitas. Preskaŭ ĉiumatene ankaŭ „patro Pico“ salutas nin en perfekta klareco kaj precizeco de la konturoj, dum li nur kovras sian kapon per la densaj landnuboj en la plej malfruaj taghoroj.

Tiuj ĉi landnuboj kune kun la pasatventoj, dum la somero preskaŭ seninterrompe blovantaj kaj kun la varma akvario de la Golftorento moderigas la klimaton de tiu ĉi preferitaj insuloj, kiuj do troviĝas sur la sama largogrado kiel nordafriko!


La ĉefpluvoj okazas en la kanariaj insuloj en aŭtuno kaj en printempo, sur la feliĉa norda flanko de Tenerife ni neniam bezonis pluvombrelon dum nia restado en Orotava de Februaro ĝis Junio. Pluvis nur malmulte kaj plej ofte agrable dum la nokto.



En la ĝardeno.

Riĉa nokta roso anstataŭas la mankon de sufiĉe da pluvo. Ĉi tiun roson kaŭzas la klareco de la nokta ĉielo, sekvata de forta emisio de la tero, kiu tamen ne tute sufiĉas, tiel ke arta malsekigado estas necesa.

Sur la feliĉaj insuloj, kie oni nur postulas impostojn de la terposedantoj, oni devas pagi la akvon des pli kare: por ĝardeno de ĉirkaŭe $1\frac{1}{2}$ buŝeloj 400 markojn (200 Sm) ĉiujare! Specialaj „societoj“ kolektas la fontojn en la nubregiono de la pasato en „estanques“ (ŝtonaj rezervujoj) je dimensio de 100 je 50 m kaj de 10 metra profundeco, ŝtonaj fluetiloj kondukas la akvon tra la insulo. La posedantoj de ĝardenoj kaj kampoj luas de la societo la rajton, forte traakvigi sian bienon ĉiun dekan tagon.



Kanaria knabino.

Por la dombezono ekzistas akvokondukiloj, sed la trinkakvon servistinoj alportas en sur la kapo portataj vazoj de proksimaj fontoj.

Al tiu ĉi konstanta portado de objektoj sur la kapo la kanariaj virinoj kaj kna-

binoj dankas sian senriproĉindan sintenadon kaj belmovon. Sed ankaŭ la sinjorinoj estas frapante ĉarmaj kaj plaĉaj.


Ili scias sin vesti tre lerte kaj ĉiutage ili portas florojn aŭ multkolorajn agrafojn en siaj artaj harararangoj, tio faras ĝajan impreson kaj bone harmonias kun ilia senzorga, serena maniero. La tuta popolo estas ĝenerale tre aminda, se ĝi ne nur estus tiel indifera! „Manana!“ (morgaŭ) estas ilia plej amata vorto. Kio hodiaŭ ne okazas, tio morgaŭ eble estos farata, supoze ke morgaŭ ĵus ne ia „fiesto“ havas lokon, kaj ie sur la insulo estas senĉese ia „fiesto“ por ia sanktulo.

Ĉe tiuj ĉi festoj ankaŭ la ĝefianĉoj povas kunveni. En la domon de la fianĉino la fianĉo ne havas la permeson eniri. Li devas kontentiĝi interparoli kun sia belulino tra la fenestro.

Legi kaj skribi la popolo ne scias, sed ĝi havas — kiel ĉiuj analfabetoj — bonegan memoron, de 14—17 komisioj la servistinoj ne forgesas ian ajn. Ilia tuta vortprovizo konsistas nur el proksimume 200 vortoj. Tial oni scias baldaŭ interkompreniĝi tute bone kun la simplaj homoj.

Miaj gefratoj dediĉis al mi gitaron, la ĝardenisto de mia bofrato afable instruis al mi la ludadon dum la vesperhoroj en la antaŭhalo de nia domo.

Naive la ĝardenisto ĉiufoje alkondukis kun li sian fratino kaj du kuzojn, plej senĝene la servistinoj de mia fratino aliĝis, kaj baldaŭ ili demandis, ĉu estis permesata danci! Volonte mi ĝin permesis, ĉar por mi estis ja ĉarma aspekto, vidi tiujn ĉi graciajn naciajn dancojn en la plej vera, originala kostumo! Mia fratino donis vinon kaj kukojn kaj la „fiesto“



Ŝtonego de „la Paz“.

estis efektivigita. La gejunuloj estis ravataj. Plej volonte ili estus vidintaj, ke mi prenu lecionojn ĉiutage! —

Vespere, tre ofte, nia tuta familio kuntroviĝis sur la „azotea“ (plata tegmento), por rigardi la ĉiam diversan, ĉiam grandiozan, subtropikan sunsubiron.

Kelkafoje tamen ni iris al la nur tri minutojn de ni kuŝanta, fabela „La Paz“, por ĝui la brilplenan aspekton de tie. „La Paz“ estas fama per tio, ke siatempe (1799) Alexander von Humboldt tie estis loĝinta. La nuna posedantino de la konstruaĵo loĝas en „Villa Orotava“ kaj la eniro estas libera por ĉiu fremdulo.

(Daŭrigota.)

El Esperantujo.

Granda estis la sukceso de l' kvara kongreso por ni Germanoj, ĉar ĉiuj artistoj, kiuj ludis aŭ kantis dum la kongreso, nun estas samideanoj. Jen Emanuel Reicher, nia fervora samideano, kiu donis bonan ekzemplon al ĉiuj! Hodiaŭ ni volas prezenti al niaj gelegantoj tri personojn, komponiston, kantiston kaj kantistinon, kiujn ni petis antaŭ la kongreso helpi nin. Ili ŝanceliĝis, ili pripensis la aferon, fine ili faris provon — kaj provante kaj aŭdante nian belsonan lingvon ili volonte donis al ni lian helpon — — kaj hodiaŭ post la kongreso ankaŭ ili estas esperantistoj, fervoraj esperantistoj.

1. D^{ro} R. Hering.

Fame konata en tuta Germanujo estas Dresdena artisto, kiu helpis nin plibeligi la koncerton lundon vespere, nome D^{ro} Richard Hering. Jam lia

patro kaj lia avo estis ne nur muzikamantoj, sed kiel li ankaŭ muzikverkistoj. Ĉiuj kritikistoj konsentas, ke D^{ro} Hering estas unu el la plej lertaj verkistoj de melodramoj.

Granda estis la aplaŭdo, kiam Emanuel Reicher deklamis liajn melodramojn „Iama feliĉo“ kaj „Lasta danco“ kaj li mem ludis la fortepianon, ĉar Reicher bonege elparolis kaj Hering majstre




D^{ro} Hering.

ludis. Kiel Reicher nun ankaŭ Hering estas fervora samideano kaj ni povas gratuli al ni, ke li fariĝis esperantisto. Ni esperu, ke li baldaŭ skribu al ni esperante same bonan verkon kiel „la sorĉistino de Drudenstein“. Ni salutas nian novan kunlaboranton kaj deziras al li multan sukceson!

2. La gesinjoroj Nüble.

En la dua parto de la lunda koncerto ĝojigis la fremdajn gastojn la



Herrmann Nüble.




Wilhelmine Nüble.

Dresdenanaj gekoncertkantistoj
 Wilhelmine Nüble kaj lia edzo Herrmann Nüble kantante duetojn de Schumann, Hildach kaj Grammann, kiujn estis tradukinta sinjoro Marx, la lerta juna ano de la Dresdena grupo. La belegaj voĉoj de la gekantistoj plenumis la grandan halon kaj montris la belsonecon de nia lingvo. Bone oni komprenis ĉiun vorton de la kantoj, ĉar fortaj estis la voĉoj de la lertaj gekantistoj.

3. D^{ro} Klotz †.

Bedaŭrinde mortis kelkajn tagojn antaŭ la kongreso nia nelacigebla samideano D^{ro} Klotz, la vicprezidanto de la Dresdena „Fremdenverkehrsverein“. Li estis fama advokato. Malgraŭ multaj laboroj li senhalte laboris por nia afero, ĉar li estis konvinkita, ke Esperanto estas bona interkomprenilo por la multaj

D^{ro} Klotz †.

fremduloj, kiuj ĉiujare venas Dresdenon. Li zorgis, ke en la informejo por fremduloj parolu unu de la sekretariinoj la lingvon Esperanto. Ĉiam kaj ĉie li ĉeestis, kiam oni laboris por la kongreso. Li iris al eminentuloj kaj petis ilin akcepti la nomon de honoraj komitatanoj de nia kvara kongreso. Granda estis la doloro, kiam en la kunveno de l' Dresdenaj esperantistoj oni sciigis, ke la senkompata morto forprenis nian karan kunbatalanton subite je l' vojaĝo. Ni ĉiuj dankas al li multon kaj konservos al nia ĉiam afabla amiko ĉiaman memoron.

*
*
*

4. Impresoj de la kongreso.

Multajn belajn horojn alportis al mi la IVa internacia esperantista kongreso. Mi volas noti kelkajn impresojn, kiujn mi havis dum tiuj neforgeseblaj tagoj. Jen unu el ili.

En la operdomo mi parolis antaŭ la prezentado de „Ifigenio en Taŭrido“ kun Siegwart Friedmann, antaŭe unu el la malgranda nombro de la plej gloraj reprezentantoj de karakteroloj, profesoro



Nova Poŝtkarto.

de la drama arto. Li al mi diris, ke li nur vizitis la prezentadon por vidi Emanuel Reicher kaj ties filinon.

„Mi ne povas paroli Esperante,“ li diris, „kaj mi pensas, ke la lingvo ne sonos bele.“

Post la unua akto lia entuziasmo ne trovis limojn.


„Ho,“ li diris, „ĝi estas pli bela ol la itala lingvo, mi estas entuziasmigita! Mi, mi maljuna viro, mi lernos ankoraŭ tiun ĉi lingvon! Kiu scias, ĉu tiuj ĉi aktoroj ludus tiel bonege, se ili parolus germane? La patoso de la grekoj estas fremda al nia germana lingvo, sed ĝi estas belega en Esperanto!“ *Alfred Richter.*

5. Esperantaj poŝtkartoj.

Tiu ĉi numero de la „Bela Mondo“ estas ornamita per bela artefarita bildo de K. Keck, montrante esperantan aerŝipon flugantan tra la mondo, flugantan tra la tuta Esperantujo. Alia bildo de la sama artisto montras la „novan stelon“ brilantan je la nokta ĉielo, por sia graveco ĉie videbla. Estas granda ĝojo por ni, ke ni povas sciigi niajn gelegantojn, ke oni nun povas ricevi tiajn bildojn kiel poŝtkartojn je l' prezo de 3,50 markoj por 100 ekzempleroj ĉe D^{ro} Schramm, Dresden-Ständehaus.

6. Fotografajoj.

Kion mi donacos al mia patro? Kion mi donacos al mia frato? Tian demandon oni ofte aŭdas antaŭ la festo de Kristnasko. Mi scias ion: Donacu la belegan portreton de nia kara majstro (vidu la lastan numeron de „Bela Mondo“)! Ĝi kostas (30 × 40) 20 markojn aŭ (50 × 60) 30 markojn kaj estas aĉetebla ĉe Otto Mayer, fotografisto en Dresdno, Pragerstrato 38.



Bibliografio.

„La Bela Mondo“ raportas pri novaj verkoj, nur kiam la redakcio donace ricevis du ekzemplerojn. (Adreso: Dro Schramm, Dresden-Ständehaus.)

Esperanta Universala Biblioteko. Redaktoro: A. Marich, Budapeŝt IX, Ŭllői-ut 59, prezo po 30 heleroj.

Ĵus aperis la 8^a kaj la 9^a kajereto de tiu ĉi biblioteko eliranta en Hungarujo. La 8^a kajero estas daŭrigo de la 7^a kaj enhavas persajn skizojn, kiujn kolektis kaj tradukis Georgo Davidov. En la 9^a kajereto ni legas la armenan fabelon „Ajcatur“ tradukitan de la sama kunlaboranto. Ni tre ĝojas pri la malkaraj libretoj kaj rekomendas ilin al niaj gelegantoj.

Merkblatt zur Benutzung beim Esperanto-Unterricht, verfaßt und herausgegeben von Friedrich Radeck, Dresden, Habsburgerstraße 2. 4 paĝoj, 20 pfenigoj.

Tiun ĉi lernilon ni povas rekomendi al ĉiuj germanaj lernantoj de nia kara lingvo. Precipe la „rimreguloj“ sur paĝo 2 estos bonvenaj al multaj el niaj komencantoj.

Deveno kaj historio de Esperanto. Biblioteko de Ĉasopis Ĉeských Esperantistů, Praha II. 2023. Dittrichova ul 7. 32 paĝoj, prezo 60 hel. (25 Sd).

Tiu ĉi esperanta broŝuro enhavas interesajn dokumentojn el la historio de nia lingvo, nome leteron pri la deveno de Esperanto, kiun skribis Dro Zamenhof al N. Borovko; krom tio ni havas en ĝi la paroladojn de nia majstro, kiujn li faris en la malfermaj kunsidoj de la kvar internaciaj kongresoj. Aliaj sciigoj pri evolucio de Esperanto kaj pri la esperanta literaturo riĉigas la enhavon. Ni ŝuldas multan dankon al niaj bohemiaj samideanoj pro tiu ĉi interesa broŝuro.

Katalogo de la Biblioteko de Sro G. Davidow, Ruslando, Saratov. Majo 1887 — Majo 1908. (Por 21 jaroj.) 53 paĝoj. Prezo 50 Sd. = 1 M.

Jen la unua preskaŭ kompleta katalogo de nia esperanta literaturo, ĉar sinjoro Davidov kolektis jam de dek jaroj ĉiujn esperantajn presaĵojn. Laŭ mia opinio estas tiu ĉi katalogo unu el la plej bonaj propaĝandiloj por nia lingvo. Mi estis tute mirigita pri la granda amaso da verkoj, kiuj jam ekzistas en kaj pri Esperanto. Montru al la neesperantista mondo tiun ĉi katalogon, por ke ĝi povu vidi, kiel rapide kreskas nia afero.

Frazaro de Henri de Coppet. Kolekto de la Revuo. Paris 1908. Librairie Hachette & Cie, 79 Boulevard Saint-Germain. Prezo 1 M.

Nia fervora samideano de Coppet ricevis de sinjoro Guérin, eldonisto de konversacilibroj en Parizo, la permeson, traduki Esperanten kolekton

da frazoj el la verkoj de li. Ĉar de Coppet bone tradukis multajn frazojn por la ĉiutaga vivo el tiuj konversacilibroj, ni povas tre rekomendi al niaj ĝelegantoj la bonan verketon.

En fumejo de l'opio de Wladyslaw Reymont. Novelo. El la pola lingvo tradukis D^{ro} Kezimirz Bein (Kabe). Warschau 1909. 16 paĝoj.

Libreto de Kabe! Libreto de la plej bona stilisto - literaturisto en Esperanto laŭ la opinio de la plejmulto de la voĉdonintoj de la dua konkurso de la Revuo! Tiuj ĉi vorto sufiĉas por varme rekomendi al ĉiuj tiun ĉi libreton.

Sveda kantaro, kolektita de G. Löfvenmark. Unua kajero. Sala, Svedujo. Eldonejo de E. L. Son Fine. 39 paĝoj, prezo: 0,50 fr; kun notoj 1 fr.

Tiu ĉi kantareto enhavas 16 patrolandajn kaj popolajn kantojn, 12 kantojn diverstemajn kaj 2 religiajn. Estas tre dankinde, ke oni eldoni, ankaŭ ekzemplerojn kun notoj, por ke ni povu konatiĝi ne nur kun la teksto, sed ankaŭ kun la melodio de la nordaj kantoj. En ĉiuj grupoj oni devas kanti por montri la belsonecon de nia lingvo. Kantu ankaŭ tiujn ĉi kantojn de niaj nordaj samideanoj!


Bericht über den IV. Internationalen Esperanto-Kongreß in Dresden, 16.—22. August 1908, herausgegeben vom Sächsischen Esperanto-Institut Dresden. 80 paĝoj kun 34 ilustraĵoj. Prezo 1 M.

Pri la sukcesplena kvara kongreso ĵus aperis belega lukse ilustrita raporto, kiun eldonis la oficiala saksa esperanta instituto. Tiu ĉi instituto fondita tuj post la kongreso volas montri al ĉiuj ne-esperantistoj per la belega libro la gravecon de nia afero. Tial aperis la libro en nacia lingvo. Ni esperas, ke multaj skeptikuloj legante la raporton fariĝu esperantistoj.


Tra la Filatelio. Internacia monata ĵurnalo. Redaktoro J. Fize, Pastisson Beziere (Francujo). Prezo: 2 fr. jare.

Jam de longe la kolektantoj de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj deziris specialan gazeton por sia fako. Kun granda ĝojo ili sciigos ke nun ekzistas tia ĵurnalo por filatelistoj. La ĝis nun aperintaj numeroj enhavas multajn adresojn de ĝekolektantoj kaj artikolojn pri filatelio. Oni abonu ĉe la redaktoro!





Abio vi, abio vi . . .



La abio.

Abio vi, abio vi,
Kun daŭraj la folioj,
Vi verdas ne nur en somer',
Sed eĉ dum vintro ĉe neĝer'!
Abio vi, abio vi,
Kun daŭra foliaro.

Abio jen, abio jen,
Vi multe al mi plaĉas:
Ho kiel ofte ĝojis mi
Ĉe la kristnaska bril' de vi!
Abio jen, abio jen,
Vi arbo plej amata!


Abio vi, abio vi,
Jen via bon-instruo:
Espero kaj la konstantec'
Konservas forton de junec'!
Abio vi, abio vi,
Vi scias nin instrui.

Elgermanigis P. Christaller.

Kristnaska rakonto.

De Rudolf Baumbach.

Estis iam tre scienca profesoro. Foje li sidis je vespera horo en vasta ĉambro kun profundaj fenestroniĉoj kaj nigrigita volba plafono, de kie malsupren pendis multbraka fera lustro. Sed tiu ĉi ne estis lumiganta, la lumo elfluis el granda, verdeŝirmata lampo, kaj krom tio ruĝa fajroŝajno flamis en la forno; sed la ĉambro estis malhela, malgraŭ la duobla lumfonto. Pres-



kaŭ la plafonon atingis altaj bretaroj, kaj sur ili staris majestaj libreĝoj, porklede binditaj, kaj oportunaj manlibroj kun eluzitaj kovriloj, apude troviĝis argilvazoj, bluverde rustitaj bronzaĵoj kaj ĉiuspecaj objektoj, kiujn naiva homo kutime nomas „rubaĵo“.

Apud la tablo, lumigita per la lampo, sidis la scienculo, kurbigante super libroj kaj paperoj, viro kun alta frunto kaj pala vizaĝo. Li ankaŭ estas verkisto, kaj ĉio, kion li kreas, havas „manon kaj piedon“, estas bona kaj valora. Li ĵus estas verkanta libron pri la kredo kaj supersticio de la popolo, pri

ĝiaj moroj, kutimoj, festoj k. t. p. Li tion faras plene kaj funde. El infanetaj rimoj li restarigas antikvajn sorĉosentencojn, la arbarvirinetojn kaj la koboldojn li metamorfozas je lumaj kaj mallumaj elfoj, kaj el la teruraĵoj, kiuj vagadas dum la ŝanĝo de la sezonoj li eltrovas la antikvajn diojn de la valhalo. Ne estas hazardo, ke li estas verkinta ĵus hodiaŭ, la kristnaskan vesperon, la ĉapitron pri la „ĵulfesto“ de niaj paganaj praavoj. Li elektis tiun laboron por ĉi tiu vespero kaj tiel solenigas nian gajan feston. — Ĉiu laŭ sia maniero!

Sed la laboro ne bone sukcesis. Ŝajnis, ke la plumo estis peza kiel plumbo, ĉar la scienculo ĉiam denove formetis ĝin el

la mano kaj direktis la rigardon al malnova apogseĝo, aŭ pli vere al multkolora brodita kuseno, ornamante la ledoseĝon, kiel fremdlanda floro iafoje ornamas rubamason.

De la kuseno lia rigardo glitis al du malgrandaj figuretoj starantaj sur librobreto kaj amuze kontrastantaj kun la volumoj. Unu el ili estis episkopo, fabrikata el papero kaj kotonvato, kun mitro (episkopa ĉapo) kaj kurba bastono, la alia estis nigra timegulo kun longa ruĝa lango: la du figuretoj do reprezentis sanktan Nikolon kaj lian serviston. Fine la migranta okulo de la sola viro aliĝis al granda skatolo, portata de li domen sub la mantelo dum la krepusko. Ĉar tiu ĉi skatolo nur estos malfermata, kiam la rakonto finiĝos, tial ni jam nun konfide diras al la leganto, ke ĝi enhavas kristdonacojn, ludilojn, bildlibrojn kaj sukeraĵojn.

Por kiu?

Ja, por kiu? nun mi devas iom pli detale rakonti.

Kiam la scienculo enloĝis siajn nunajn ĉambrojn, li komisiis la prizorgadon pri ili al la virino, kies luanto li estis. Ŝi estis vidvino kun malgranda rento kaj kun ĉambro, plenigita de infanoj. La plej maljuna estis knabino de ĉirkaŭe dudek jaroj, nome Elizabeto, la plej juna estis sovaĝa knabo, kiu ankoraŭ kun ardeza tabulo, la sponĝon alligitan, iris lernejon. Dome li pleniĝis siajn liberhorojn per bruigado sur la ŝtuparo aŭ per terenrajdado sur la balustrado. La bruemeco de la bubeto fariĝis la komenco de amika rilato inter la luanto kaj la familio. Ĉar, kiam fojon la scienculo, malhelpata en sia laboro, supreniris la ŝtuparon por kulpigi la tumultulon ĉe lia patrino, li ne trovis ŝin hejme, anstataŭ ŝi, li renkontis la belan Elizabeton. Nun li perdis la kuraĝon esti la kulpiganto.

Balbutante li ion diris pri la vetero kaj la vento, hipokrite li laŭdis la viklecon de la knabo kaj fine petis je skatoleteto de alumetoj. Kun ili li malsupreniris en sian bibliotekon — kaj la inteligenta legantino ion divenas.

Ne nur tiu ĉi unu vizito okazis. La sola viro nun subite havis ĉiuspecajn bezonojn, ne konatajn de li antaŭe, kaj malofte finis tago, sen lia frapado al la pordo de la vidvino. En la supera etaĝo oni volonte plenumis liajn dezirojn, kaj la scienculo sin montris dankema, malŝpare helpante la duan filon je liaj latinaj kaj grekaj tradukoj, kaj ĝojigante la malgrandajn geknabojn

per donacetoj. Kun la bela Elizabeto li nur malmulte parolis, sed al la infanoj li rakontis fabelojn kaj terure belajn raportojn pri marvojaĝantoj, ĝigantaj serpentoj kaj kanibaloj. Por la infanoj ankaŭ la granda skatolo estis destinata. Li intencis porti ĝin supren kaj meti ĝin antaŭ la pordon de la ĉambro, kie la malgranduloj ĝojegos ĉirkaŭ la kristarbo.

La leganto nun ankaŭ scias, kiu brodis la kusenon, kiun la sola viro nun denove atente rigardis. Ĝi estis ornamata per brodita litero „E“, ĉirkaŭata de floroj, kaj la saĝulo ne sciis, ĉu tio ĉi signifis „Ernesto“ (lia antaŭnomo) aŭ „Elizabeto“. Li mantuŝetis sian altan blankan frunton kaj iom ridetis. Estis ĉarma imago, preterflugante lian animon, sed li skuis la kapon kaj movetis la manon, kvazaŭ por forviŝi ion.

En la libroj, de li amasigitaj, loĝis potencaj fantomoj, kaj la izolulo komunikigis kun ili, kiel kun siaj samspeculoj. Tiuj ĉi fantomoj forigis lin de la suna vivo, kaj kiam li provis moviĝi inter la infanoj de la mondo, tiam li estis mallerta kaj timida, precipe se la infanoj de la mondo havis blujajn okulojn kaj blondajn harplektojn.

„Bonan vesperon“, neatendite aŭdiĝis du viraj voĉoj samtempe, kaj la pordon eniris du stranguloj, tute similaj al la du figuretoj sur la librobreto.

„Bonan vesperon, profesoro“, ripetis tiu, kiu estis vestata kiel episkopo. „Vi do permesas, ke ni varmiĝas ĉe vi? Estas malvarme ekstere“.

La alparolata rigardis mirigite jen la unuan jen la duan. „Ĉu mi havas la permeson demandi, kiu honoras min per sia vizito?“ „Tion vi dece devus scii“, diris Sankta Nikolo, „vi estas scienca viro kaj ne estos trompita de ia maskiĝado. Nun atentu, ni tuj senvestiĝos!“ Kaj subite antaŭ la surprizita profesoro staris anstataŭ blanka barba episkopo ĝiganta, unuokula viro, kies kapo estis ombrigata per larĝa ĉapelo. „Ĉu vi nun konas min?“ demandis la stranga gasto?

La scienculo profunde riverencis. „Vi estas Vodan, kaj tiam via akompanulo estas neniu alia, ol la malbona Loke.“

„Maltrafe“, diris la dua kaj alpaŝegis en tia maniero, ke la domo ŝanceliĝis. Li nun havis brulruĝan barbon kaj flamŝprucajn okulojn, en la zono li portis martelon.

„Azator!“ ekkriis la profesoro, „kaj ne Loke! Kiel do oni sin povas trompi! Permesu, ke mi tuj korektas tiun eraron.“ Li sin turnis al sia skribotablo, sed Tor frapegis per la manplato sur la tablon tiel forte, ke la inkujo eksaltis kaj verŝis nigran rivereton super la skribadon.

„Tor“, Vodan diris malaprobante, „ĉu vi neniam lernos bonajn manierojn? Pripensu, ke ni estas ĉe viro, kiu nin ŝatas.“ Tor ion murmuretis en sian barbon kaj forviŝis la inkon per sia maniko. „Kio koncernas la malbonan Lokeon“, Vodan daŭrigis, „vi ne tute eraris, saĝa profesoro, ĉar li ankaŭ estas en mia sekvantaro, li ekstere, antaŭ la pordo, haltigas la veturilon de Tor. Krom tio, li ne plu estas tiel malbona, la malfeliĉo kvietigis lin. — Nun aŭskultu! Vi estas brava viro, vi penadas pri ni kaj vi montras al la sendankaj homoj, kiuj vere estas kaŝitaj post iliaj malspritaĵoj fantomoj. Tial ni decidis viziti kaj danki vin. Se ne estus pasata la bona iama tempo, ni estus alportintaj gastdonacon, sed ni estas malriĉaj, eltronigitaj Azoj, kaj la Rejn-oro jam de longe forkuris el niaj fingroj. Malgrandan afablaĵon tamen ni volas al vi havigi, tuj, kiam ni estos plennombraj. Kie ŝi nur estas restinta?“

„Kial do la virinoj neniam estas pretaj je la difina horo!“ murmuregis Tor, la fortulo.

„Ni pasigu al ni la tempon tiel bone kiel eble. Ĉu vi ne havas trinkaĵon, profesoro?“

La profesoro bedaŭris, ke li nur havis akvon por siaj moŝtaj gastoj. „Nu“, diris la fortegulo, „mi tion antaŭvidis kaj mi mem zorgis pri bona trinkaĵo“. Dirante ĉi tiujn vortojn li streĉis sian manon sub la tablon, ĉe kiu la dioj estis sidigintaj kaj eltiris korneĝon bone plenigitan: „Jen, trinku, profesoro!“

Ricevinte la trinkokornon la scienculo obeeme longe trinkadis. „Ne malbone“, li diris, „kaj donis la kornon al proksimumo.“ Sed Tor per la martelo frapis la tablon kaj tondris: „Silentium!“

Sinjor' profesor'
Ne legas hodiaŭe,
Tial estas pli bone
Oni trinkas ĉirkaŭe.
Edite, bibite — — —

„Haltu, „ekkriis la sciencisto“, tio estas anakronismo. Kiel Azo povas“ — — „Ho nu“, ekridis Vodan, iom levetante sian

molan ĉapelegon, ĉar la apuda forno lin tro varmigis. „Ho nu, en tiu ĉi nokto ĉio estas permesata. Sed aŭdu, ŝi estas venanta!”

Denove la pordo malfermiĝis kaj eniris maljuna sulka virino. Ŝiaj haroj ĉirkaŭis la kapon kiel aranea teksaĵo, kaj nazon ŝi havis — je duono da ulno.

„Sinjorino Berĥta“, la saĝulo ĝoje rimarkis, ĝentile levigante. „En la sudo nomata sinjorino Berĥta, en la nordo sinjorino Holda, estu bonvenanta, kaj — lia parolo subite haltis, ĉar la maljunulino aliformiĝis je floranta virino kun radiantaj

okuloj. Ŝi portis veston briletantan kaj en siaj flavaj haroj ŝi havis kroneton de linfloroj. „Ho!” Ion similan la profesoro ne vidis dum sia tuta vivo.

„Ĉu mi plaĉas al vi“, demandis lin sinjorino Berĥta, kaj ridetis tiamaniere, ke la malfeliĉa profesoro sentiĝis tute konfuzata. Nun Vodan per fortaj brakoj premis la belulinon al sian bruston kaj donis al ŝi tre aŭdeblan kison, kaj ŝi ridis je tio. „Ĉu tio ne estas malrespekta“, pensis la scienculo, „kaj vere, mi imagis la diojn iom alie“.

„Nun antaŭen“, diris Tor levigante. „Baldaŭ la sonoriloj komencos sonorileti kaj tiam nia restado finiĝos. Pretiĝu, profesoro!“ „Pretiĝi? Pro kio?“

„Ni preparis por vi grandan honoron“, diris Vodan. „Vi devas akompani nin dum nokta nuboveturado. Hi, kiel vi miros, kiam ni antaŭen veturas super la ondiĝemaj montarbaroj, pli rapide ol la nordventego, sube la urboj de la homoj, supre la steloj, kiel dispolviĝantaj fajreroj“. „La sovaĝa ĉasado“ ĝin nomas la malsprituloj. „Pretiĝu kaj elektu: ĉu vi volas sidiĝi sur la veturilo de Tor, aŭ ĉu vi preferas rajdi kun mi sur mia okpieda blanka ĉevalo?“



„Karaj gastoj“, la profesoro respondis, „mi scias ŝati la honoron de via vizito. Sed koncerne la noktan veturadon, mi decide dankas. Mi ne povas rajdi, veturante mi ne povas sidi dorse, krom tio mi suferas je kapturino. Ne koleru, sed mi restos tie ĉi.“

„Kiel“, tondris Tor, „vi rifuzas la honoron akompani nin?“ Liaj okuloj ardis kiel karboj, minacante li eklevis la martelon.

„Ne incitu mian Azo-koleron, aŭ mi frakasos vian kapon kiel malplenan nukson.“

„Estu saĝa“, sinjorino Berhta admonis, „mi jam de longe deziris la ĝojon de unuhoreta promenveturado kun tia scienculo. Nenia malbono alvenos al vi, kaj antaŭ la unua kokokrio ni vin sidigos ĉe via dompordo. Venu, donu al mi vian brakon.“

„Ĉeesti vi devas“, decidis Vodaŭ, „vi devas nin vidi en nia iama majesteco, por ke vi povu raportari pri ni. — Ho, li volas forkuri! Kaptu lin, Tor.“

La ektimigita viro estis celinta atingi la pordon, sed Tor lin antaŭiris, ekkaptis lin ĉe la kolumo tiel forte, ke la kudraĵoj de la vesto kraketis kaj eklevis lin, kiel ĉasisto kutimas preni pafitan leporon. Sinjorino Berhta apogis siajn blankajn brakojn sur la koksojn kaj aŭdigis sonantan ridadon. „Tenu lin firme! Ne lasu lin fali! Kaj nun for, estas plej urga tempo.“

Jen la trian fojon la pordo malfermiĝis. Eniris tiun fojon ne monstro, sed anĝelo, ĉirkaŭfluata de lumo, portante lilion en sia mano. Kune envenis knabeto kun ora sanktbrilo kaj la scienculo sciis, kiu estis la infano.

Tor lasis sian kaptajojn kaj la tri azoj elkriis lamentan vokon, enpenetranta ostojn kaj cerbon de la klerulo. Tiam la gigantuloj videble malgrandiĝis, ili iom post iom nebuliĝis, fine ili eliris kiel blueta nubo tra la pordo malfermita.



La profesoro frotis al si la okulojn. La noktaj fantomoj malaperis kaj nur la inkmakulo sur la manuskripto pruvis la viziton de la azoj. La anĝelo kaj la knabo estis restantaj, sed ili aliformiĝis. De la kapo de la knabo malaperis la ora radio-krono kaj la anĝelo, anstataŭ helan vestaĵon, portis malluman lanveston kaj neĝoblankan antaŭtukon.

„Ho Elizabeto, mia bona anĝelo!“ ekkriis la viro, rapide levigante. „Vi forpelis la fantomojn, restu ĉe mi kaj forpelu ankaŭ en estonteco la koboldojn svarmantajn ĉirkaŭ mia kapo“. La knabino rigardis la viron kun grandaj, demandaj okuloj de infano. Kion do li diris de fantomoj, forpelotaj de ŝi, tion ŝi ne komprenis, sed kiam li ŝin dolĉe altiris, ŝin kisis vortojn de amo parolante, tiam ŝi lin komprenis, kaj ŝi ĉirkaŭplektis per siaj brakoj lian kolon. La bubeto havis mirigatan mienon, sed la kristnaska donacado al li ŝajnis pli grava ol tio, kio okazis tie ĉi. Malpacience li piedmovetiĝis ĉiam ripetante: „Kaj panjo petas suprenveni, la kristinfano alvenis. — Kaj jen, kia granda skatolo!“

„Prenu ĝin“, diris la feliĉa viro, „kaj antaŭen kuru.“ Tiam li ĉirkaŭprenis la knabinon kaj diris: „Venu, ni iru al la patrino.“ Kaj tiam ili iris al la patrino.

Sed la nigruleto, starante apud la papera episkopo sur la librobreto, entiris sian ruĝan langon kaj diris: „Tio estis gaja vespero, sed plej bone al mi plaĉis la fino.“

Kaj Sankta Nikolo konsente balancis la kapon.

Trad. de Marie Hankel.





La sankta nokto.

Paca nokt',
Sankta nokt', — —
Ĉio en dorm' — —
Gardas nur

Jen la kara sanktega par'.
Ĉarma knabeto je bukla har',
Dormu en paca kviet',
Dormu en paca kviet'!

Paca nokt',
Sankta nokt' — —
Anĝelhor'
Vekas nun

Paŝtistaron solena per kant'.
Laŭte gloras ĉiu aŭdant':
Jen la Savonto, la Krist',
Jen la Savonto, la Krist'!

Paca nokt',
Sankta nokt' — —
Dia fil'
Kiel Vi

Kore ridas, montrante al ni
Ke la savo ekvenis kun Vi,
Venis je Via naskiĝ',
Venis je Via naskiĝ'!

Tradukis Thiel.



Nokto de l' sanktigo.

Sankta nokto benegata!
La konfuzon nun de l' mondo
Kovras viaj amflugiloj —
De l' grandaĵo en la rondo
Sin mallevas dolĉa sonĝo,
Sur la kreon jam espero.
Nun pli ĝoje migras tero
Ĝian vojon ĉiutagan,
Ĉar ĝi spertos feliĉegon,
Savon diodevenotan
En la nokto benegata.

Sankta nokto benegata —
Dum la homojn antaŭsento
Ĉirkaŭprenas, kaj l' anĝeloj
Flugmovadas en silento
Feliĉege tra l' aero:
Jen radias de l' ĉielo
La klarega, luma stelo!
Nun ĝojegu — dio faris
Interligon kun la mondo
De eterna daŭrigado
En la nokta benegata.

Sankta nokto benegata —
Vidu — dio ekbruligis
Patre lumon de la mondo;
Religota estu ĉio,
Per la kulpo disigita!
Jam ekfloras sanktaj floroj
Nove en disciplinaj koroj,
Kaj en diaj, puraj flamoj
Ardas ĝi — ĉar plej altega
Estas beno donacata
En la nokto benegata.

Hermany.

Vojaĝo al la Kanariaj Insuloj.

(Fino).

La tre malnova ĝardeno inter altegaj, dikaj muroj sole sufiĉus por stampi „La Paz“ por la plej idilia restadejo! Inter pratempaj arboj kaj arkadoj de rozoj kaj vino bonodoras amasoj da violoj, ĝeranioj, oranĝaro kaj arbforme kreskata heliotropo, en kiuj kantas la kanariaj birdoj — la malgrandaj verdaj kuzoj de nia eŭropa ora domamiketo —; la upupo gravamiene paŝadante sur la herbokovro, eksonigas sian karakterizan vokon. La plej sorĉa originalaĵo de „La Paz“ estas alta cipresa aleo, kun viralta metrolarĝa mirta barilo, kiu gvidas de la bela perono de la domo ĝis dua alta muro, superstarata de palmoj. Malfermiĝante ĝi permesas la eliron sur mallarĝan plataĵon, de kie ŝtonego de 150 metroj krute deklivas je la maro.

Tie ni observis ian fojon subigante belegan kolorludon. La ruĝa suno subiris malantaŭ „La Palma“. Tiu ĉi insulo, kiun oni tage ne povis vidi, akre sin projekciis sur la horizonto. Subite la ĉielo, la montoj, la tuta pejzaĝo estis superverŝita de malhela siringblua koloro, iomete paliĝinte en la malproksimeco.

La ombra flanko de la kontraŭe kuŝanta insulo kaj la maro antaŭ ĝi estis grizbluaj kaj ŝajnis glacimaro, dum la arduĝa sunglobo forsendis rozan strion laŭlonge de la horizonto.

La sentado de dia malkaŝo de l' beleco viviĝis en nia animoj, kaj emociataj de tiu ĉi magia simfonio de koloroj, ni staris mutaj ĝis la lastaj radioj de la malleviĝanta suno paliĝis. —


* * *

Ĉiun trian aŭ kvaran tagon ni enrajdis la belan landon.

Mia patro kaj mia bofrato, ambaŭ naturesploristoj, ĝuis la riĉan trovaĵon de maloftaj kreskaĵoj kaj semoj, ĉar ankaŭ en tiu rilato la kanariaj insuloj estas neelĉerpebla mirakla lando.

Tie ĉi mi devas citi arbon de tute originala speco, nur ankoraŭ ekzistantan sur la Kanarioj: la drago aŭ drako arbo, (lat. *Dracaena Draco*). Precipe kun miro estas rigardataj de ĉiu fremdulo du el ili, unu troviĝanta en „Jcod“, la alia en „La Laguna“. Ili havas pli ol 2000 jarojn, tiuj ĉi ĝigantaj arboj estas ŝajne, simile al la elefanto kaj la hipopotamo, restaĵo el de longe malaperinta antikva periodo.

Eĉ botanika ĝardeno ekzistas en la „Valle de Taoro“ inter je kvar metrojn altaj muroj kaj kradoj, volverampataj de rozoj kaj pelagonioj. Bedaŭrinde ĝi estas multe pli grandioza tropika



Cañadas.

parko ol ĝardeno de scienca valoro.

Samtempepentrindan kaj malĝojan impreson faras multaj ruiniĝontaj bienoj, devenante de la profitriĉaj jaroj de la „cochenille“-kulturado, al kiu poste la anilino sukcese faris konkuradon. De tiu tempo la oraj tagoj malaperis por ĉiam.

Hodiaŭ oni kulturas precipe bananojn, kafon, vinon, oranĝojn kaj bonegajn

terpomojn, kiuj sub la nomo de „Malta-terpomoj“ eniris la komercon.

Krom tio ankoraŭ fiŝkaptado estas entreprenata. Ĉasindaj bestoj ne ekzistas, same ankaŭ neniam rabobestoj. Ankaŭ serpentoj, skorpioj, moskitoj, kiuj povas malbonigi la plej belan restadejon, mankas tute sur la feliĉaj insuloj.

Marregante, frapante en la ĉarmplena fremda cirkaŭaĵo altrudas sin al la rigardo la kolosa, germana hotelo „Toaro“ aŭ „Humboldt Kurhaus“ per sia moderna eksteraĵo. Ĉirkaŭata de ĉiuspecaj sportplacoj ĝi eĉ posedas malgrandan kurvojon („sortija“ — signifas ĝuste dirita „ringo“) sur kiu ĉeval- kaj azenkuroj kun ringpiked estas aranĝataj.

Vespere balo okazas. Cetere, kiu havas la deziron, povas danci du fojojn semajne, kaj pro la ĉiujare pligrandiĝanta internacia komunikiĝo en Tenerife li povas samtempe ekvidi kaj admiri la plej elegantajn tualetojn.

Volonte ni estus ĉeestintaj ankoraŭ la originalan florfeston — la 18^{an} de Junio, la tempo de la tranĉmatureco de la greno — en la bela „Villa de Orotava“, sed bedaŭre la adiaŭa horo eksonis.

Unu semajnon daŭras la preparadoj por tiu ĉi „fiesta de flores“. Altajn arkadojn oni starigas, ili estas ĉirkaŭplektitaj de spikoj, kaj ornamitaj per flagoj kaj flagrubandoj, nokte ili brilas en la lumo de sennombraj elektraĵ lampetoj. La mezon de la stratoj kovras longa multkolora tapiŝo de bela desegno. Sed ne estas teksaĵo, la fakoj de l' desegno konsistas el florfolioj — oni ne scias, kion pli admiri: la floriĉecon de la insuloj aŭ la artamecon de la loĝantoj! De la fenestroj kaj de la flanko



Tapiŝo de florfolioj.

oni povas admiri ĉi tiun feinan flortapiŝon, nur sternitan por la paŝado de la sankta procesio. Piegaj sinjorinoj el eminentaj familioj kutimas genufleksante persone ornamu la sanktan procesion.

Do fine ni devis disiĝi. Ni ne plue enspiros la delikatan aeron, plenigitan de bonodoro, de nun ni ne vidos nur belajojn de mateno ĝis la malfrua vespero, plue ni ne aŭdos la gajajn, incitetemajn kantojn de la amindaj „islenos!“

Ree ni veturis tra la grandiozaj aleoj de „eucalyptus“ kaj korkkverkoj, ree sur la belega „carretera“, laŭlonge de la nigraj, pintitaj, lafaj rifoj de la 2000 m alta „cordillera“, sed per tute aliaj okuloj ni rigardis nun la ĉarmriĉajn pejzaĝojn, ĉar ni konatiĝis kun la detaloj.

Nur la montegon „Pico de Teyde“ el diversaj motivoj ni bedaŭrinde ne povis supreniri. Miaj gefratoj, jam suprenirintaj, rakontis entuziasme, kiel subigante grandioza estas la perspektiva rondrigardo sur la tutan arĥipelon, la verdajn insulojn dissemitajn en la blua oceano, — sur la ĉarmajn pejzaĝojn de la profundlando, strange kontrastantaj je la vastaj lafaj dezertoj kaj neĝregionoj.

Ni veturis tiun ĉi fojon ĝis „La Laguna“), kie ni noktis en beleta ĝermana hotelo, por entrepreni la alian matenon ekskurson tra la fama laŭroarbaro de „Mercedes“ en la montaron de „Anaga“.

Laŭroarbaro ne estas belaĵo, ĝi nur estas fama pro strangeco, des pli granda estis la plezuro trarajdi la „Anagaĉenon.“ Vere, la arĥipelo meritas sian nomon „insulae fortunatae“ (feliĉaj insuloj) al ili donita jam de la maŭretana reĝo Juba II, en la jaro 40 antaŭ Kristo.

Ĉe la kapelo de sankta Mario ni malsupreniris de niaj grizbestetoj por ripozi kaj por ĝui la perspektivon. Subite blankaj nebuloj alĉasis kaj en kelkaj minutoj ni tute estis kovritaj de ili. Ni decidis returni al nia hotelo, sed mia bofrato deziris daŭrigi la ekskurson, sciante, ke ĵus je tiuj ĉi tagoj en ne tro malproksima loko floros malofta kreskaĵo. Kun la plej maljuna gvidisto li forrajdis. „Ankoraŭ hodiaŭ vespere, aŭ plej malfrue morgaŭ matene mi estos en St. Cruz!“ li elvokis, kaj niaj poŝtukoj flagetis ĝis lia blanka vestaĵo malaperis malantaŭ flekso de vojo. Ĝis hodiaŭ miaj gepatroj kaj mi ne revidis lin, ĉar li ne revenis ĝustatempe antaŭ nia forveturo.

Dum nia tagmanĝo en la hotelo de La Laguna subite eniris la ĝermana konsulo el St. Cruz, nin sciigante, ke nia vaporŝipo estis tro plenigata, sed ke vaporŝipo „Lucie Woermann“ albordiĝos en la haveno de St. Cruz post kelkaj tagoj. Kompreneble ni tiam devus esti tuj pretaj kunveturi.

Post la manĝo ni veturis kune kun la konsulo tramvoje malsupren al St. Cruz. En la radiantanta juniosuno la ĉefurbo tute alie efikis ol iam, je nia alveno en Februaro, kaj mia fratino ĝojis, ke ni ricevis ankoraŭ tiun ĉi sunan impreson de St. Cruz. Cetere ni havis la feliĉon, ke ĵus ia pli granda „fiesta“ estis


*) Tio estas la sama „La Laguna“, kie estas fondita antaŭ unu jaro „Esperanto Grupo.“

festata. Senfinaj procesioj trairis la stratojn, kaj vespere koncerto okazis sur la „plaza de la Constitucio“, ĉe kies fajra muziko la eleganta mondo de St. Cruz promenis. Lacigite oni povis ripozi je unu el la laŭlongaj flankoj sur luitaj seĝoj, dum je la kontraŭa flanko liberbenkoj estis starigitaj por la popolo.

La profundblua stelsemita suda noktĉielo kaj la maro kiel fondo formis harmonian ĉirkaŭaĵon por la bela „plaza“, kie la superelegantaj, laŭ la plej nova modo vestitaj hispaninoj promenis kokete kun iliaj adorantoj. Ĉarma, memorriĉa adiaŭa vespero.

La alian matenon ni aĉetis ankoraŭ diversajn objektojn de la mondfama „Calado-brodaĵo“ — ni jam provizis nin en Orotava — kaj posttagmeze ni estis invitataj de la germana konsulo.

Ni ĵus estis tien irontaj, kiam la kelnero raportis, ke la ŝipo por la germanoj alvenis, kaj nur restos unu horon.



„Sortija“.

Se la aminda konsulo ne estus ree helpinta, ni ne estus finintaj tiel rapide la malsimplan pakadon.

Tiu ĉi pleje rapidigita forveturo tamen iom forhelpis nin je la grava adiaŭo, grava ne nur pro la disiro de miaj gefratoj,


sed ankaŭ de la tuta paradize bela nova mondo, kiun ni estis favoritaj koniĝi.


Mia bofrato ja ne estis reveninta, kaj nun ankaŭ mia fratino kaj la konsulo, kiuj akompanis nin al la bordo de nia ŝipo, devis returni per ilia malgranda boato.

Ankoraŭ unu lasta saluto kaj mallaŭte, apenaŭ rimarkeble ekmovis la „Lucie Woermann.“

Baldaŭ malaperis antaŭ niaj rigardoj la reve bela Tenerife, sed en nia memoro ĝi restos neniel forigebla. Fidela memoro — ĝis la revido!

Paŭla Nobbe-Tharandt.





La grafo Zeppelin.

La kvina de Aŭgusto de tiu ĉi jaro estis maldolĉa tago por Germanujo. Ĉie oni vidis seriozajn mienojn, ĉagreno kuŝis sur la trajtoj de la homoj, malgaje ili trairis la stratojn, staris en grupoj, legis afiŝojn. En la restoracioj oni nek ludis, nek babiladis. Kio do okazis? Ĉu eminentulo mortis? Ĉu ia granda banko bankrotis? Kial la tuta nacio funebras? — — La aerŝipo de la grafo Zeppelin bruliĝis! — De la Bodensee ĝis Mainz la grafo intencis veturi per la nun fine direktebla ŝipo, la loĝantoj de tiu ĉi distrikto sekvis la maltiman aerturiston kun liaj fiduloj per la okuloj, la aliaj germanoj lin akompanis kore kaj anime. Kaj nun la ŝipo bruliĝis! Kiam la unuaj telegramoj venis, oni ne certe sciis, kiamaniere la malfeliĉo okazis, oni nur legis: La grafo estas vivanta, sed senkonsola! Nun ia granda komuna sento kaptis milionojn da koroj: vivega kompatato! Kompatato je viro laboradinta dum multaj jaroj por sia ideo, je viro kiu solvis unu el la grandaj problemoj de la homaro kaj nun vidis la pereon de sia tuta laboro.

Por bone kompreni la grandegan emocion, oni bonvolu pripensi la tutan fariĝadon. Antaŭ unu centjaro leviĝis la unuaj

„Mongolfieroj“ kaj „Blanchardoj“, la homoj preskaŭ frenezigiĝis pro admiro kaj espero. Sed la dua solvo de la problemo ne estis trovebla: la direktado, la ebleco veturi kontraŭ la vento! La 19^a centjaro estis vera jaro de eltrovaĵoj, ŝajnas, ke la knaboj ĉiuj naskiĝis kun inĝeniera talento, ili ĉiuj estis malgrandaj elpensintuloj. Ofte oni diris al talenta knabo: „Vi iam elpensos la direkteblan aerŝipon!“


Tamen la knaboj fariĝis viroj, ili elpensis mirindajn maŝinojn, sed ne la aerveturilon. La espero perdiĝis, la intereso por la afero ekdormis, la aeronauta milita sekcio estis flanka afero kaj ne altiris grandan atenton.

Sed la ideo mem ne perdiĝis. Ĝi vivis en la animo de juna nobelo, la grafo Ferdinando de Zeppelin. Li naskiĝis la 8^{an} de Julio en Konstanz ĉe Bodensee, kaj elektis 20 jara la militan karieron. En diversaj militiroj li montris kuraĝegon kaj riskemon, dum lia partoprenado al la kombatoj en Nordameriko (1863) li havis okazon kunsupreniri en katenbalono. De tiu ĉi tempo la ideo de direktebla aerŝipo lin ne forlasis. Antaŭ la komenco de la milita kariero la nobela junulo vizitis kelke da tempo la teknikan lernejon en Stuttgart, tio al ni montras lian inklinton. Dum dek jaroj li nun senĉese pensis, kalkulis kaj meditis, en la jaro 1873 la plano estis elpensita. Sed nur en la jaro 1890 la grafo ekŝiĝis el la oficira kariero, de tiu ĉi tempo li tute sin dediĉis al la efektiviĝo de la granda ideo. Sekvis jaroj de senlaca laborado. La ofero de granda parto de lia havo, la akiro de fremda mono kaj ĝia administrado, la instruado de metiistoj kaj laboristoj pleniĝis la vivon de la grafa inĝeniero. Li lernis uzi la ecojn de aluminio kaj de benzino, li trovis la helpon de sindonaj kunlaborantoj. Unu eksperimento post la alia ne bone sukcesis, ĉiam denove li komencis. La moko ne mankis: li estis utopisto, maluzante forton, monon kaj tempon. Sed obstine li iris sian vojon al la deziregata celo, kaj fine, preskaŭ surprize por la mondo li solvis la problemon. Lia balono estis direktebla, obeeme ĝi sekvis la direktilon, iris kien ĝi devis kaj revenis kiel bone dresita ĉevalo al sia ejo. La dubema, singardema, nekredema germana popolo aŭdis, vidis kaj miris. Ne eble! Tamen fakto! La ŝipo taŭgas kaj estas uzbla. La Wuertembergaj gereĝoj riskas vojaĝon per la aerveturilo — kia konfido, kia alta aprobo!

Pli granda vojaĝo devis sekvi, grandaj longaj vojaĝoj ja estas la klare kaj ofte de la grafo pronuncata celo de l' direktebla balono. Oni ne konis la precizan daton, telegramoj ĝin anoncis ĉien. En tiu ĉi momento de la plej alta simpatio okazis la terura akcidento! — Post kelke da tagoj, aŭdinte ke la grafo nek perdis la kuraĝon, nek timas novan laboron, la germana popolo eksplodis en neaŭdita entuziasmo. La kompatato ŝanĝis je pasia helpamo, el miloj da fontoj elfluis mono, la monon oni akompanis de sennombraj vortoj de aprobo kaj laŭdo. La nobla karaktero de la grafo, lia persisto kaj energio lin faris heroon. Krom tio oni sentis, ke al la homa intelekto prosperis nova venko. Prometeŭs' al Zeŭso rabis fajrero por feliĉigi la homojn, Franklin katenis la fulmon, foriginte de la homoj timigan teruron, Zeppelin lernis regi aeron kaj ventojn, li ankaŭ solvis problemon!

Ni iras saman la vojon
 Al sama celo kun li,
 Se vane unuan la fojon,
 Denove komencas ni,
 Havante fervoran dediĉon
 Por krei la homan feliĉon.

Marie Hankel.





Richard Wagner.

De fraŭlino Apitz.

Kian belegan sonon enhavas tiu ĉi nomo! Hodiaŭ eble la plejmulto el la germana popolo konas ĉi tiun nomon, escepte eble senartaj, malriĉaj kamparanoj, vivante en solecaj malproksimaj anguloj. Kiu muzikema grandurbano, ĉe la citado de Richard Wagner en sia fantazio ne aŭdas tuj ian el liaj belegaj ensorgantaj opermelodioj? Krom lia mondgloro kiel genia muzikverkisto akiris al li unuan lokon en la koro de la germana popolo la elekto de temoj el la patrolanda tradicio. Ĉiuj liaj verkoj pri-traktas epizodojn el la norda aŭ germana malnova literaturo, ekzemple „Der fliegende Holländer“ (La fluganta Holandano), „Tristan und Isolde“, „Die Meistersinger“ (La majstrokantistoj), „Tannhäuser“, „Nibelungen“, „Parsival“.

Richard Wagner estis Sakso, li naskiĝis la dudekduan de Majo en Leipzig, kie la patro baldaŭ mortis post la naskiĝo de la filo. Ĉar la patrino pli malfrue denove edziniĝis kun la aktoro Geyer en Dresden, Wagner frue venis al la laŭdita „Elbflorenz“, al la lulilo de sia iama gloro. Ankaŭ lia dua patro baldaŭ mortis, Richard tiam estis sepjara. [La knabo poste vizitis la gimnazion „Kreuzschule“ (kruclernejo) kaj oni projektis por la talenta knabo la studadon de la filologio. Lia vigla fantazio sin montris frutempe, ankoraŭ kiel lernanto li verkis tragedion, en kiu li lasis morti kvardekdu homojn kaj por havi la necesajn personojn por la daŭrigado de la dramo, li fine devis reveniĝi iliajn fantomojn. Tiaj poetaj provoj gvidis lin jam tiam al la muziko kaj la fama Dresdena kapelestro kaj eminenta komponisto Karl Maria von Weber fariĝis la idealo de la juna Richard Wagner.

Denove transloĝiĝinte al Leipzig la dekkvinjara knabo en la Nikolaigimnazio nur malbone progresis, kaj en sekreta pensado li jam diris adiaŭon al la filologio. Nova Mondo aperis por li, kiam per la koncertoj en la „Gewandhaus“ (antikva nomo: drapovendejo) li konatiĝis kun la sinfonioj de la heroo Beethoven. Tiuj ĉi verkoj faris plej grandan daŭran impreson al li kaj subite la muziko enkateniĝis lin tiamaniere, ke li decidege deziris fariĝi muzikisto. Samtempe la okupado kun la verkoj de Shakespeare allogis lin al la plej sovaĝa fantaziaĵo, delogi lin eĉ al freneza mistikismo. Ankoraŭ li malpaciis kun si mem kaj li batalis pro klareco. Orgenisto Mueller, lia muzikinstruisto, ankaŭ la reĝa kapelestro Dorn kaj la konata komponisto Marschner unufoje antaŭsendis la memstaran suprenirantan forton de la juna Wagner, malgraŭ lia malklareco. Bedaŭrinde la akcepto de lia unua uverturo en Leipzig estis tute ne ĝoja. — La necesan klarecon en la spirito de la juna Wagner kreis la maljuna inda Thomas-kantoro Theodor Weinlig en Leipzig. Plej facile tiu ĉi bonega instruisto gvidis la junan studenton al modesteco kaj al kvieta studado de la kontrapunkto ĝis Wagner fariĝis klara kaj memstara. Dekokjara li nun verkis „Das Liebesmahl der Apostel“ (la ama vespermanĝo de la apostoloj). Wagner jam bonege konis la verkojn de Beethoven kaj Mozart, li baldaŭ prijuĝis Mozart kiel la sanktan heredajon, per kio la germano ĉiutempe konservas sian grandecon kaj majestecon. Fine li ankaŭ konatiĝis kun la verkoj de Bach kaj Haendel. Lia unua publike prezentita opero estis „Das

Liebesverbot" (la malpermeso de l'amo). Jam 1834 ni trovas la junan Wagner kiel kapelestron de la Magdeburga teatro. Li edziĝis kun la juna, bela aktorino Minna Planer, kiu per viva intereso kaj bonaj konsiloj estis lia sindona helpantino, kvankam ŝi ne sukcesis daŭre kompreni la internan esencon de la geniulo.

Wagner poste iris al Königsberg kaj Riga, 1837 li denove vizitis sian Dresdenon, kie li okaze legis la ĵus aperintan libron „Rienzi“ de Bulwer. Tiu ĉi hazardo fariĝis la feliĉo de Wagner. Ĉar li jam antaŭe estis studinta kaj verkinta „La esenco de l' malnova kaj nova teatro“, „La greka dramo“ kaj „Tragedia kulpo“; la legado de historia romano vekis en li la deziregon, komponi ion plej grandan! Per Heine li konatiĝis kun la fabela rakonto „La fluganta holandano“ kaj la fina liberigo de la kulpulo per fidela amo. Tiamaniere „Rienzi“ kaj „Holandano“ en lia animo interbatalis pro formado. Komence li verkis laŭ firma plano sian unuan grandan operon „Rienzi“. Li tiam ankoraŭ pensis, ke tiu ĉi opero nepre devus esti prezentota en Parizo kaj en la kutima luksa teatra eksteraĵo, kiun ankaŭ li opiniis necesa. Trans Pillaŭ, London kaj Boulogne li venis post ventega marveturado Parizon, kie nia amata ĝenia majstro en mizero kaj malriĉeco, ĉe multega laborado pasigis tri jarojn. Bedaŭrinde li tute malsukcesis, ĉar, tion jam Meyerbeer estis dirinta al li, en Parizo sen protektado oni malfacile atingas sukceson. Per la prezentado de la naŭa sinfonio de Beethoven li retrovis 1840, meze de la mizeraj parizaj statoj, sian sanktan, artan fervoron.


Fine li revenis hejmen. Kia ĝojego, kiam li revidis la Rejnjon kaj la hejmajn regionojn. Nun li ankaŭ kunportis el Parizo al Germanlando „La fluganta Holandano“ apenaŭ finita, ja li eĉ projektis „Tannhäuser“ kaj „Lohengrin“. En printempo 1842 li venis Dresdenon. Tie oni prezentis lian „Liebesmahl“ (ama vespermanĝo) kaj tie al la ĝenia komponisto feliĉe ne mankis la necesaj amikoj. La admirata primadono Schroeder-Devrient, la fama tenoristo Tichatscheck (Tiĥaĉek) ebeniĝis al li la vojon. Kompreneble Richard Wagner deziregis prezentiĝi unufoje sian operon Rienzi en Dresdeno, ĉar la tiea teatro jam tiam havis altan rangon. Per la bonvolo de la reĝo Frederiko Aŭgusto II kaj de lia intendanto, Sinjoro de Luettichau li ricevis la permeson prezentiĝi sian operon. Plena de febro kaj ekscito Wagner nun atendis la unuan prezentadon kaj ĝian efikon. La plej brila

sukceso estis lia rekompenco. En oktobro 1842 oni ludis „Rienzi“ kaj la duan de januaro 1843 „La fluganta Holandano“ en Dresdeno. Rilate al la Rienzi-prezentado Wagner skribis la tagon post la operprezentado tre feliĉege al siaj parencoj kaj amikoj en Parizo: „Nun plej karaj infanoj!

En granda rapideco kaj laciĝo mi do almenaŭ devas anonci al vi, kio hieraŭ okazis. Estas al mi pli agrable, ke vi unuafoje aŭdas ĝin de neniŭ alia, ĉar mi devas diri, ke ankoraŭ neniam (kiel al mi ĉiuj certigas) en Dresdeno unu opero estis akceptita unuafoje tiamaniere! Estis ekscito, revolucio tra la tuta urbo. Mi estis ripete elvokita kun entuziasma tumulto. Oni certigas al mi, ke la sukceso de Meyerbeer okaze de sia ĉi tiea ludado de „La Huĝenotten“ ne estas komparebla al la sukceso de mia Rienzi. Postmorgaŭ okazos la dua prezentado, jam eĉ por la tria estas disdonitaj ĉiuj lokoj. Mi estas terure laciĝita, post la dua prezentado mi skribos detale. La ludado estis ravinde bela. Tiĥaĉek, Sino Devrient, — ĉio — ĉio en unu perfekteco — kiel oni ĝin tie ĉi ankoraŭ neniam spertis. Triumfo, triumfo! Vi bonaj, fidelaj animoj! La taĝo krepuskis! Ĝi devas sur vin ĉiujn lumi!

Dresdeno, la 21^{an} de oktobro 1842.

Via Richard.




Aerŝipaj fotografaĵoj.

„Se mi veturas per nia aerŝipo, mi ĉiam laboras“, diris al mi antaŭ kelkaj tagoj mia amiko P.

„Vi laboras en la aerŝipo dum la veturado! Mirinde, apenaŭ kredeble!“

„Ho jes! Oni ne nur veturas per aerŝipoj por havi plezuron,



La urbo Aŭssig en Bohemujo el alteco de 400 metroj.

sed oni ankaŭ uzas la aerŝipveturadon por multaj tre gravaj aferoj helpantaj la homan laboradon, studadon kaj serĉadon.“


„Sed vi ja estas kuracisto! Kiel vi povas helpi iel?“

„Mi fotografas ĉion, kion mi vidas el la aerŝipo, se mi kredas, ke tia fotografaĵo povas esti utila por ia celo. Kaj efektive jam la duan fojon scienculoj estis al mi tre dankemaj por miaj bildoj.“

„Ho, nun mi komprenas; vi faras fotografaĵojn por militistaj celoj!“

„Ne, tute ne! Mi diris, ke scienculoj dankis al mi, ĉar tiuj ĉi bildoj estas tre interesaj por geologiaj kaj meteorologiaj

demandoj, sed ne nur por tiaj aferoj, ankaŭ por multaj aliaj studadoj! Eĉ industriistoj estas dankemaj al ni por niaj fotografaĵoj kaj la termezuristoj kaj geodeziistoj tre ĝojas pri ili. Kaj fotografaĵojn, kiujn ni faris super la nuboj, aŭ fotografaĵojn de la nuboj rigardas mia amiko Ŝ. ĉiam kun granda intereso kaj estas tre ĝojigita, se mi donacas ilin al li por liaj meteoro-



Gasfabriko Reik el alteco de 600 metroj.


logiistaj studadoj. Forveturante per nia aerŝipo ni ĉiam kunportas unu aŭ du fotografilojn."

"Ĉu estas do eble, fari bonajn fotografaĵojn, se vi estas tiel malproksima de la objektoj, se vi veturas en tia alteco?"

"Mi volas montri al vi tiajn bildojn, por ke vi mem povu vidi, ĉu ili estas taŭgaj por ia celo. Jen estas bildo de la bohema urbo Aüssig. Ni estis en alteco de 400 metroj kaj malgraŭ tia malproksimeco, vi do povas vidi klare preskaŭ ĉion."

„Ho, kia klareco de la bildo! Mi jam ofte vizitis la urbon Aüssig. Mi povas rekoni la stacidomon, mi klare vidas la urbdomon kaj la urbplacon kaj la riveron!”

„Kaj jen alia fotografiaĵo. La alteco nun estis 600 metroj, 200 metroj pli ol ĉe la unua bildo. Mi fotografis la gasfabrikon Reik kaj certe vi devas konfesi, ke ankaŭ tiu ĉi bildo estas tre bela kaj tre klara.“



La kastelo Pillnitz el alteco de 720 metroj.

„Mirinde klara! Kaj jen vi ja havas fotografiaĵon de nia reĝa kastelo en Pillnitz! Ĉu mi estas prava aŭ ne?”

„Jes, vi estas prava; la bildo montras la Pillnitz'an palacon kaj la reĝan ĝardenegon, kiu kuŝas tiel ĉarme sur la rivero.“

„Sed kiajn fotografilojn vi do uzas, por ricevi tiajn bonegajn bildojn? Ĉu estas eble fotografi per ĉiu ajn ilo dum la veturado?”

„La firmo Hüttig en Dresdeno*) konstruis por ni specialajn ilojn, la „Hüttig's Ballon-Kamera“, kiuj estas tre bonegaj kaj tre taŭgaj por niaj celoj. Cetere mi nur povas rekomendi al vi ĉiujn fabrikaĵojn de tiu ĉi mondfama firmo, ĉar vi certe ĉiam estos kontenta kiel mi, kiu jam de multaj jaroj nur aĉetas ilojn de Hüttig.“

„Koran dankon por viaj sciigoj! Ili estas al mi tre valoraj, ĉar mi volas jam de longe fariĝi ne fotografisto, sed en mia libera tempo fotografanto kiel vi por ĝui la multajn plezurojn de nemetiista amatora fotografanto. Kaj eble, eble en kelkaj jaroj mi akompanos vin je via aerŝipveturado!“

S.

*) La firmo „Hüttig-Akt.-Ges. Dresden“ eldonos baldaŭ esperantan katalogon pri ĝiaj fotografiloj.



Muzikaĵoj.

Absolute melodiaj kaj por la kanto efikplenaj estas la du kantoj, aparintaj dum la IV^a Internacia Esperantista Kongreso de F. d. Ménil - Paris.

„La Verda Stelo“ kaj „Esperantujo“.

Vortoj de Marie Hankel - Dresden.

Barono de Ménil, la spirit- kaj temperamentplena komponisto, feliĉe kaj laŭdinde ne apartenas al la „supermodernaj“, kiuj kvazaŭ nomas mallaŭdinda nuntempe ankoraŭ verki melodiojn. Precipe pro tio ke F. de Ménil restis fidela al la principo de la absoluta melodio, la efekto de tiuj ĉi kantkompozicioj estas varma kaj momenta.


La vere lirika kanto: „La Verda Stelo“ havas poetan bonodoron kaj kortuŝantan simplecon. Tute konforma al la poezio estas la akompano, klare memorigante la brileton de l' steleto kaj plej delikate sentita. Malgraŭ granda simpleco tre sukceshava verketo.

La kanto „Esperantujo“ estas pli grandstila. Ĝi plej efike montras la varmsangan fantazion de la poezio per la drama interneco kaj vervo de la muziko, kaj ĝi malkaŝas al ni la temperamentardantan sonsentadon de la franca muzikverkisto, la talenta aŭtoro de nia „Espero“.

Ni speciale atentigas ĉiujn gekantistojn kaj kantamikojn (por koncerto kaj salono) pri tiuj kantoj, kiuj jam okaze de kongresa koncerto ĉe entuziazma aplaŭdo estis kantata de nia samideanino Fino Susanna Apitz, antaŭa reĝa operkantistino. Ŝia majstra kantado bonege enkondukis la du kantojn en la publikecon.

Eldonejo de la du kantoj: „La Verda Stelo“ } F. de Ménil.
„Esperantujo“ }

Hans Th. Hoffmann, Berlin W. 15, Fasanenstraße 68.



El Esperantujo.

Saksa Esperanto-Instituto en Dresdeno.

La reĝa saksa ŝtata ministraro de la internaj aferoj donis per reskripto numero 1610 III F de la dekdua de novembro de tiu ĉi jaro la permeson por la starigo de la Saksa Esperanta Instituto. La instituto devas oficiale subskribi ĉiujn anoncojn, prospektojn k. t. p. per la vortoj: „Saksa Esperanto-Instituto en Dresdeno“. La gvidado de la lernejo de la reĝa asesoro D^{ro} Schramm estas per tiu ĉi reskripto oficiale aprobita.

1. Protektanta estraro de la instituto.

La estraro protektanta konsistas el la sinjoroj: komerca konsilano Arnhold, ĉefinstrua konsilano Bernhard, sekreta konsilano kaj prezidanto de la komerca ĉambro Collenbusch, komerca konsilano Förster, polica prezidanto Köttig, komerca konsilano Marwitz, grandbrita vickonsulo Palmié, juĝa konsilano Töplitz.

2. Gvidado de la instituto.

Prezidanto: D^{ro} Schramm, reĝa asesoro.

Anoj: D^{ro} Arnhold, D^{ro} Fleischer, dipl. inĝeniero von Frenckell, sinjorino Hankel, pastro lic. D^{ro} Kühn, inspektoro Richter, rektoro Velten.

3. Instruistoj de la instituto

estas: D^{ro} Schramm, D^{ro} Kühn, Dietz, Gneuß, Höfer, Meves, Schönherr, Sykora, Thiel, krom tio por specialaj kursoj Engst, Radeck, Richter.

4. Instruado en la instituto.

Unu kurso (tio estas 15 × 2 lecionoj) kostas 5 markojn pageblaj al la kaso de l' instituto. La instruisto ricevas por unu kurso la sumon de 120 markoj. Oni aranĝas komencajn kaj superajn kursojn.

5. Ĉambroj de la instituto.

La lecionoj havas lokon kun permeso de la reĝa ministraro en lernejoj kaj en la parlamentejo. (Reĝa reskripto numero 323 a I C.)

6. Ekzamenoj de la instituto.

Laŭ deziro la supera kurso estos finita per ekzameno, por kiu ekzistas speciale nomita komitato. La ekzameno ricevos senpage ateston de kapableco. Ankaŭ personoj, kiuj ne vizitis la instituton, povas post ekzameno ricevi tian ateston, se ili pagas 10 markojn. Krom tio oni povas ricevi ateston pri kapableco por instruado en publikaj lernejoj.

7. Biblioteko de la instituto.

La biblioteko estas publika kaj elpruntas librojn en ĉiujn urbojn de Germanujo. Kiu loĝas en eksterlando, devas sendi apartan petskribadon (vidu la statutojn de la biblioteko).

8. Kunvenoj de la instituto.

La anoj kaj la instruistoj de la instituto kunvenas ĉiumonate je konferenco, por preparoli la aferojn de la instituto, krom tio la anoj kunvenas laŭ bezono.

9. Ŝanĝoj.

Nur la reĝa estraro havas la rajton ŝanĝi ion en la instruada ordo, en la koleĝaro kaj en la celadoj de la instituto.

La duka saksa statoministraro de Koburg-Gotha

donis per reskripto la permeson, enkonduki Esperanton laŭ deziro en la tiel nomatajn komercajn klasojn de la reallernejoj jam de la unua de oktobro.





Bibliografio.

„La Bela Mondo“ raportas pri novaj verkoj nur, kiam la redakcio donace ricevis du ekzemplerojn. (Adreso: Dro Schramm, Dresden-Ständehaus.)

Internacia Pedagogia Revuo. Oficiala organo de la internacia asocio de instruistoj. Redakcio: Th. Čejka, Bystrice-Hostýn, Moravio (Aŭstrio).

Grava fakto por instruistoj kaj profesoroj estas laŭ nia opinio la apero de tiu ĉi nova organo, kiun ni kore salutas. La revuo estas redaktata de la komitato, kiu konsistas el konstantaj profesiaj kunlaborantoj diverslandaj kaj diversnaciaj. Oni legas en ĝi artikolojn pedagogiajn aŭ tuŝantajn la demandojn, kiuj rilatas la aferojn pedagogiajn. La oficialaj raportoj de la internacia asocio de instruistoj estas ĉiam publikigataj en ĝi. Ankaŭ adresaro de ĝejunuloj, kiuj deziras korespondadi, ne mankas kaj tio estas institucio tre salutinda. Por ke la instruistoj konu sin reciproke kaj povu helpi unu la alian, precipe en aferoj specialaj, preskaŭ ĉiu kajero de la gazeto enhavas en la fako „Korespondado“ sciigojn de diverslandaj instruistoj, kiuj serĉas aŭ proponas ĉu korespondadon ĉu helpon en aferoj, kiuj postulas reciprokajn helpon de specialistoj. Tial ĉiuj esperantistaj instruistoj legu la „Pedagogia Revuon.“

The English-Esperanto Dictionary based upon the „Fundamento“, the esperanto literature, and the national-esperanto dictionaries bearing Dr. Zamenhofs „Aprobo“ by Joseph Rhodes. 8^o. XXII + 547 p. London, Stead's Publishing House. Prezo 5 s. 4 d.

Nova angla-esperanta vortaro de granda graveco! Ne nur tial, ke ĝi enhavas ankaŭ geografian kaj personan nomaron, sed ke ĝi estas vera riĉigado de nia literaturo. S^{ro} Rhodes ĝin eldonis laŭ la Fundamento, laŭ la Esperanta literaturo kaj laŭ naciaj vortaroj aprobitaj de D^{ro} Zamenhof. Sep jarojn li laboris kaj 50000 vortojn aŭ esprimojn li kolektis kaj bone ordigis. Multaj utilaj esprimoj troviĝas en la bona libro. Preskaŭ ĉion, kion oni serĉas, oni trovas en ĝi. Ni esperu, ke baldaŭ ni ricevu por ĉiuj naciaj lingvoj tian valoran vortaron.

Makbeto, Shakespeare, tradukita de D. H. Lambert, H. A. (Oxford). 125 paĝoj. Paris, Librejo Hachette kaj Kio. Prezo: 2 fr.

Antaŭ kelkaj jaroj D^{ro} Zamenhof majstre tradukis Hamleto'n. Multaj esperantistoj legis kaj ree legis ĝin kun granda ĝojo. Tiam S^{ro} Lambert eldonis la tradukon de „Julio Cezaro“ kaj multe sukcesis. Hodiaŭ ni havas la trian verkon en Esperanto de la fama angla tragediisto kaj ankaŭ tiu ĉi estas bone tradukita. Ni nur povas rekomendi al niaj gelegantoj: legu ĝin kaj ĝoju pri tiu ĉi volumo de la „Kolekto de la Revuo.“


Internacia Legolibro. 1^a parto eldonita de Emil Stark kaj Fr. Rockmann en Magdeburg. 1908. Presejo: A. Sorgler, Magdeburg-A. N. 8^o. 88 paĝoj.

La aŭtoroj, du fervoraj germanaj samideanoj, donas en tiu ĉi libro mallongajn rakontojn, anekdotojn, legendojn kaj fabelojn, kiujn ĉiu komencanto en la lingvo Esperanto facile komprenos. Estas necese ke oni legu tiajn mallongajn historiojn, por ke oni ne tuj laciĝu kaj, se oni komprenas ilin bone, tiam studu gazetojn kaj verkojn.

Zoologická Zahrada Praha. Sub tiu ĉi titolo aperas nova gazeto (= Zoologia ĝardeno Praha), kiu enhavos en ĉiu numero rubrikon esperantan redaktitan de la „Bohema Unio Esperantista.“ La unua numero enhavas planon de la insulo Štvanice, la unua esperanta plano, kiu ĝis nun ekzistas.

Bericht über den IV. Internationalen Esperanto-Kongreß, Dresden, 16.—22. August 1908, herausgegeben vom Sächsischen Esperanto-Institut in Dresden.

Tiu ĉi 80 paĝa broŝuro kun ĉirkaŭ 40 belegaj ilustraĵoj enhavas la laŭvorton tekston de la reĝaj reskriptaĵoj, kiuj estas tiel gravaj por nia kara lingvo en la germanaj landoj. Ĉiu germana samideano devas tial posedi la broŝuron. Por ke ĉiu povu aĉeti ĝin, la instituto forsendas ĝin jam por 60 pfenigoj, kiujn oni volas sendi al la Saksa Esperanto-Instituto en Dresdeno. La broŝuro enhavas ankaŭ la adresojn de ĉiuj germanaj grupoj, krom tio longan priskribadon de la Dresdena kongreso laŭ la raportoj de diversaj germanaj gazetoj, kiuj ofte estas tre valoraj por nia afero.





SCHLOSS LAUENSTEIN



Al la vespera stelo.


(El Tannhäuser de R. Wagner).

Funebre kovras la krepusko valon,
Etendis nokto nigran la vualon;
Deziras suprenflugi la anim',
Sed tenas ĝin de nokt-teruroj tim'.

Aperas jen, vi stelo la plej kara:
De malproksime fluas lumo klara,
Disigas ombrojn ĉarma la radi',
Amike montras la vojon al mi.

Ravite, ho vespera stel',
Mi vin salutas sur ĉiel';
Kaj de fidela mia kor',
Salutu ŝin en tiu hor',
Kiam ŝi flugos for de l'tero,
Al anĝelar' en supra sfero!

A. Grabowski.



Vi estas tiel pura

De Heinrich Heine.

Vi estas tiel pura
Kaj ĉarma kiel flor',
Vidante vin mi sentas
Kompaton en mia kor'.

Sur vian kapon volonte
La manojn metus mi,
Preĝante, ke vin tiel ĉarma
Kaj pura konservu Di'.

Esperantigis Leopold Elb.

Fajretoj

de V. G. Korolenko.



am, antaŭ longe, aŭtunvespere al mi okazis boatveturi laŭ malgaja siberia rivero. Subite, ĉe riverkurbigo, antaŭ mi, malsupre de mallumaj montoj ekbrilis fajreto.

Ĝi ekbrilis hele, lume, tute proksime

— Nu, glor' al Dio! — mi diris gaje, — noktejo estas proksima!

La boatisto turnis la kapon, ekrigardis el-super sia ŝultro la fajron kaj denove apatieme ekmovis la remilojn.

— Estas malproksime!

Mi ne volis kredi: la fajreto ade brilis, elstarante el malpreciza mallumo. Tamen la boatisto estis prava: poste montriĝis, ke ĝi efektive estis malproksima.


Estas eco de tiuj noktaj fajroj — proksimiĝi, venkante la mallumon, kaj brili, kaj promesadi, kaj allogadi per sia proksimeco. Ŝajnas, jen, jen ankoraŭ du, tri ekremoj, — kaj la vojo estas finita Kaj dume — estas malproksime!

Ankoraŭ dum longa tempo ni boatveturis laŭ malhela, kiel inko, rivero. Intermontoj kaj rokoj elnaĝadis, almoviĝadis kaj malaperadis, restante malantaŭe kaj perdiĝante, ŝajne en senfina malproksimaĵo, — sed la fajreto ĉiam staris antaŭ ni, briletanta kaj alloga, — ĉiam same proksima, kaj ĉiam same malproksima

Mi ofte rememoras nuntempe kaj tiun malluman riveron, ombrigitan de montaj rokoj, kaj tiun vivan fajreton. Multaj fajroj kaj antaŭ tio kaj poste allogadis ne sole min per sia proksimeco. Tamen — la vivo fluas meze de tiuj samaj malgajaj bordoj, kaj la fajroj estas ankoraŭ malproksimaj. Kaj ree oni devas movegi la remilojn

Tamen tamen antaŭe vidiĝas — la fajroj!

El rusa lingvo tradukis Dro Andreo Fiŝer (Tifliso, Kaŭkazo).



De la ĉevalo sur azenon.

De Fritz Reuter.



Malnova mantelo donas pli multe da varmo ol nove-moda monstro de ĉirkaŭlig'tuko; malnova honesta, longa, blua surtuto konvenas pli bone ol tiuj ridindaj objektoj vestaĵaj, kiujn ili nun portas — antaŭe nenion kaj malantaŭe nenion — kaj en paro da malnovaj botoj oni iradas multe pli oportune ol en novaj, precipe tiam, se iu havas kalojn. Kaj kalojn nun havas ĉiu homo, tiun ili doloras tie ĉi, kaj ĉi tiun ili doloras tie.

Tiel mi pensas hodiaŭ, kiam mi estas maljuna, sed kiam mi estis bubo dekdujara, tiam mi estis kiel ĉiuj tiaj infanoj: nur ĉiam ion novan! — Se mi ricevis tranĉilon aŭ pafarkon, tiam mi kunportis ilin ĉien, kien mi iris, kvazaŭ mi estus edziĝita kun ili, poste mi forlasis ilin, aŭ perdis, aŭ interŝanĝis ilin — tiam mi havis almenaŭ ree ion novan.

Kaj de tiu amo al novaĵoj mi venis al emo je interŝanĝado kaj de l'interŝanĝado facile mi estus povinta veni al io pli malbona, se Dio ne estus antaŭgardinta kaj per mia maljuna onklo — ĉiam je ĝusta tempo — estus sendinta kelkajn sukcesajn vangofrapojn.

Ĉe ĉiu efektiva interŝanĝo devas esti du, unu saĝa kaj unu malsaĝa. Por ili ambaŭ la afero povas fariĝi tre malbona: ĉe la saĝa kurbigĝas la „hoketo“*) jam frue al — — fripono kaj ĉe la malsaĝa al — — almozulo.

Nu, mi eble, ne sciante pri tio, kliniĝis iom al tiu lasta speco, ĉar oni min volonte aligis al tiuj, kiuj ne estas tre saĝaj, kaj se mi rigardas miajn financajn cirkonstancojn, mi ne povas kontraŭdiri.

— Do, kiel diras mia amiko, hotelmastro Gollenreider en Treptov: „tio estu nun kiel ajn“ — la vangofrapojn mi tamen havis kaj — ĉar en mia patra urbo ekzistas la „Lübeka rajto“, tial mi ilin devis ankaŭ restigi ĉe mi.

Sed pro kio mi ilin ricevis — tio okazis tiamaniere: Mi havis belegan kuniklon blue pentritan kun blanka makulo sur frunto, tiun ĉi deziris havi mia plej bona amiko Fric Riŝ. Fric

*) Laŭ proverbo „Kiu volas fariĝi hoketo, tiu kurbigĝas frutempe.“

Riŝ kaj mi, ni ĉiam havis ian interŝanĝan aferon, kaj mi ricevis de li jam sufiĉe grandan amason da mirindaj objektoj — nur domaĝe, mi ne bone sciis, kion fari kun ili. Nu, ĉi tiun fojon li volis doni al mi — anstataŭ mia kuniklo — ok ŝakajn figurojn, tri elblovitajn ovojn kaj duonon da kandel'purigilo. Krom tio li promesis al mi ankoraŭ hundideton de hundo, kiun havas lia onklino — sed ĝis tiam, kiam ĝi havas iajn — kio, kiel mi poste sciigis ne povas okazi, ĉar tiu hundo estis hundo-viro, sed ne hundino. — Nu, ĉio alia estis ja iel laŭ mia deziro, sed nur kun tiu duona kandel'purigilo mi ne konsentis, tial mi diris al Fric: „Sed kion mi faros kun tiu duona objekto?“ — „I“, li diris, „ĉi tiun mi trovis, kiam mi falis sur la granda konstruejo, vi povas ankoraŭ trovi la alian duonon kaj tiam vendi ĉion por ok groŝoj.“ Nu, tion mi eble povas fari; tamen, mi jam multfoje falis, sed neniam trovis ion, kaj la afero ne ŝajnis al mi alloga. — Tiam li diris: „Fric (ĉar mi ankaŭ estis nomata Fric) vidu, mia patro estas nur forĝisto kaj la via urbestro, kial vi ne povas same tiel bone ion trovi kiel mi?“ Tio ŝajnis al mi esti vera, kaj la negoco estis farita. — Kiam li foriris tra pordeto de l' ĝardeno kun mia kuniklo, kaj mi staris interne rigardante miajn ok ŝakfigurojn, la tri elblovitajn ovojn kaj la duonon de l' kandel'purigilo, jen — ŝvab — ŝvab — mi ricevis du el tiuj vangofrapoj, pri kiuj mi jam parolis; kaj kiam mi turnis mian kapon — mi vidis mian onklon Matis, kiu sidante post pomarbo, aŭskultis nian traktadon.

Onklo Matis estis maljuna soldato kaj havis strangajn kutimojn; li batis ĉiam antaŭe kaj nur tiam li diris, pro kio li batis. Li estis en Hungarujo kaj en Polujo, vidis la mondon kaj sciis multajn historietojn, sed la malbona flanko de liaj historioj konsistis el tiu „sentebla“ moralo. Je tio mi volonte estus rifuziginta. — Kiam mi do estis ricevinta miajn vangofrapojn, tiam mia onklo sidigis sur benketon sub pomarbo kaj diris al mi: „Ĉu vi scias, knabo, pro kio vi ricevis tiun admonon?“ „Ne onklo“, mi respondis, „vi ja ne rakontis al mi historion.“ „Tiu kompreneble ankoraŭ sekvos“, diris li. „Tiun memoraĵon vi ricevis pro via emo interŝanĝadi; kiom mi scias, via patro ne volas eduki vin, por ke vi fariĝu ĉevalvendisto. Kaj nun venu aŭskulti la historion: Kiam mi ankoraŭ en Peterwardein servis ĉe la hungaraj ulanoj, tiam ni havis kapitanon ĉe la skadro, li estis malgranda homo kun

ĝibeto inter la ŝultroj. Tiu ĉi estaĵo estis tre kolerema kaj dis-putema, ĉiam li deziris havi ion novan, kaj tiom da kapricoj li havis, kiom la azeno havas grizajn harojn; kaj se li falis en la defluejon, li ne pli frue kontentiĝis ol ĝis li ankaŭ kuŝis en fosajo; se li hodiaŭ vestis botojn, morgaŭ li vestos ŝuojn kaj postmorgaŭ pantoflojn. Nu, li estis riĉa kaj la malsaĝaĵojn, kiujn elpensis lia anser'kapo, povis elteni lia monujo, almenaŭ dum ia tempo. — Nenio estis pli natura, ol ke la malgranda malbonforma kapitano estis konstante ĉirkaŭata de svarmo da malsataj kamaradoj, kiuj alkoĉiĝis al li kiel lapoj, elsuĉis lin kiel hirudoj kaj poste ridis pri li kiel friponoj. — Nu, unu el tiu ĉi frataro iniciatis al li la ideon pri tio, ke plej granda plezuro sur la mondo estas sidi en vitra kaleŝo kun lakeo antaŭe kaj lakeo malantaŭe, tirata de kvar ĉevaloj kaj veturi sur la ŝoseo tien kaj reen.


Tio plaĉis al nia kapitano, ĉar tion li ankoraŭ ne faris, tio estis io nova, kaj — kiel diras amiko de mi, botisto Samĥov el Rostok — „sekvant'maniere“ estis aĉetitaj la vitra kaleŝo kune kun la kvar ĉevaloj kaj la plej granda plezuro sur tiu ĉi mondo komenciĝis, sed tre baldaŭ ankaŭ finiĝis; ĉar se nia malgranda sentrankvilulo sidis en la vitra kaleŝo kaj saltetis de unu flanko al alia kiel la diableto en botelo, tiam la homoj staris sur la strato kaj vidis kvazaŭ ili vidus simion.

Post tri tagoj la afero lin tedis. Estis vera feliĉo por li, ke la kolonelo de l' regimento edziĝis kun juna virino kaj ke tiu ĉi deziris havi vitran kaleŝon tirata de kvar ĉevaloj kun lakeo antaŭe kaj lakeo malantaŭe. — Sed la kolonelo havis nenion plu ol sian salajron; dum longaj jaroj li kantis vespere dum sia liber-tempo la belan kanteton:

„La enspezoj estas tro malgrandaj.“

Sed li ĉiam penis plibonigi siajn enspezojn — tiel tri tagoj antaŭ sia edziĝo li gajnis dum kartludo kun hungara grafo belan kaleŝveturilon kun du ĉevaloj, el kiu unu estis malsaĝa.

Li iris al nia malgranda kapitano kaj imagis al li la dolĉan plezuron, esti sia propra veturigisto. Ĉar tie ĉi kunvenis tio, kio estas necesa por vera interŝanĝo, nome ruzulo kaj malsaĝulo, tial la afero baldaŭ estis finita kaj ŝia moŝto kolonel'edzino ricevis la vitran kaleŝon kun lakeo antaŭe kaj lakeo malantaŭe kaj nia kapitano ricevis la veturig'kaleŝon kun la malsaĝa ĉevalo.



Vintra pejzažo.

Vintraj plezuroj.




Neĝo, neĝo, blanka neĝo! Kia ĝojo por multaj homoj, por junuloj kaj maljunuloj, por viroj kaj virinoj! Neĝo jam kovris la montegarojn antaŭ kelkaj semajnoj, sed nun ĝi vestis per blanka mantelo la tutan teron. Ĉie brila neĝo! Kia belega aspekto!


Estis la kvaran de januaro, kiam ni frumatene forveturis per glitveturilo. Maltrankvile atendis la ĉevaloj, ili ne volis stari, sed rapide trafugis la neĝan kamparon. Vestitaj per varmaj vestoj ni sidiĝis en la belan glitveturilon. La ĉevaloj tre ĝojigitaj ekkuris, la neĝo kraketis kaj ni ĝuegis la freŝan aeron. La ĉielo estis helblua, tute sennuba; subite oris la vintra suno la proksiman montegaron. Pentrinda aspekto!

Sed ni ne estis solaj, kiuj forlasis la urbon por viziti la neĝajn montojn, multaj el niaj samurbanoj faris la samon, precipe la junularo. Multaj glitveturiloj kaj glitveturiletoj sekvas unu post la alia. La vangoj de la ĝejunuloj ardas, iliaj okuloj brilas, iliaj koroj ridas. Kompreneble, ĉar ĉe ĉiupaŝo novaj belaĵoj, novaj surprizoj de la vintra pejzaĝo! Krom tio la bela vetero, la pura aero, la profunda neĝo!

Nia celo estas la domoj salutantaj malproksime en alteco de 600 metroj. Ni forlasas nian glitveturilon por piede atingi la domojn. Antaŭ ol eniri la arbaron, ni returnas



En la valo.




En la arbaro.

moj, ĉie profunda silento. Ni apenaŭ riskas spiri timante malhelpi la ĝuadon de la fabela lando. Preskaŭ oni povis kredi, ke antaŭ niaj okuloj sin prezentas ensorĉitaj homoj kaj bestoj en ensorĉita loko.

Subite malaperis la suno. Netravidebla malluma aero etendiĝis, griza nubaro montriĝis. Kaj nun neĝas, dense faladas la neĝeroj. Preskaŭ ni ne vidas unu la alian, sed kuraĝe antaŭen! Ni esperu, ke la suno baldaŭ ree sendu orajn radiojn kaj forpelu la malluman nubaron. Kaj


niajn rigardojn. Ankoraŭ estas la ĉielo blua; la neĝo diamante briletas, la domoj preskaŭ malaperas envolvitaj de blanka neĝo, la arboj montras strangajn formojn. Ne estas eble priskribi tian vidindan vintran pejzaĝon.

Kaj nun la neĝa arbaro! Ne unu verda branĉeto, ĉio supersŭtita per neĝo! Strangaj grupoj de arboj nun montriĝas ĉiupaŝe. Jen longaj vicoj de blankaj staturoj, ili similas al personoj mute malleventaj la kapojn; jen malgranda arbo similanta al besto kaŭranta. Ĉie misteraj blankaj fanto-



Arbara rivereto.

efektive post kvarono da horo la neĝa blovado ĉesiĝas, la vento ne fajfas plu, nur blankaj flokoj flirtadas. Ni ree vidas ĉiujn mirindajojn kaj ni ĝojas pri la vintra beleco.




Vintra pejzaĝo.

„Sed kial ni laciĝas nin tiel, suprenirante sur la monton? Nur por ĝui la vintrajn belaĵojn kaj la freŝan aeron?“ demandis min enuigita amiko, kiu akompanis nin kaj kredis, ke nun sufiĉas la ĝuado de l' vintra pejzaĝo. „Ĉu vi ne vidas la multajn personojn sur sportloko. Tien ni volas iri kaj ankaŭ ĝui la vintran sporton, kiu favore influas la korpan bonfarton de l' homo.“

Venu nur, ankaŭ Vi, la nesportisto, havos plezuron rigardante la saltojn de la skikurantoj.“

„Dank' al Dio nun oni komprenas ne nur en Norvegujo kaj Svisujo, sed ankaŭ en aliaj landoj, kia saniga kaj interesa sporto estas la skikurado. Ĝi estas ebla de kelkaj jaroj en nia montaro kaj ni ĉiuj ĝojas pri tio. Venu nur kaj mi esperas, ke Vi baldaŭ ankaŭ ĝuos tiun ĉi sporton,“ diris junulo kun ruĝaj vangoj, kiu estis aŭdinta niajn vortojn.



Restoracio sur la montaro.

Kiam ni alvenis en la sporta loko, salutis malproksime montoj kovritaj je eterna neĝo kaj brilantaj en la sunaj radioj. Amaso da homoj ĉeestas, ĉar hodiaŭ havos lokon interesaj konkuroj. La plej spertaj sportistoj de nia urbo venos por konkuri. Oni atendas malpacience ilian alvenon.

Aŭdu, la muzikistoj ludas, la konkuro ekkomencas. La partoprenantoj estas dividataj en diversaj grupoj. Estas plezuro rigardi la fortajn junulojn kun ardantoj vangoj, kiuj volas gajni premiojn. Nun kelkaj kurantoj forlasas la firman teron kaj troviĝas flugpendantaj en la aero. Ni ĉesas spiri. Ĉu ili falos? Kiu venkos?


Mia amiko staras senmove rigardante senĉese la belan vetglitadon kaj skikuradon. Inter la gajaj homoj li fariĝas ankaŭ gaja. Liaj okuloj brilas, li ridas, li aplaŭdas, — — li fariĝis amiko de vintra sporto, amiko entuziasmigita, kiu ne povas atendi la proksiman tagon, por ree viziti la montojn. Kompreneble, ĉar ĝis nun li nur vidis la malpuran neĝon sur la stratoj de nia urbo, ĝis nun li ne ĝuis nek vintran pejzaĝon en freŝa aero nek vintran sporton.

Krepuskiĝas, ni devas iri al la restoraciaj domoj sur la monto. Kia belega aspekto! La turo kaj la domoj estas sukerigitaj, la arboj dense kovritaj per neĝo, la akvofalo proksime de la domo tute glaciigita, multaj glitveturiloj kaj glitŝuoj montras, ke jam multaj gastoj sekvis la afablan mastron por ripoziĝi kaj varmiĝi. Bonaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ĝojigas nin kaj baldaŭ oni vidas ĉie nur gajajn mienojn. „Ĉu ne estis plezura tago hodiaŭ? Ĉu oni ne havas ankaŭ en la vintro belegajn plezurojn?“ mi demandis mian amikon kaj ricevis la gajan respondon: „jes, pli belaj estas tiuj ĉi plezuroj ol ĉiuj prezentadoj de niaj teatroj en la urbo; ĉiam se mi havos liberan tempon, mi vizitos la belegan vintran pejzaĝon kaj ĝuos la vintrajn plezurojn“.


S.



En la arbaro.



Akvofalo glaciigita.



Vintra kanteto.*)

Tuta vestis sin ter' per mantelo,
Pli brila, ol blanka lili';
Kiel plej pitoreska juvelo
Rádias arbar' sen foli'.



Kiel kron' diamanta de l'reĝo,
De l'suno sub hela radi'
Brilas ĝia ornamo el neĝo;
Glorkantas la kor' al la Di'.



Ĉar mi sentas Lin en la aero,
En frosta vigliga ventet'
Kaj en ĉiu glacia larmero,
En gaja pasera kantet'.

El „Verdaj fajreroj“, kolekto da versaĵoj de Romano Frenkel. Prezo:
40 Spesdekoj. Tiu ĉi libreto estas tre rekomendinda.

Kerkira.¹⁾

De Paul Bünemann, Patras.

1. Alveturo.



Due la suno min vekas en la kajuto. Mi jam estas forgesinta la blankbrilajn ŝtonojn de la italaj havenurboj laŭlonge la Adria²⁾, kaj, elrigardante el la ronda fenestro, jen, trans la gracie lulantaj bluj ondoj nebulaperas la montetaj insuloj, kiuj gvardiostaras en la nordo por Grekujo. Rapide mi vestas min. Sur la ferdeko jam feliĉe alrigardas la nun aperintajn montojn de Kerkira juna hebrea Kerkira' anino; ŝi min ricevas kun ĝoja ekkrio:

„Jen, jen vi vidas nun mian Kerkira' on; diru, ĉu ne ĉarmega ĝi estas; rimarku tie la montoformojn, prezentu al vi promenadon laŭlonge tiu golfeto. Kaj antaŭ ĉio, ĉu ne estas ameginda nia blua, ho, bluega maro?; jen Ionio, jen Kerkira, jen la hemjo mia!“

Pasie kaj entuziasme ŝi daŭrigas; kie ajn naskiĝis la homo, li ĉiam ŝatas, ĉiam bela trovas tiun lokon en la mondo, kie staris iam lia lulilo. Sed, kiom ajn tiu ĉi junulino tre amas Kerkira kiel sia hemjo, tiom mi mem estas ravita per la nuna aspekto de neimagebla beleco.

Satbluaj ondoj gracie ĉirkaŭdancas nian belan, matene purigitan „Montenegro“, kies verd-blank-ruĝaj flagoj kun la itala krono flirtetas en freŝa venteto; alproksimiĝas la ruĝetbluaj bordoj; vidiĝas la seriozigemaj arbaroj, kaj vaste, serene sin etendas super ni la klara, blua ĉielo.

Ĝuante tion kune, fortikiĝas en ni la sento de l'amo al la ĉie ajn bela, ĉar harmonia naturo. Ni reveperdiĝas en la glorega bildo antaŭ ni, ĝis kiam subite la maŝino haltas. Ni ĉirkaŭrigardas, kaj la kungevojaĝantoj el Venezia³⁾ nin salutas; oni klarigas, ke pro la nunaj turkaj malordiĝoj ni restados kelkajn horojn en Santi Quaranta⁴⁾. „Kiun vi vidas de l'alia flanko“. Ni iras rigardi, sed nenio estas impona tie, kie flugetas la duonlunon montranta turka flago. Plie, tute ne estas „Sankta Kvardeko“ da domoj; mi nur nombras dekkvin, kaj

¹⁾ Elparolu „Kerkira“ (itale „Corfu“, france „Corfou“, germane „Korfu“, angle „Corfu“). ²⁾ Elparolu „Adria“. ³⁾ Elparolu „venecia“. ⁴⁾ Elparolu „santi kvaranta“.

multaj el ili estas forlasitaj pro la difektoj faritaj dum la lasta grek-turka milito; kiel mokantaj gvardioj ilin ĉirkaŭstaras ruinaĵoj el la romaj tempoj, kaj tiam, al ĉiuj flankoj sin etendas nur ŝton-plenaj montetoj.

Alvenas sur la ferdeko (ni pro manko de pasporto ne povas surbordiĝi) knabeto strange vestita. Dika, sed ĉifoniĝita jako, sendube propraĵo de lia patro, larĝaj pantalonoj same ĉifonaj kaj ŝajne de l'frato antaŭnaskita, neniam botoj sur la malpuraj piedoj, larĝa pajlĉapelo heredita de l'avo sur la malinteligenta vizaĝo, — jen tiu aperaĵo. Li sin ofertas por purigi miajn botojn; kiel sur lavita ferdeko ili povus esti malpurigitaj en unu horo?; mi ne scias, kaj certe ili ne estis; tamen iu greko klarigas al mi, ke en lia lando ne unu, sed dekunu ĉiam sin ofertas por sama nebezonata laboro; mi do lasas lin fari.

Kaj nun rimarkiĝas blanka rubando ĉirkaŭ la ĉapelo de l'knabeto; ĝi en la mezo havas la duonlunon, dekstre turkan kaj maldekstre grekan surskribaĵojn mallerte faritajn; „Libereco, Egaleco, Frateco“; oni klarigas: tiele eĉ knabo revolucias.

Post lunĉo riĉhava la elŝarĝado de l'ŝipo estas finita; nun la interferdeko pleniĝis de turkoj; ankaŭ en la dua klaso ni rimarkas kelkmultajn geturkojn, kaj speciale rimarkinde estas ke la inoj ne plu ĉiuj portas vualojn, ĉar ili ja nun kunrevolucias, t. e. kontraŭ la envualiga kutimo de ili. Mi kore al ili deziras sukceson. —

Nia loko nun estas sur la antaŭa ŝipparto; ne plu nin interesas malgaja Turkujo maldekstre; ni admiras la diversspecajn bordojn de Kerkira je l'dekstra flanko; insuletoj kun riĉe florantaj arboj nun alproksimiĝas; tie kuŝas sur rifo turka milita transportŝipo, ankoraŭ kun ĝia flago, ĉar nur ĵus ĝi surrifiĝis kun kelkcento da soldatoj feliĉe savitaj.

La montetoj sin sekvas unu alian, fariĝas montoj, nin allogas per ilia beleco. Nur la urbon Kerkira ni ne vidas, kvankam la ŝipo rekte sin direktas al la lando.

Subite, jen, ni ĉirkaŭveturas la insulon Vido, kaj surprize vidiĝas la blankaj urbodomoj, kiuj surrampas la monteton; maldekstre firme kaj alte staras la mezepoka (Venezia'a) fortikaĵo; dekstre estas la sama konstruaĵo nomita nova; la tuto estas impona vidaĵo. Oni al mi estas dirinta tiom pri la belaĵoj sur-insulaj, ke mi kore ĝojas pri la alveno en tia multelaŭdata loko.

(Daŭrigota.)



La templa danco.



La serpenta danco.

Artaj dancoj.



Tri artaj dancoj raportas jam la verkistoj de antikvaj tempoj, ke ili ludis gravan rolon dum publikaj festoj kaj en la kulto. La antikvaj Grekoj plej multe ŝatis belajn dancojn kaj kreis la artdancon. La Romanoj imitis la grekajn dancojn. La kreintoj de la nova dancarto estas la italoj kaj la francoj. Precipe al la franco Noverre apartenas la gloro, esti antaŭbatalanto por la dancartistoj. Tre famaj fariĝis la familioj Vestris kaj Taglioni. Longan tempon la baletto de la granda opero en Parizo estis mondfama kaj sola centro de la plej bonaj gedancistoj. Hodiaŭ akiris la saman famon la operaj domoj de Berlino kaj Vieno. Krom tio lertaj gedancistoj migras de loko al loko, de urbo al urbo, de lando al lando kaj tion faras ne nur gedancantoj, sed veraj famaj dancistoj kaj dancistinoj.

Fama dancistino de la nuna tempo estas Ruth St. Denis. Ŝi prezentis sin unue en la Hudson-teatro, unu el la plej bonaj teatroj en New York, tiam ŝi venis Londonon, kie ŝi havis plenan sukceson tiel grandan, ke la reĝo Eduardo mem vizitis la reprezentadon. Nuntempe ŝi vizitas la urbojn de l'kontinento kaj ĝojigas ĝiajn loĝantojn per siaj ĉarmaj dancoj.

La prezentado de St. Denis konsistas el kvin aktoj de hindaj scenoj, kiuj donas klaran bildon de la hinda vivo, de la hindaj moroj kaj religiaj kutimoj. Por pligrandigi la efikon de la dancoj, ŝi alvokis grupon da hindaj enlanduloj, kiuj helpas ŝin vivigante la scenojn.

La nomoj de la kvin aktoj de la prezentado estas: „Purda“,



„Purda“.



„Yogi“.

„la strato“, „la palaco“, „la arbaro“ kaj „la templo“. — „Purda“ estas hinda vorto kaj signifas la kurtenon, kiu fermas la ĉambrojn de la virinoj. Tiun ĉi dancon nomas sinjorino St. Denis „animo de l' bonodorfumo“. La ideo de tiu ĉi sceno estas jena:

Hinda virino venas el la kurteno kaj salutas la publikon ĉeestantan per bonodorfumo. La fumnuboj elirantaj el la bonodorfumujo estas la modeloj por la ondformaj movadoj de l' brakoj en tiu ĉi danco.

Iam hindo rakontis al sinjorino St. Denis, ke oni dresas la serpentojn per muziko kaj ke oni donas lakton al la „Cobra“ en pladeto antaŭ ol ĝi leviĝas kaj serpentumas. Tuj St. Denis vidis en animo la tutan scenon kaj imitis la movadojn de serpento tiamaniere dresita. Tiu ĉi danco estas la dua akto nomata „la strato“.


La tria akto, „la palaco“, montras „Nauth“, tio estas festenon, kiun donas princo je l' honoro de alia princo. Okaze de tiuj ĉi festoj ĉiam dancas Nauth-knabino ĝojigante la gastojn per koketaj kaj ĉarmaj dancoj. La dancantino uzas longan, oran vualon. St. Denis mirinde reprezentas tian knabinon meze de l' gastoj sidantaj sur tero.

„La arbaro“ estas bildo de l' danco de hinda asketo nomata „Yogi“. Tute sola en la praarbaro Yogi faras siajn preĝajn ekzercojn. Tiun ĉi dancon treege amas la hindaj enlanduloj, ĉar la muziko ludas hejmajn kantojn.

La lasta danco estas la „templa danco“. Pro ĝi oni ofte nomas St. Denis la hinda templa dancantino. Oni vidas la internaĵon de templo, kaj en ĝi la bildon de Radha, la edzino de Krishna, antaŭ kiu kuŝas la pastroj preĝantaj. La pastroj oferas florojn, sonorigas sonorilojn k. t. p.

Radha sidas trankvile kaj senmove. Subite unu el la pastroj ekflamas lumon super la senmova diino. La diino vekiga. La pastroj sidiĝas kaj la diino komencas danci. Ŝi salutas la sunon, la aeron kaj la teron, ŝi spiras la odoron de la floroj, per kiuj ŝi ornamas sin, ŝi trinkas kalikon da vino, kiun ŝi ricevas el la mano de unu el la pastroj, ŝi dancas la fajran dancon, kaj fine ŝi falas teren.

Ĉie oni aplaŭdis la dancantinon. Ŝi portas grandajn, verdajn ŝtonojn kaj juvelojn je ambaŭ manoj, kiuj aperas kiel okuloj de serpentoj. Ĉar ŝi havas mirindan korpon obeantan al ĉiu deziro oni ĝuas la dancojn kun granda plezuro. La serpentaj dancoj



La templa danco.



Artai danooi,

La templa danco.


estas tiel perfektaj, ke oni povus pensi, ke serpento sin serpentinumas antaŭ niaj okuloj. Ĉiuj movadoj montras veran dancarton. Estas laŭdirinde, ke oni hodiaŭ klopodas pri veraj scenoj por la reprezentado de artaj dancoj, ĉar oni pli bone komprenas ĉiujn movadojn, se oni vidas la veran ĉirkaŭaĵon; estas laŭdirinde, ke la ĝeartistoj dancante montras al ni ne nur saltojn kaj movadojn kaj ĝenufleksojn nekompreneblajn, sed donas al ni la eblon kompreni la dancadon per riĉe ornamitaj scenoj.


Ni ankoraŭ povus nomi multajn aliajn famajn dancistinojn kiel Isadora Duncan, Rita Sacchetto, Allan k. t. p., sed ni devas kontentiĝi je tiuj ĉi sciigoj, ĉar baldaŭ aperos detala artikolo pri dancartistoj. S.

*
*
*

La „Wiener Tageblatt“ de la kvina de februaro 1908 raportis pri Ruth St. Denis la jenon:

Hieraŭ posttagmeze prezentis sin Ruth St. Denis kaj dancis tute novan dancon. La princino Metternich ĉestis kaj multaj eminentuloj. Oni vidis tre apartan dancon „Yogi“. Yogi estas asketo, kiu sole vivas en profunda arbaro kaj per religiaj ekzercadoj atingis la plej grandan gradon de l'perfekteco. Se la kurteno leviĝas, la aspekto de la artistino estas tre stranga. Krono de blu-nigra haro kaj nur kelkaj maldikaj tukoj ĉirkaŭ la brusto. La tuta scenejo estas plenigita de branĉoj de l' arboj. Densejo ie en arbaro en alia parto de l' tero montriĝas al niaj okuloj, kaj estaĵo el aliaj mondoj faras diservon kaj adoras la naturon. Kion montras la dancistino, ĉio estas belega, mirinde kortuŝanta kaj esprimo de fremda granda io. La movadoj estis mirindaj por ĉiu sentema naturo. Ŝi ne nur dancas per piedoj, ŝi estas ankaŭ man- kaj fingrodancistino. Brakoj, manoj kaj fingroj obeeme sekvas ĉiun volon. Oni devas mem esti vidinta tiun ĉi ĉarman dancistinon kaj oni komprenos la grandan aplaŭdon de la vizitantoj, aplaŭdon, kiun ŝi tute meritas.





Sceno de hinda strato.

La Reĝo de Elfoj.

(El W. Goethe).

Kiu rajdas tra nokto, kun vento pro l' vet' ?
Tio estas la patro kun sia filet'.
La infanon li bone per brak' ĉirkaŭprenas,
De malvarmo gardante, ĉe l' brusto lin tenas.



„Kial kaŝas, filet', la vizaĝon vi time?“ —
„Ĉu ne vidas vi, patro, elfreĝon proksime ?
La elfreĝon kun longa trenajo kaj kron' ?“ —
„Mia filo, ĝi estas nebula nur zon' !“



„Infaneto amata, ho venu al mi !
La plej belajn ludetojn mi ludos kun vi ;
Apud bordo jen brilas floretoj koloraj,
Kaj ĉe mia patrino vestaĵoj la oraj.“



„Ĉu vi tute ne aŭdas, ho mia patreto,
Kion al mi promesas elfreĝ' en sekreto ?“ —
„Trankviliĝu, infano, kaj kreu al mi :
Murmuretas la vento en velka foli' .“



„Venu, bela knabeto, tre bone vi fartos :
Miaj junaj filinoj karese vin vartos ;
La filinoj, majstrinoj en danca rondform',
Balancante, kantante vin lulos al dorm' .“



„Ĉu ne vidas vi tie, patret' mia kara,
De elfreĝo filinojn en loko malklara?“
„Mia filo, fileto, mi vidas precize:
La maljunaj salikoj prezentas sin grize.“




„Mi vin amas, belul', ekposedi deziras,
Do mi uzos perforton, ĉar mem vi ne iras!“
„Mia patro, li kaptas, li prenas min for!
Al mi faris elfreĝo doloron je l' kor'!“



Frostotremas la patro, akcelas rapidon,
En la brakoj li tenas ĝemantan la idon;
Li alvenas penege al hejma la kort';
En la brakoj l' infanon pacigis la mort'.

A. Grabowski.



El Esperantujo.

1^a Cirkulero pri la V^a Internacia Esperantista Kongreso.

Al la Esperantistaro!

La preparaj aranĝoj por la venonta Kongreso estas jam multenombraj; tuj post kiam ni sciĝis, ke la tutmonda esperantista kunveno de la jaro 1909^a devos okazi en nia urbo, ekkomencis la laborado, kiu ne ĉesos ĝis kiam la gloraj kongresaj tagoj estos forflugintaj.

La du societoj nun ekzistantaj en Hispanujo, la „Hispana Societo por la propagando de Esperanto“ (hispana lingvo), kaj „Espero Kataluna“ (kataluna lingvo), amike interrilatiĝis, kaj de tiu amika interkomunikado, naskiĝis la decido nomi du reprezentantojn de ambaŭ societoj, kiuj zorgos pri la Kongreso. „Espero Kataluna“ nomis por tiu ofico sinjoron Pujulà, kaj la „Hispana Societo“ sinjoron Sabadell; de ili estas elektita la Loka Organiza Komitato, kiu konsistas el la jenaj personoj kaj roloj:

S-ro Frederik Pujulà Vallès, Prezidanto; S-ro Alfonso Sabadell, Vic-prezidanto; S-ro Miquel Cases, Kasisto; S-ino Germaine Rebours, Sekretariino. Fakoj. — Propagando: D-ro J. Bremon Masgrau. Loĝado: S-ro R. Claramunt. Festoj: S-ro Sales Balmes. Floraj ludoj: S-roj Carlo Bourlet kaj G. Vila Roca.

La dato elektita por la kongreso, interkonsente kun la Konstanta Kongresa Komitato estas: de la 5^a ĝis la 11^a de Septembro. La Prezo de Kongresa Karto estas 10 frankoj (4 sm.); la karton, kiu havas la numeron 1, oni ne vendas, sed oni ĝin aŭkcias. La esperantisto, kiu pagos por la karto plej altan prezon, havos la honoron ĝin posedi: por doni tempon al la proponantoj, la diritan karton oni konservas ĝis la 12^a horo nokte de la 5^a de Aŭgusto 1909^a, en kiu tago la Organiza Komitato finiĝos la aŭkcian tempon, kaj rezervas la 1^{an} Karton por la plej alta proponanto.

Unu el la festoj, kiun sendube plej ŝatos la esperantistoj, estas la bela ĉiujara Festo de la Revuo, kiu transformiĝos tiun ĉi jaron, en la famekonataj Floraj Ludoj de nia lando: la speciala Sub-Komitato, kiu zorgas pri tiu fako, koniĝos al la esperantistaro la staton de la afero.

Same kiel Cambridge kaj Dresden, Barcelono ĉiel klopodos por fari agrablaj la tagojn, dum kiuj ĝi havos la honoron gastigi la Van Kongreson. La urbestro de la urbo ordonis, ke la individuoj de la „Urba Gvardio“ ekkomencu la lernadon de Esperanto. 20 el ili komencis jam la kurson, farata de S-ro Pujulà Valles.

Por faciligi la kongresan korespondadon, oni petis kaj atingis de la Poŝtoficestro, specialan poŝtan keston; la adreso do de la Barcelona Kongreso, per kiu oni devas sendi al ni ĉiun korespondaĵon, estas la jena: **Esperantista Kongreso Barcelono.**

Jen niaj karaj samideanoj la unuaj informoj, kiujn ni devas al vi komuniki: ni faros ĉion, kion ni povos por denove triumfigi Esperanton. Helpu same vi nin, kaj komencu de nun la ŝparadon por ke vi povu veni Barcelonon.

Por la Loka Organiza Komitato


La Prezidanto de Propaganda Fako

D-ro J. Bremon Masgrau.



Miksaĵo.

Kompreneble mi havas grandan vastan korespondadon kun multaj karaj samideanoj. Foje mi finis leteron al iu el miaj amikoj per la vortoj: „Dank' al helpo de mia kara Mignon mi nun povas sendi al vi oftajn leterojn.“



La responde letero enhavis la frazon: „Koran saluton al via kara Mignon, per kies helpo miricevas tiajn detalajn leterojn.“

Respondinte mi skribis: „Mignon danke salutas.“

Imagu mian surprizon, kiam en la sekvanta letero mia juna amiko min demandis: „Ĉu la aminda Mignon estas unu el viaj nepinoj?“

Mi ja havas blondbuklajn nepinetojn, sed Mignon, mia kara helpantino estas skribmaŝino! Bela malgranda maŝineto, kiu efektive ebligas al mi la tutan korespondadon. Mi deziras denove laŭdi la bonulinon. Ĝi (ne ŝi) skribas klare kaj por mia bezono sufiĉe rapide, facile kaj bone ĝi faras kopiojn per blua papero. Unu momenton ŝi, pardonu ĝi skribas esperante, germane, france aŭ iu ajn lingvon, alian momenton ankaŭ ruse kaj pole, se mi tion dezirus. Ĝi estas konfidinda kaj lernema, certe, eĉ lernema! Komence ĝi ne povis skribi adresojn kaj poŝtkartojn, ĝi ĉion lernis. Mi ĝin aĉetis ĉe Bargou, Dresden, Wilsdrufferstr. je la malgranda sumo de 50 Sm*). — Jen la afereto: „MIGNON“.

M. Hankel.

*) Ĉefvendejo: Union-Schreibmaschinen-Gesellschaft, Berlin W 8, Friedrichstr. 74.





Bibliografio.

„La Bela Mondo“ raportas pri novaj verkoj nur, kiam la redakcio donace ricevis du ekzemplerojn. (Adreso: Dro Schramm, Dresden-Ständehaus.)

Franca Esperantisto. Monata organo de la francaj esperantistoj. Redaktoroj: F. de Ménéil, ĝenerala sekretario, René de Lajarte, E. Grosjean-Maupin, D-ro Vallienne. Redakcio kaj administracio: Paris, 46, Boulevard Magenta. Jara abono 4 fr.

Ni kore salutas la novan kunfraton kaj deziras al ĝi plenan sukceson. La nomoj de la redaktoroj sufiĉas por ni por rekomendi la revuon. Bedaŭrinde unu el ili, D-ro Vallienne mortis la unuan de decembro, sendube grava perdo por niaj francaj samideanoj, ĉar D-ro Vallienne estis lerta verkisto esperantista, al kiu ni dankas grandan nombron da bonaj verkoj.

Esperantista poŝkalendaro 1909. Germanujo. Esperanto-Verlag Möller & Borel, Berlin S. 154 paĝa. Prezo: 0,40 Sm.

La duan fojon aperas tiu ĉi grava poŝkalendaro. Entute la aranĝo estas la sama kiel en la eldono de l' jaro 1908. Nova estas la listo de la delegitoj kaj subdelegitoj de la Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.). Krom tio la libreto enhavas artikolojn pri Barcelono, la urbo de la kvina internacia kongreso kaj pri Esperanta Stenografio. Listo de esperantista gazetaro, kolektita kaj historie ordigita de nia senlaca kunlaboranto Tarnow, montras, ke ekzistas ĝis nun 163 esperantaj ĵurnaloj. Kun plezuro ni varme rekomendas la poŝkalendaron; ĝi estas forte bindita en verda tolo kaj havas formaton tre oportunan por la veŝta poŝo, kaj ĉio ĉi por 0,40 Sm.

Faut-il réformer l' Esperanto? Par G. Kolowrat. licencié ès-lettres. Paris. Presa Esperantista Societo, 33 rue Lacépède. 0,25 fr.

Tiu ĉi broŝureto esperante verkita estas tre rekomendinda, ĉar la aŭtoro lerte refutas la malverajn kaj ofte trompantajn argumentojn de la ldistoj kaj montras, ke Ido tute ne estas pli facile lernebla ol Esperanto, kiel ĉiam diras la reformemuloj. Ĉiu vera esperantisto devas legi tiun ĉi libron.

Norvega Esperanta Gazeto. Niaj norvegaj samideanoj nun fondis propran ĵurnalon por faciligi la propaĝandon por Esperanto en Norvegujo kaj por kolekti ĉiujn norvegajn samideanojn. La unua numero, kiun ni ĵus ricevis, estas beleta gazeteto, pro kiu ni nur povas gratuli al la redaktoro. Ni deziras al nia nova kolego multajn abonantojn kaj ni petas ĉiujn grupojn: helpu abonante por via grupa biblioteko!

„Verdaj fajreroj.“ Kolekto da versaĵoj de Romano Frenkel. Al verda stelo — eterna fidelo. Esperantista presejo de A. J. Witteryck, Bruĝo, Belĝujo. 42 paĝa. 40 spesdekoj.

Nia siberia samideano prezentas al ni en tiu ĉi bela libreto interesan kolekton de tradukitaj kaj originalaj poemoj. Unu el tiuj ĉi poemoj niaj legantoj trovas en tiu ĉi numero de la „Bela Mondo“. Legu ĝin kaj mendu la rekomendindan kolekton!



Universala Asocio Filatelia Esperantista. Niaj gelegantoj certe ĝojos pri la sciigo, ke ĵus estas fondita universala asocio filatelia esperantista, kies prezidanto estas sinjoro J. Fize (adreso: aŭ Patisson, Beziers, Francujo). La anoj de la U. A. F. E., sola societo vere internacia, havos la eblon fari valorajn interŝanĝojn nenion riskante, dank' al ĝiaj statutoj bone elpensitaj; plie, ĉar ili havos la rajton laŭprefere pagi mone la poŝtmarkojn, kiujn ili elektos, kaj kun rabato da 40⁰/₀, ili tiel havos rimedojn kompletigi sian kolekton kun kondiĉoj escepte profitigaj. S-ro Fize plezure sendos ekzempleron de l' statutoj al ĉiu, kiu lin petos pri tio.

